

我們熱愛毛主席

吳性清畫



# SPOPOLA CINIO

4

1961

人民中國報道





# Bonkvalita kaj Multspeca

## Nova Fazo de Antaŭensalto en Ĉina Industria Produkto

**E**N la Naŭa Sesio de la Oka Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio okazinta en januaro, 1961, estis elmetita la alvoko por plibonigi kvaliton kaj plimultigi specojn en la industria

produkto. Tiu ĉi alvoko tuj ricevis entuziasman respondon el la laboristoj. Sur la tutlanda fronto industria leviĝis amasa movado kun plibonigo de kvalito kaj plimultigo de specoj kiel centra tasko en produkto.

### EL POPOLA ĈINIO

Dumonata Gazeto

Eldonata de Ĉina Esperanto-Ligo

Redakcio: P. O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio

Administracio: P. O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio

Enhavo de N-ro 4 (69) 1961

Bildo sur la kovrilo — Ni Varme Amas  
Prezidanton Maŭ (Novjara bildo de Vu  
Hingking)

Bonkvalita kaj Multspeca — Nova Fazo de  
Antaŭensalto en Ĉina Industria Produkto  
Granda Venko de la Demokratia Reformo de  
Tibeto

Plago sen Malsato

La Dua Enlanda Revolucia Milito

Gan Tianjoŭ — la Unua Ĉina Inĝeniero  
Fervojkonstrua

Vizito al la Urbo

“Ni Ĵuras Defendi Nian Landon ĝis Morto kaj  
Ni Certe Venkos!”

Ni Ne Plu Estos Trompitaj

Sur Lago Biŭa

Rememoro pri R. Tagore

La Ĉasisto en Arba Oceano

Duonvazo da Salo

Korbopilka Teamo de Popola Komunumo

La Grand-urskato

Ŝtona Skulptaĵo “Inter-sopirantaj Kokoj”

Ĉinstilaj Pentraĵoj Viviĝas sur Ekrano

Venas la Floranta Epoko de la Naciaj Lingvoj

Bildo sur la dorsa kovrilo — Veston-lava

Grupo de Komunumo (Akvarelo de Ĝu  
Najĝeng)

En la daŭra antaŭensaltego dum tri jaroj, multe altiĝas la kvalito kaj multiĝas la kvanto de produktaĵoj kiel en la peza industrio, nome de ferŝtalo, karbo, petrolo, kemiaj krudaĵoj kaj diversaj maŝin-ekipajoj, tiel en multaj branĉoj de la malpeza industrio en Ĉinio. Surbaze de tiu ĉi produkta nivelo, la kvalita plibonigo kaj speca plimultigo fariĝas nun la necesa paŝo antaŭenpuŝi al pligranda disvolvigo la industrian konstruadon.

### En la Ferŝtala Industrio

Unuavice sur la fronto de tiu ĉi movado iras la laboristoj de ferŝtala industrio. Per ĉiuj rimedoj ili penas plibonigi la kvaliton de ŝtalo kaj fero, pligrandigi la elcenton de laŭnorma produkto de ŝtalo, fero, ŝtallaminataĵoj, pligrandigi la elcenton de ŝtalprodukto, plimultigi produktkvanton de bonkvalita ŝtalo, aloj-ŝtalo kaj gravaj ŝtalproduktoj. Ekzemple, Ŝingingŝan-a Ferŝtala Kompanio en Pekino jam povas amasprodukti bonkvalitajn ŝtalstangojn por elektroveldoj kaj jam atingis pli ol 94 elcentojn laŭnormajn. “Neniom da ŝtalo nekvalifikita el cent fornejoj”, “unuaklasaĵoj el cent fornejoj” jam fariĝis komunaj sloganoj kaj amasa movado por garantii bonkvaliton en multaj ŝtalfabrikejoj tra la tuta lando. La sistemo de kvalit-inspektado pliperfektigis kaj rigorigis. En la Laminejo de la Ferŝtala Kompanio de Anŝan, la laboristoj elmetis sloganon “Ne enlasu duaklasaĵojn en la tenejon kaj ne ellasu duagradaĵojn el fabrikejo”.

Nova ŝtal-laminataĵo produktiĝas ĉefe je la jenaj ok specoj: pezaj reloj, mezdikaj platoj, maldikaj platoj, silici-ŝtalaj lamenoj, senjuntaj tuboj, velditaj tuboj, altgradaj laminataĵoj kaj grandtipaj laminataĵoj, kiuj havas grandan signifon por la ekipiĝo de agrikulturo, industrio, komuniko-transporto kaj aliaj fakoj de nacia ekonomio. Laŭ la statistiko de januaro ĝis marto de tiu ĉi jaro, la kvanto de tiuj ĉi ŝtal-laminataĵoj en ĝia tuta produkto jam grandiĝis pli ol 10% kompare kun tiu en la lasta kvarono de la pasinta jaro.

*Gardenigo de Kampoj*

*Peti Sperton de Maljuna Kamparano*

*Fotoj de Hinhua*



*Diversspecaj produktitaĵoj de metiartaj fabrikoj de plektaĵoj en Tiangin.*

*Foto de Hinhua*



*Congking-a Ledaĵ-fabriko transiras de solspeca al multspeca produktado.*

*Foto de Hinhua*

## En la Malpeza Industrio

La senĉesa plialtiĝo de la materia kaj kultura vivnivelo de 650 milionoj da popolanoj, ne nur postulas sufiĉan kvanton da konsumvaroj de ĉiutaga vivo, sed ankaŭ pli bonan kvaliton kaj pli diversajn specojn de tiuj ĉi konsumvaroj. Efektivigi en la malpeza industrio la sloganon "bonkvalita kaj multspeca" elmetitan de la Komunista Partio de Ĉinio tute konformas al la postulo de la vasta popolamaso.


Rezultato jam estas akirita unue en la produktoj de la malpeza industrio de Ŝanhajo, kiuj estas ĉie vendataj tra la tuta lando. La laboristoj de la malpeza industrio de Ŝanhajo ne nur daŭrigas kaj dis-

volvas la produktadon de multaj objektoj kun fame konataj fabrikmarkoj, kiuj estis amataj de granda amaso kaj multe vendataj en- kaj eksterlande en la pasinteco, kiel ekzemple, fontoplumo kun fabrikmarko "Ŝanhajo", emajl-varoj kun fabrikmarko "Struto" ktp, sed ankaŭ penlaboras celante antaŭen al la pli bona kvalito, plimultaj specoj kaj desegnoj. La perkalo de la tipo 40 × 40 produktita de la Ŝtata Unua Koton-teksa Fabriko de Ŝanhajo, post reformo en la produktaj procedoj jam atingis la internacian avangardan nivelon en glateco kaj pureco; la vitra industrio de Ŝanhajo jam pliproduktis arojn da altklasaj vitraj iloj kaj ujoj de ĉiutaga uzo, vitro por industria uzo kaj precizaj vitraj instrumentoj. En la koloro, formo kaj dekoracio, multaj novaj kaj belaj specimenoj estas kreitaj.

La fabrikmarko "Ŝanhajo" nun fariĝas preskaŭ la pronomo de bonkvalitaj produktajoj de la malpeza industrio. "Lernu Ŝanhajon", "Celatingu Ŝanhajon", "Penfaru produkton unuaklasan", nun fariĝas movado inter la laboristoj de la malpeza industrio ĉiuloke de la lando. Ŝanhajaj produktajoj fariĝas la objekto por esti lernata kaj atingata de la malpeza industrio en aliaj regionoj. En tiu ĉi movado multaj produktajoj jam atingis avangardan nivelon.

*Tiajn precizajn il-maŝinojn la Kunming-a Maŝin-fabriko jam povas produkti po-grande.*

*Foto de Hinhua*





# Granda Venko de la Demokratia Reformo en Tibeto

*En la 5-a Plena Sesio de la Prepara Komitato de Tibeta Aŭtonoma Regiono okazinta en Lhasa de la 2-a ĝis la 13-a de aprilo ĉijare estis farita ĝenerala sumigo pri la atingoj en Tibeto de post la komenciĝo de demokratia reformo en tiu regiono. Sube ni publikigas raporton pri tiu sesio por informi niajn legantojn interesigantajn pri la aktuala stato de Tibeta Regiono.*

— La Red.

**L**A demokratia reformo en la Tibeta Regiono atingis grandan rezultaton dum la pasinta jaro. Inter la agrikulturaj regionoj kun loĝantaro nombriĝanta 870,000 demokratia reformo jam plenumiĝis en regionoj kun 850,000 loĝantoj, inter kiuj en regionoj kun 790,000 loĝantoj estis finita eĉ la kontrolado de la reformo; inter la paŝtistaj regionoj kun loĝantaro nombriĝanta 260,000 pli ol du trionoj jam komencis movadon de 'tri kontraŭ-oj kaj profito al ambaŭ' (t. e. movado kontraŭ ribelo, kontraŭ senpaga hulak-servosistemo kaj kontraŭ persona dependeco, kaj por la profito al la paŝtlaboristoj kaj brutposedantoj)." Tiuj ĉi ciferoj estas unu el la plej rimarkindaj partoj de la raporto de la konferenco.

Antaŭ du jaroj, t. e. antaŭ la ribelo de la antaŭa loka registaro de Tibeto kaj la reakcia kliko de la tibeta supera socitavolo, en marto, 1959, la fantomo de feŭda servutsistemo ŝvebis super la Tibeta Altebenejo. Tiam en la bienoj de la servutulo-posedantoj, servutuloj kaj sklavoj estis devigataj vivi en infera mallumo, suferante malsaton kaj malvarmon. El la karceroj de la tri grupoj de grandaj biensinjoroj nobelaj, lamaaj kaj oficistaj aŭdiĝis akraj vekrioj de senkulpaj viktimoj; la barbaraj torturiloj estis makulitaj per sango de laboruloj; servutuloj grandamase forkuris ĉien rifuĝe for de siaj hejmlokoj, la kamparo falis en staton de bankroto kaj la produktado malkreskis. Hodiaŭ, post du jaroj, kun la venko de la kampanjo de kvietigo de la ribelo de la reakcia kliko de la tibeta supera socitavolo kaj en la ardanta movado de demokratia reformo, la miliona servutularo tibeta jam ĝisfunde detruis la plej reakcian, plej malluman, plej kruelan kaj plej malhumanan feŭdan servut-sistemon, frakasinte la katenojn kaj akiris plenan liberiĝon.

En la kunvenejo sidis Puncogĉjuepel, simpla tibeta kamparano el la altaj montoj de la orienta alta ebenaĵo. Liaj okuloj brilis pro ekscitiĝo kaj kortuŝiĝo. En la malnova socio li sklave laboregis por la servutulo-mastro kiel bovo kaj ĉevalo; nun li estas

vilaĝestro de Jado-vilaĝo, Dragjab-gubernio, Ĉangdu-subprovinco. Puncogĉjuepel profunde sentas la ŝanĝiĝon de sia politika pozicio. Li diris en grupa kunsido kun granda emocio, "Vere bona estas demokratia reformo, vere bonega! La demokratia reformo forportis la tri montegojn pezantajn de sur la kapo de la tibeta popolo, rompis la katenojn sur niaj manoj kaj piedoj. Ni laboruloj nun fariĝis mastroj de la tero kaj de la nova socio. Sub la eduko kaj zorgo de la Komunista Partio, mi, sklavo en la pasinteco, fariĝis la popola vilaĝestro. Tio estas mondoreversa ŝanĝo."

La nova vivo de Puncogĉjuepel estas miniaturo de la politika liberiĝo de la vastaj laborantaj amasoj en

*Cerin, antaŭa almozulo, kamparano de Ruĝflaga Vilaĝo el la orienta antaŭurbo de Lhasa ricevis la ter-atestilon.*

*Foto de Hinhua*



Tibeto. La granda demokratia reformo frakasis la reakcian feŭdan reĝimon kruele subpreminta kaj sklaviginta de miloj da jaroj la laborantan popolon. Starigita nun en Tibeto estas popol-demokratia reĝimo. En la jam starigitaj 283 popolaj reginstancoj de la distrikta nivelo kaj la 1,009 de la vilaĝa nivelo, multaj liberigintaj servutuloj kaj sklavoĵoj okupas la gvidantajn poziciojn. En sia laboro, ili korekte efektivas la gvidantajn politikojn, intime rilatiĝas kun la popolamasoj, laboras sindone kaj diligente, estas kuraĝaj en penso kaj ago, plene montrante sian sagacon, talenton kaj aplomban spiriton de la laboranta popolo aganta kiel mastro.

Ĉiuj komitatanoj kaj invititaj partoprenantoj de la konferenco varme aplaudis la riĉan rikolton en agrikulturo dum la lastaj du sinsekvaj jaroj, precipe la lastjaran, kies tuta produktkvanto de greno superas tiun de la bonrikolta jaro 1959 per 15%. En sia parolado al la konferenco Lozanculĉim, la estro de Montsuda Subprovinco, citis popolkanton de la liberigitaj kamparanoj loĝantaj laŭlonge de rivero Campo:

*Mil jarojn la servutuloj senhele pasigis,  
Nun la tuta ĉielo per nia lumo brilas.  
Kiu plu diras ke mi estas nekapabla,  
Lasu lin rigardi al mia grenejo riĉenhava!*

Kiu iam alvenis al Pari-altebenejo ĉe la suda parto de Tibeto bone scias, ke ĝi situas alte sur la supra parto de Himalajaj Montoj, kun malvarmega klimato. Sed la heroaj tieaj kamparanoj faris lastjare senprecedencan miraklon: ili ne nur sukcesis kreskigi tie grenojn, sed ankaŭ havis riĉan rikolton. Por garantii bonan rikolton, kamparanoj en Nemo-rivervalo en la Lhasa regiono pioĉe kaj ŝpate elfosis kanalon sur rokmonto. En Kareg-distrikto de Nagarge-gubernio, Gjalze-subprovinco, kaj Mani-vilaĝo de Ĉangdu-gubernio, Ĉangdu-subprovinco, la kamparanoj aŭdace sukcesis kreskigi du-rikoltan sekalon unuafoje en la historio de tiu loko. Multaj kampoj produktis grandkvantan rikolton. Ne malmultaj



*Traktoro Dongfanhong partoprenas terkulturadon de Lhasa-ebenejo.*

*Foto de Hinhua*

vilaĝoj, kiuj estis historie gren-mankaj, nun produktas superfluan grenon, rapide ŝanĝante sian malnovan fizionomion de malriĉeco kaj post-restinteco, Drakar Sodnmuangĉjug, la vicestro de Linze-subprovinco, raportis al la konferenco kun entuziasmo: "Alha-vilaĝo de Bohul-gubernio estas malgranda montvilaĝo kun nur dek familioj. Antaŭe sub la ekspluato de la tri grupoj de grandaj biensinjoroj, naŭ familioj ĉiam ne havis sufiĉe da greno, vivante tre mizere. Post la demokratia reformo, la dek familioj organiziĝis en interhelpan grupon, la 26 laborkapablaj viroj en la vilaĝo ĉiuj partoprenas la terkulturadon, laborante zorgeme kaj diligente. Post la aŭtuna rikolto, ĉiu homo en la vilaĝo ricevis po 834 ĝin-oj da greno, kaj ĉiu familio havas superfluan grenon.

Kun la disvolviĝo de produktado, la vivo de la laboruloj estas paŝo post paŝo plibonigita kaj altigita. En Lhasa pli ol 5,000 senlaboraj loĝantoj jam ricevis taŭgajn okupojn. Pli ol 300 almozpetaj kaj vagantaj familioj kiuj antaŭe tutjare loĝis sub ĉielo aŭ en ĉifonitaj tendaĉoj, nun transloĝiĝis en novajn domojn, kaj jam havas diversspecajn okupojn, adiaŭinte sian migrulan kaj povran vivon. Ĉijare dum la novjaro laŭ la tibeta kalendaro, de la urboj al la vilaĝoj, de la vilaĝoj al la paŝtaj regionoj, ĉie regis senescepte gajeco.

La partoprenantoj de la konferenco ĉiuj atribuis la fundamentan ŝanĝon politikan kaj ekonomian en



# PLAGO SEN MALSATO

—Raporto el plagita regiono—

**N**OKTO. La trajno rapidis al mia hejmloko Linfen en la suda parto de Ŝanhi-provinco. La vitro de la fenestro estis kvazaŭ ŝmirita per dika tavolo da nigra lako. Malproksime flagris en aroj elektraĵoj lampoj kvazaŭ stelaroj. Ho, kiom ŝanĝiĝis jam la montoj kaj riveroj en la hejmloko, en la pasintaj jaroj, precipe en la jaroj sub la brilo de la tri ruĝaj standardoj—la ĝenerala linio, la granda antaŭensalto kaj la popola komunumo. Kaj kiom vin vundis la natura plago en la du sinsekvaj jaroj? Mi simple ne povis resti trankvile ĝis la mateniĝo. Rigardante al la nigra nokto mi rememoras la plagon de sekeco en la jaro 1877 dum King-dinastio, kiun mi aŭdis de maljunuloj.

En tiu jaro grandan sekecon suferis Linfen, sed neniom indulgis la popolon la registaraj instancoj, terposedantoj kaj mastroj de grenvendejoj, la prezo de greno estis altigita de malpli ol mil groŝoj ĝis pli ol sesdek mil groŝoj. La plago natura plus katastrofo homa devigis la popolon vivi per herbradikoj kaj arboŝeloj. En 1880 el la 180,000 loĝantoj antaŭaj, restis al Linfen nur iom pli ol 70,000.

Ekde la plej frua tempo kiun mi memoras, ĉiujare mi vidis fuĝantojn de malsato, kiuj almozpetis de

domo al domo kun difektita pelvo kaj bastono kontraŭhunda.

La trajno antaŭen rapidis de stacio al stacio, kaj la rememoroj aperis en mia kapo sceno post sceno. Mi estis certa ke la hejmloko, same kiel aliaj lokoj en la lando, fariĝas ĉiam pli bela kiel granda majstra pentraĵo, sub la gvido de la Komunista Partio, precipe sub la brilo de la tri ruĝaj standardoj. . . . Sed la eksterordinare granda katastrofo natura ja kvazaŭ botelo da inko versita sur la bildo, kia domaĝo!

Forlasinte la trajnon, mi tuj rapidis al la gubernia komitato de K. P. de Linfen.

Tre silente estis en la sidejo de la komitato, multaj oficejaj pordoj estis ŝlositaj. Ĝuste kiam mi estis miranta, eliris k-do Liu Juting, la direktoro de la komitata oficejo.

Tiu informis min ke la sekretarioj de la gubernia komitato kaj la plejparto de la personaro de la komitato jam iris al popolaj komunumoj, por formi kune kun la laborantoj de la provinca kaj sub-provincaj partiaj komitatoj laborgrupojn komisiitajn por aranĝi la vivadon de la komunumanoj. Laŭ lia




la vivo de la tibeta laboranta popolo al la brila gvidado de Prezidanto Maŭ Zedong kaj la Komunista Partio. Ili diris, ke sen la gvidado de Prezidanto Maŭ kaj la Komunista Partio, ne estus eble frakasi la reĝimon de la reakcia feŭda servutulo-posedanta klaso de Tibeto, kaj ne estus eble disvolvi produktadon, plibonigi la vivon, ne estus eble por la laboranta popolo sin liberigi." Ili nomas la Partion kaj Prezidanton Maŭ "la suno", "la dolĉa roso" kaj "la fonto de feliĉo".

La plej granda parto de la supera kaj meza socitavoloj esprimas tutkoran subtenon al la gvidado de la Komunista Partio kaj la revolucio en Tibeto. Langdun Kŭengeŭanĉiu, membro de la Konstanta Komitato diris, "Kiam la demokratia reformo jus komenciĝis, mi havis dubon pri la politiko de la Partio; sed poste la faktoj pruvis, ke la afero ne iras kiel mi imagis. La Partio adoptis politikon de paca

reformo, elaçetante la superfluaĵajn produktajn rimedojn posedatajn de tiuj patriotaj personoj de la supera tavolo, kiuj ne partoprenis en la ribelo, donante al ili konvenajn politikajn poziciojn kaj zorgante bone pri ilia vivo, konsistate efektivegante la politikon de longdaŭra unuiĝo kaj kunlaboro. Tiel, mi iom post iom ekkonis la grandiozecon de la Partio kaj klare vidis antaŭ mi brilan estontecon."

Ekde la kampanjo de kvietigo de la ribelo kaj de la demokratia reformo, dank' al la fakto ke kune kun la plena mobilizo de la popolamasoj estis bone plenumata ankaŭ la laboro de unuiĝo kun la supera tavolo, la unuecfronto en Tibeto jam disvolviĝis en novan etapon de popol-demokratia unuecfronto, fariĝante unuecfronto de granda unuiĝo de la miliono kaj ducent mil popolanoj de Tibeto. La patriotaj progresemaj elementoj el la supera kaj meza socitavoloj nun estas unu paŝon plu mobilizitaj por kontribuisian forton al la konstruado de nova Tibeto.



scio la plejparto de la komunumaj manĝejoj en la gubernio jam aranĝis por si la bezonatajn grenojn kaj legomojn ĝis la somera rikolto. Estas fiksiĝaj ankaŭ la laboroj de flankaj produktoj, de surkampa flegado de tritiko kaj de printempa produktado. La plejparto de la komunumanoj havas sufiĉan fidon

por transpasi la plagon per produktado, ili ne nur klopodas ne malsati, sed eĉ vivi kiel eble plej bone.

K-do Liu, kvazaŭ ion meditante, diris montrante la bildon de projekto de akvoutiliga konstruado de la gubernio, kiu estis metita sub la vitro sur la skribtablo: "La ĉielo ja ne falos, dank' al la gvido de la Partio. Sed tia plago, se ĝi estus okazinta antaŭ kelkaj jaroj, multe malfaciligus al ni la tagojn! Kiam ni luktis kontraŭ la trosekeco, la 400,000 loĝantoj de la gubernio sub la unueca gvido de la popolaj komunumoj sukcesis en certa grado superregi la naturon, kaj kiel eble plej ĝin reformis." Fingre montrante multajn nigrajn punktojn sur la bildo, li daŭrigis: "Vidu, tiuj komunumoj sub la piedo de la Orienta Monto konstruis laŭ unueca plano grupon de mil putoj, dank' al la pumpiloj alsenditaj el la provinca ĉefurbo, parto de sekaj kampoj estas transformitaj en akvajn kampojn. Kaj ĉi tie estas akvokonservejo de Laŭkju-rivero kun kapacito de 6,000,000 kubmetroj da akvo. Du novaj kanaloj estas konstruitaj ĉe la piedo de la Okcidenta Monto. Ses aŭ sep nove konstruitaj hidroelektraj stacioj de Longci-popolkomunumo jam elsendas elektron. . . . La areo de akvaj kampoj el la totala surfaco de agroj de 1,200,000 muoj\* plivastiĝis, de la antaŭaj pli ol 70,000 muoj ĝis la nunaj 420,000 muoj kaj la areo irigacie garantiata atingis 280,000 muojn."

Fine, li diris ridante: "Vi jam estas hejme, do mem iru kaj pririgardu."

Posttagmeze tiun tagon, mi atingis la Dingcun-an Produktan Brigadon de la Ŝicuna Komunumo kune kun la laboranto de la gubernia komitato k-do Ĝu Venhua.

Ĉe la enirejo de la vilaĝo ni renkontis k-don Ding Tianlang, la filian sekretarion de K. P. de la brigado, kaj k-dinon Ĉeng Hong'e, malsuprenveninta kadrino el la gubernia komitato. K-do Ding, kiu estis plenkovrita de kalko, diris ke li ĝuste helpas kelkajn transporttrupanojn kalki siajn murojn kaj paper-tapeti la plafonojn, utiligante la tempon, kiam en la brigado la vintra tritiko, kiu devas esti akvumita aŭ erpita, estas jam akvumitaj aŭ erpitaj. Li petis la k-dinon nin konduki al la oficejo de la brigado por iom ripozi.

Ne longe poste venis la tempo por manĝo. El la manĝohalo aŭdiĝis ĝojaj kaj sonoraj ridoj kaj konversacioj.

La komunumanoj kunsidis, unu familio ĉirkaŭ unu tablo, kaj ĉirkaŭ iuj tabloj kunsidis ankaŭ kelkaj inter si intimaj aĝuloj kaj aĝulinoj kun aldono de infanoj. La 70-jara Han Tianguan kaj lia nepeto interpretas mantoŭ-ojn\* unu al la alia; Liu Ĝenĝu prenis el sia porcio jujubojn kaj ilin donis al sia bopatrino, kaj tiu transdonis ilin al la du nepetoj; kelkaj maljunuloj kun blankaj haroj kaj barboj kunmanĝis babilante pri io kaj gaje ridis de tempo al tempo. . . .

Dum manĝado gek-doĵ Ding Tianlang, Ding Maŭsen kaj Ĉeng Hong'e rakontis al mi, kia estis kaj kiel estis konkerita la suferita plago de la produkta brigado.

Por du sinsekvaj jaroj tiu brigado estis trafita de naturaj katastrofoj. Por la jaro 1959 ĝi ricevis en du rikoltoj entute pli ol 185 tunojn da rikoltaĵoj, kaj por la jaro 1960 nur 125 tunojn. "Nia sperto por venki la plagon estas," diris k-do Ding Tianlang, "pli frua preparado por la produkto kaj la laŭplana ŝparema konsumado."

En printempo de 1960, kiam ili informiĝis pri la meteorologia antaŭraporto pri ebla sekeco, la K.P.-filio faris inter la komunumanoj subtilajn organizajn laborojn, kondukante la produktajn laborojn de la komunumo, ĝi alvokis la komunumanojn bone kulturi ankaŭ siajn privatajn parcelojn, kaj stimulant la legoman produktadon de la komuna manĝejo, ĝi konstante edukis la kuiristojn al ŝparemo.

En la plej kriza tempo de sekeco, la K.P.-filio gvidis la komunumanojn disvolvi kampanjon de batalakiro de rikolto el la manoj de sekeco-demono. La lokomobilo kiu estis destinita por mekanikigi la manĝejon, estis translokigita sur la kampon por pumpi akvon, junaj kaj fortaj gekomunumanoj ĉiuj kun vektro kaj siteloj ŝultroportis akvon el putoj dekojn da metroj profundaj al la kampoj, kaj helpis la akvumadon ankaŭ maljunuloj, malfortuloj kaj

\* *Vaporumita manĝaĵo el fermentita pasto.*



\* 1 muo = 1/15 hektaro.



infanoj uzante vazojn kaj kruĉojn. Ilia slogano estis: ĉiu sulko aŭ muo irigaciita estas sulko aŭ muo gajnita. Liu Ĝenĝu, K.P.-ano kaj estrino de virina brigado, kaj Vang Julan, ano de la Komunisma Junulara Ligo kaj estrino de sturm-brigado Liu Hulan-a, ambaŭ faris rekordon de 180 sitelojn potage! Ŝveliĝis iliaj ŝultroj kaj frotvundiĝis iliaj plandoj, sed malgraŭ la admono de K.P.-filio por ripozo, ili eĉ daŭrigis senbrue la portadon sub la luno. . . .

Post ekstreme malfacila luktado, krom la 125-tuna rikolto ricevita de la brigado, la komunumanoj rikoltis el la privataj parceloj meznombro 13 kilogramojn da greno po-kape, kaj la komuna manĝejo rikoltis el sia ĝardeno de dekelkaj muoj: tomatojn, brasikojn, rafanojn kaj kukurbacojn kun totala kvanto de pli ol 115 tunoj kaj krom tio pli ol 20 tunojn da jujuboj.

Ankaŭ la kuiristoj elpensis ŝparrimedojn. Grenoj estis tre ŝpareme konsumitaj; same la legomoj: manĝita estis melongenkarno kaj sekigitaj estis la ŝeloj, manĝitaj estis la brasikfolioj kaj peklataj la radikoj. Dank' al la konstanta atenta interkompletigo inter la nutraĵoj el delikata kaj maldelikata grenoj, kaj zorgema preparo de la manĝaĵoj el maldelikata greno, la manĝejo ne nur havigis al la komunumanoj bonajn kaj malkarajn manĝaĵojn, sed ankaŭ ŝparis grenon.

Post la manĝo la oficejo de la brigado pleniĝis de homoj, kiuj estis ĉiuj kun ridplena kaj ruĝe brilanta mieno. Avo Ding Gujtong, kiu havas la kromnomon "Vasteprizorganto", diris kaptante mian manon: "Mi estas 75-jarulo, kalkulebla kiel trapasinto de tri dinastioj. Antaŭe, ne parolu jam pri jaro de plago, ĉe ĉiu herbobalanciĝo je ventblovo, la terkulturistoj jam devis deteni siajn buŝojn! Post ĉio kion oni povas diri, ja estas nia Prezidanto Maŭ kiu solvis por ni ĉiujn prizorgojn; la terkulturistoj jam ne suferos!"

La travivaĵo de Liu Ĝenĝu povas plej bone klarigi la diferencajn rezultojn de la naturaj plagoj en diferencaj epokoj.

Vespere mi speciale intervjuis Liu Ĝenĝu, kiu estas 28-jara patrino de du infanoj, membro de Ĉ.K.P., aktivulo en la kontraŭplaga luktado. Kiel multaj aliaj ĉinaj virinoj ŝi havas tre malfeliĉan pasinton kaj trapasis tre malfacilan vojon.

Ŝi naskiĝis en Henan-provinco kaj perdis sian patrinon tre frue. En 1943, kiam ŝi estis 10-jara, ŝi devis migradi kun sia patro almozante, pro la plago suferita de ŝia hejmloko. Atinginte ie, ŝi ne scias kie, la patro tiel malsatis, ke li ne plu kapablis sin movi, kaj devis transdoni la knabinon al hom-komercisto. Je la disiĝo, la patro diris al ŝi, karesante ŝian kapon per senforta mano: "Mi estas kulpa al vi, mia infano, kaj al via frue pasinta patrino, sed kion fari, kiam nin mizerulojn trafis plago!" Ĝisvene ploregis Ĝenĝu en la sino de la patro.



*Manĝejo de Dongfeng-popolkomunumo de Ĉongĉeng-gubernio (en plagita regiono), Ŝanhi-provinco.*

*Foto de Hinhua*

Larmojn versante Ĝenĝu estis kondukita al Dingcun, kaj vendita al iu lignajisto kun aĝo de ĉirkaŭ 40 jaroj kiel infanedzino. Pro malriĉeco la lignajisto ĉiam verŝis sian koleron sur la malfortan kaj malgrasan Ĝenĝu. Post la Liberiĝo Ĝenĝu aliĝis al la Komunisma Junulara Ligo, nuligis la malracian fianĉigon, ricevis teron kaj loĝejon, kaj fondis novan familion. Post la popol-komunumigo, dank' al la fondiĝo de la komuna manĝejo solviĝis la kontraŭdiro inter publika laboro kaj dommastrumo, kaj pliharmoniĝis la interrilatoj inter la bopatrino kaj bofilino. . . .

"Mi plej bone komprenas, kio estas plago," diris Liu Ĝenĝu. "Kaj mi ankaŭ plej bone komprenas, kial ne suferigas nun la plagaj jaroj. Kiam mi pensas pri ĉi tio, eĉ tremas mia koro!"

"Kial vi ploras, panjo?" Detirante la manon de la patrino, demandis la du infanoj, kiuj sidis en la sino de Liu Ĝenĝu. "Tion vi ne povas kompreni, infanoj," respondis la patrino, forte ĉirkaŭpremante ilin.

Per kvar tagoj mi travizitis la hejmlokon, kvazaŭ rigardi florojn rajdante. Dum la tempo mi iris al du vilaĝaj foiroj, kaj vizitis du hidroelektrajn konstruojn de la komunumo kaj ankaŭ kelkajn nove konstruitajn fabrikojn. . . . La frostita Fen-rivero serpentumis foren kvazaŭ jadkolora silka rubando de la nordo al la sudo, kaj la nigre verda vintra tritiko dense kovris la teron de ambaŭ bordoj. Sur la landvojo tien kaj ĉi tien kuris multaj ĉaroj, terkulturistoj prizorgantaj irigaciadon saltadis de sulko al sulko sur la tritik-kampoj kun ŝoveliloj, — por akiri pli bonan rikolton en la venonta jaro, oni faris ĉiujn preparajn laborojn.

# La Dua Enlanda Revolucia Milito

**L**A Unua Enlanda Revolucia Milito (1925-1927), milito kontraŭ la feŭdaj militaristoj, la agentoj kaj ĉefaj armitaj apogiloj de imperiismo en sia superregado super Ĉinio, fiaskis. Ĉiuj kontraŭrevoluciuloj kolektiĝis post Ĉiang Kajŝek kaj fondis mallumegan reakcian reĝimon — la t. n. Nacian Registaron en Nankino. Ĝi submetis sin ekstere al imperiismo kaj, interne, reprezentis la interesojn de la bienularo kaj la kompradora burĝaro. Oni taksas, ke pli ol miliono da komunistoj kaj revoluciuloj estis barbaramente murditaj dum la 4-5 jaroj post la malsukceso de la revolucio.

Por savi la revolucion post la malsukceso, je la 1-a de aŭgusto, 1927 en Nanĉang, Gianghi-provinco, la Komunista Partio de Ĉinio komisiis al k-doĵ Ĝoŭ Enlaj kaj Ĝu De la gvidadon de la leviĝo de tridek mil armeanoj, kiuj estis sub la influo de la revolucio. Sed tiu leviĝo ne atingis sian senperan celon. La leviĝintaj trupoj ne starigis revolucionan bazon en la kamparo, nek sin kunligis kun la kamparanoj, sed tuj militiris al Kantono, por ree preni ĝin kiel kolektiĝejon de revoluciaj fortoj. Kvankam parto de la forto de la leviĝintaj revoluciaj trupoj sukcesis sin konservi sub la senĉesaj atakoj de la malamikoj, tamen plejparto de ili disperdiĝis pro suferitaj malvenkoj en orienta Guangdong-provinco. Tiel fariĝis neevitebla la situacio de malsukceso de la revolucio. Tamen ekde tiam, la Komunista Partio de Ĉinio ekposedis siajn proprajn armitajn fortojn, kio ja estas afero signifoplena en la ĉina historio. Kaj la 1-a de aŭgusto fariĝis por la ĉina popolo la festotago de la fondiĝo de la Ĉina Popola Liberiga Armeo.

La malvenko de la revolucio kaŭzis novan ŝanĝiĝon de la stato de klasoj en la ĉina socio. La laboristoj perdis la demokratiajn kaj ekonomiajn rajtojn akiritajn dum la revolucio, plilongiĝis la labortago kaj malaltiĝis la salajro. En la kamparo,



*En aprilo, 1928 sur Ĝinggang-monto, la revoluciaj trupoj sub Ĝu De (maldekstre) unuiĝis kun tiuj gvidataj de Maŭ Zedong. Ili kune formis la Kvaran Armeon de la Ĉina Laborista-kamparana Ruĝa Armeo.*

senĉese aldoniĝis novaj kaj novaj impostoj. En la jaro 1933, en Giangsu-provinco kaj ĝia ĉirkaŭaĵo, ekzemple, la aldonitaj impostoj sumis 26-oble pli multe ol la regulaj. Kruelega blanka teroro faris la amasan luktadon pli malfacila. La nacia burĝaro kaj multaj el la superaj etburĝoj forlasis la revolucion. La militaristoj, subtenataj kaj direktataj de diversaj imperiistoj, denove komencis militon por interrabi pli da regtereno. Aperis malluma Ĉinio anstataŭ la luma.

## Hisigo de la Ruĝa Standardo

Sed ĝuste kiel Maŭ Zedong diris: “La Komunista Partio de Ĉinio kaj la ĉina popolo ja ne estis malkuraĝigitaj, konkeritaj aŭ ekstermitaj, ili sin levis de sur la tero, forviŝis la sangmakulojn sur sia korpo, enterigis la mortintajn kamaradojn kaj ree daŭrigis la batalon.”

La 7-an de aŭgusto, 1927, la Centra Komitato de la Partio kunvokis urĝan kunvenon en Giugiang, Gianghi-provinco. En la kunsido, Ĉen Duhiu, la tiama ĝenerala sekretario, estis kritikita kaj eksigita, ĉar li advokatis por forlaso de batalado antaŭ la atako de la reakciuloj kaj surpaŝis la vojon de perfido al la revolucio. La kunveno alvokis gvidi la kamparanaron por armite kontraŭbatali la reakcian regadon de Kuomintango.

---

*La aŭtoro Caj Huanven estas asist-esploranto de la Esplora Instituto de Historio de la Ĉina Akademio de Sciencoj.*



La unua paŝo estis organizi kamparanojn por ribelo je la aŭtuna rikolto. Maŭ Zedong fondis la Laboristan-Kamparanan Ruĝan Armeon en la provincoj Hunan kaj Gianghi. La Partio gvidis kamparanajn ribelojn ankaŭ en Hubej- kaj Guangdong-provincoj. Tiel komenciĝis la Dua Enlanda Revolucia Milito. Disvolviĝis la fortoj de la laborista-kamparana revolucia armeo. Ekde tiam, "per armita revolucio kontraŭbatali la armitan kontraŭrevolucion" fariĝis la ĉefa formo de la batalado de la ĉina popolo.

La Sesa Tutlanda Kongreso de la Partio okazigita en julio de 1928 elmontris, ke la revolucio sin trovas tiam inter du altaj tajdoj, kaj pro tio la revolucia tasko tiutempa ne estis fari atakojn sed gajni la popolamasojn. Konforme al tio, la Kongreso elmetis du gravajn taskojn: fondi ruĝan armeon kaj revoluciajn bazojn en la kamparo.

En oktobro, 1927, Maŭ Zedong gvidis siajn trupojn sur Ginggang-monton ĉe la limo de Hunan-kaj Gianghi-provincoj kaj fondis la unuan bazon de revolucia forto. En aprilo, 1928, la trupoj komandataj de Ĝu De venis al Ginggang-monto unuiĝi kun tiuj de Maŭ Zedong, kaj ili kune formis la Kvaran Armeon de la Ĉina Laborista-Kamparana Ruĝa Armeo. Tiamaniere, alten hisiĝis la ruĝa standardo super Ginggang-monto, dum la tuta Ĉinio estis sub la reakcia teroro kaj mallumo.

La armita batalado en la kamparo rapide disvolvis la fortojn de la ruĝaj partizanoj. En la provincoj Gianghi, Fugian, Hunan, Hubej, Guangdong kaj Guanghi fondiĝis unu post alia 15 revoluciaj bazoj, kaj fondiĝis ankaŭ la Centra Revolucia Bazo kun Ĵujgin, Gianghi-provinco, kiel la centro.

Ĉiang Kajŝek ne toleris la kreskadon de la revoluciaj fortoj. Dum la periodo ekde decembro, 1930 ĝis septembro, 1931, li lanĉis tri ĉirkaŭatakojn al la Centra Revolucia Bazo en Gianghi. La Ruĝa Armeo frakasis tiujn tri atakojn sub la direktado de la strategia penso de Maŭ Zedong, nome, profunden enlogi la malamikojn, elekti iliajn malfortajn punktojn, koncentrigi superan forton por frakasi la malamikajn fortojn unu taĉmenton post alia per movada milito.

## Nacia Krizo

Ĝuste en tiu tempo la ĉina popolo frontiĝis al nova krizo. La 18-an de septembro, 1931, trupoj de la japana imperiismo bombardis kaj okupis la urbon Ŝenjang (Mukden) en Nordorienta Ĉinio. Kaj ili konkeris la tri provincojn Gilin, Liaŭning kaj Hejlonggiang en nur iom pli ol tri monatoj.

La invado de Japanio kaj la malkuraĝa politiko de nerezisto de Ĉiang Kajŝek indignigis la tutan nacion. La 22-an de septembro, la Komunista Partio de Ĉinio alvokis la tutan popolon por leviĝi kontraŭ la japana invado. Laboristoj kaj studentoj respondis

al la alvoko per strikoj kaj manifestacioj. La 19-an de decembro, kiam tridek mil studentoj el diversaj lokoj tra la tuta lando, kolektiĝis en Nankino kaj postulis, ke la registaro de Ĉiang Kajŝek ekrezistu al la invadantoj, Ĉiang respondis al ili per pafmortigoj kaj arestoj.

La 28-an de januaro, 1932, japanaj trupoj subite ekatakis Ŝanhajon. Sub la subtenado de la ŝanhaja popolo, la 19a-voja Armeo tie garnizonanta, rebatis la invadon spite de la malpermeso de Ĉiang Kajŝek. Ĉiang Kajŝek subfosis la rezistadon: li malpermesis la ĉinan mararmeon partopreni la batalon, malpermesis la ŝanhajajn loĝantojn organizi volontulajn taĉmentojn kaj retenis la kontribuitan monon, la grenon kaj municion por la rezistanta armeo. Sed la brava batalo daŭris unu monaton kaj kaŭzis multe da vundoj kaj mortoj al la japanaj trupoj. Finfine, la rezistantoj devis retiriĝi el Ŝanhajo pro la sieĝo de surbordigintaj malamikoj de sur la maro. Ĉiang Kajŝek tuj subskribis kun Japanio la Songhu-an Armistitan Interkonsenton, kiu permesis al Japanio, sed malpermesis al Ĉinio, postenigi trupojn en la plej granda urbo de Ĉinio kaj ĝia ĉirkaŭaĵo.

Post tio, Japanio invadis Nordan Ĉinion. Okupinte Ĵehe-provincon, ĝiaj trupoj ĉirkaŭis Pekinon kaj Tiangin-on. Kiel rezulto de tiu invado estis la Tanggu-a Interkonsento subskribita je la 31-a de majo, 1933, per kio Ĉiang Kajŝek fakte rekonis la okupadon fare de la japana imperiismo al la ĉina teritorio norde de la Granda Muro.


## Heroa Longa Marŝo

En junio de 1932, Kuomintango ne nur ne faris mobilizon por rezisti la japanan invadon laŭ la postulo de la popolo, sed eĉ lanĉis la kvaran ĉirkaŭatakon al la Centra Revolucia Bazo en Gianghi-provinco per kvincent mil militistoj. Dank' al la subtenado de la popolamasoj, la Ruĝa Armeo frakasis la atakon post 8-monata senĉesa batalado.

Ĉiang Kajŝek sin turnis al la imperiistoj por helpo. Li prunteprenis grandajn monsumojn de Usono kaj Japanio, aĉetis aeroplanojn kaj aliajn armilojn kaj venigis militajn konsilantojn el Britio, Usono, Francio, Japanio kaj Germanio. En oktobro de 1933, li komencis ĉirkaŭatakon je la kvina fojo kun miliono da militistoj kaj 200 aeroplanoj.

La Ruĝa Armeo suferis grandegajn perdojn pro la tiama "maldekstra" gvido en la Partio, kiu forpuŝis la korektan gvidadon de Kamarado Maŭ Zedong kaj alprenis eraran militan politikon — pasiva defendo en la komenco kaj riskaj atakoj poste. La Centra Revolucia Bazo fariĝis ne plu defendebla. Por konservi siajn fortojn en servo al la popolo sur la kontraŭjapana batalfronto, la Partio decidis marŝi norden tra la vasta patrolando kaj kuniĝi kun la Ruĝa Armeo en norda Ŝenhi-provinco.

La 16-an de oktobro, 1934, la Ruĝa Armeo kaj la laboranta personaro de la Laborista-Kampana Registaro, entute pli ol okdek mil personoj, komencis de Ĵujĝin, Gianghi-provinco, la senkompare heroan Longan Marŝon kiu trapasis zigzagan vojon de 25,000 lioj (12,500 kilometroj). La Ruĝa Armeo trarompis kvar blokadajn liniojn, tramarsis la provincojn Gianghi, Fugian, Guangdong, Hunan kaj Guanghi, transgrimpis altajn montojn, sin turnis nordokcidenten, transmarsis la forte gardatan riveron Vugiang, kaj en januaro de 1935, ĝi konkeris la urbon Zunji, Gujĝoŭ-provinco, per siaj restantaj trupoj tiam jam reduktitaj ĝis nur 35,000 batalantoj.



*En tiu ĉi domo en Zunji, Gujĝoŭ-provinco, la Komunista Partio okazigis gravegan konferencon en januaro, 1935, mezvoje de la Longa Marŝo. Ĝi alprenis la politikon kiu kondukis la ĉinan revolucion al venko kaj establis ĝian gvidantaron estratan de Maŭ Zedong.*

En Zunji, la Partio kunvokis la historie signifoplenan Plivastigitan Konferencon de la Politika Buroo de la Centra Komitato, en kiu estis kritikita la “maldekstra” gvido estrata de Vang Ming kaj Bo Gu, kiuj blinde neis la ŝanĝigon de la politika situacio en Ĉinio post la japana invado — ili rigardis ĉiujn sektojn de Kuomintango kaj la mezvoj-anojn reakciaj sen distingo, ĉu ili estis por la rezisto kontraŭ Japanio aŭ kapitulaco al Japanio. En militaj aferoj, ili opoziciis al la opinio de Kamarado Maŭ Zedong pri gerila kaj movada milito, kaj postulis la Ruĝan Armeon tro frue kapti gravajn urbojn. Rilate al la laboro en la urboj okupataj de Kuomintango, ili opoziciis al la opinio de Kamarado Liu Ŝaŭki batali en laŭleĝaj formoj, kaj praktikis la “maldekstran” politikon agadi solaj, sin izolinte de la amasoj. Tiuj eraraj politikoj kaŭzis grandegajn perdojn al la revolucio. La Konferenco eksigis la

“maldekstran” gvidantaron kaj elektis Kamaradon Maŭ Zedong kiel gvidanton de la tuta partio. Tio ĉi estas gravega evento en la ĉina revolucia historio. Depost tiam, la ĉina revolucio ĉiam iras sub la gvidado de la granda marksism-leninisma gvidanto kaj estis garantiata al sukcesa disvolviĝo.

De la urbo Zunji, la Ruĝa Armeo daŭrigis sian antaŭenmarŝadon. Ĝi venkis ĉiujn malhelpojn naturajn kaj homfaritajn, frakasis survoje 410 regimentojn de Kuomintango, iam okupis 54 urbojn, kaj atingis sian celokon, la revolucion bazon en Norda Ŝenhi kaj kuniĝis kun la tiea Ruĝa Armeo en oktobro de 1935.

La Longa Marŝo skuis la tutan mondon. Ĝi pruvis, ke la Ĉina Komunista Partio kaj ĝia Ruĝa Armeo estas nevenkeblaj, kaj ĝi dissemis revolucion inter ĉ. 2 milionoj da popolanoj en 11 provincoj.

## La Amasa Kontraŭjapana Movado

Dume, Japanio invadis pli profunden en Nordan Ĉinion profitante la ŝancon, kiam Ĉiang Kajŝek obstine koncentrigis siajn fortojn en atakadon kontraŭ la Ruĝa Armeo. En junio de 1935, He Jingkin, la ministro de la nacia defendo de Ĉiang Kajŝek konsentis retiri la kuomintang-ajn trupojn kaj aliajn organizojn el Pekino, Tiangin kaj aliaj lokoj en Norda Ĉinio. Japanio subaĉetis nombron da naciperfiduloj intrigante la fondon de “aŭtonoma regiono” de la 5 provincoj de Norda Ĉinio, por fari ĝin fakte sia kolonio.

La 1-an de aŭgusto, 1935, la Komunista Partio de Ĉinio publikigis la Mesaĝon al la Tutlandaj Gefratoj por Rezisti Japanion kaj Savi la Nacion. La 9-an de decembro, dekmilo da studentoj en Pekino faris grandiozan manifestacion sub la gvido de la Partio. Ili laŭte kriis: “For la japanan imperiismon!” “Ĉesigu la internan militon por batali kune kontraŭ la eksterlandaj malamikoj!” Tio, kion ili renkontis estis skurĝoj, bastonoj, akvokolonoj el fajr-estingaj maŝinoj kaj glavoj de la reakciaj policanoj kaj ĝendarmoj. Pli ol ducent el ili estis vunditaj kaj dekoj arestitaj. Sed pli granda manifestacio estis okazigita je la 16-a de decembro, kiun partoprenis jam ankaŭ laboristoj kaj aliaj urbanoj.

La tuta popolo respondis al ilia agado. En ĉiuj grandaj urboj tra la tuta lando, manifestaciis studentoj kaj strikis laboristoj proteste al la japana invado. Propagandaj grupoj de studentoj iris inter la kampanojn por klarigi al ili pri la signifo de rezistado





*La Ruĝa Armeo en sia Longa Marŝo grimpas sur la Grandan Neĝ-montaron.*

al Japanio. Fondiĝis unu post la alia la Tutlanda Federacio de Studentoj kaj la Tutlanda Nacisava Federacio de Ĉiuj Rondoĵoj. Eldoniĝis svarmo da patriotismaj periodaĵoj.

La nacisava movado tra la tuta lando ree ŝanĝis la klasan staton de Ĉinio. Je la kriza momento, kiam minacis danĝerego antaŭ la nazo, la postulo rezisti Japanion disvastiĝis de inter la laboristoj, kamparanoj kaj etburĝoj, ĝis inter la naciaj burĝoj, kaj fine eĉ inter iuj el la reganta kolektivo de Kuomintango. La Komunista Partio de Ĉinio proponis starigon de vasta nacia revolucia unueca fronto, ĉesigon de la enlanda milito, intertraktadon por paciĝo kun Kuomintango kaj kunan reziston kontraŭ Japanio.

### **La Hi'an-a Incidento**

Sed la kliko de Ĉiang Kajŝek obstine sin tenis sur sia kontraŭkomunista pozicio. En decembro, 1936, Ĉiang Kajŝek flugis al la Nordokcidento por kunvoki "komunisteksterman" konferencon. Sed Ĝang Hĵue-liang, la komandanto de la Nordorienta Armeo, kaj Jang Huĉeng, la komandanto de la Nordokcidenta

Armeo, sub la influo de la tutlanda kontraŭjapana movado kaj precipe de la kontraŭjapana postulo de la soldatoj sub ilia komando, elmetis al Ĉiang Kajŝek la proponon ĉesigi la enlandan militon kaj rezisti Japanion kune kun la Komunista Partio. La 12-an de decembro, ili arestis Ĉiang Kajŝek-on, kiu ilin respondis per ordono lanĉi novan ofensivon de enlanda milito.

La kuomintanga registaro en Nankino, tenata en la manoj de projapanaj elementoj, kolektis militajn trupojn kaj aeroplanojn por ataki Hi'an-on. Nova kaj pli granda enlanda milito, kiu favoregus la japanan imperiismon, minacis Ĉinion per dispartigo. Tiun ĉi minacon forigis la Komunista Partio de Ĉinio kiu pledis por unuiĝo de ĉiuj probable kontraŭjapanaj fortoj en rezistado kontraŭ la nacia malamiko. La Partio sendis Ĝoŭ Enlaj al Hi'an por akiri enlandan pacon postulatan de ĉiuj patriotoj. Ĉiang ne povis ne konsenti pri unuiĝo kun la Komunista Partio por rezisti Japanion. La 25-an de decembro li estis liberigita kaj reiris al Nankino.

Ĉesis la interna milito, kiu jam daŭris dek jarojn, kaj en Ĉinio komenciĝis landskala patriota kontraŭjapana milito kaj nova periodo de kunlaborado inter Kuomintango kaj la Komunista Partio de Ĉinio.

\* \* \*

Dum la periodo de la Dua Enlanda Revolucia Milito de 1927-1937, la Komunista Partio de Ĉinio trapasis grandegajn malfacilaĵojn kaj danĝerojn.

*(Daŭrigo sur p. 195)*

*Pekinaj studentoj batalas kontraŭ Kuomintag-aj policanoj, kiuj atakis ilin per akvotuboj en la granda kontraŭjapana manifestacio en la 9-a de dec. 1935.*



# ĜAN TIANJOŬ—

## La Unua Ĉina Inĝeniero Fervojkonstrua

**S**-RO Ĝan Tianjoŭ estas la plej frua eminenta inĝeniero en fervoja konstruado de Ĉinio. Li naskiĝis en Nanhaj-gubernio, Guangdong-provincio en la jaro 1861, post la Dua Opia Milito. Dum sia infaneco, li ofte aŭdis propra-orele kaj vidis propra-okule pri la invadaj krimoj de la imperiistoj al Ĉinio, tial patriotismo estis defrue jam semita en lia juna koro.


En la jaro 1881, Ĝan Tianjoŭ diplomiĝis en la civil-inĝeniera fakultato kaj speciala kurso de fervoja konstruado de Yale-universitato en Usono. Reveninte al la patrolando, li ne havis ŝancon por servi al ĝi pro la korupto de la King-a Registaro. Li sukcesis enoficiĝi en la Ĉina Fervoja Kompanio kiel inĝeniero nur en 1888 dank' al rekomendo de sia amiko. Tiam la administrado kaj dungado de laborantoj de la Ĉina Fervoja Kompanio estis sub regado de britaj aŭtoritatuloj pro tio, ke ĝi prunteprenis monon de Britio. En tiaj cirkonstancoj Ĝan Tianjoŭ ne havis la eblecon efektiviĝi sian grandan aspiron oferi siajn servojn en disvolvado de ĉina fervoja trafiko.

Post la malvenko de King-registaro en la Ĉina-Japana Milito en 1895, la divers-landaj imperiismoj komencis forte luktadi inter si por rabi la rajton de fervojkonstruado en Ĉinio. Por konservi sian regadon, King-registaro decidis konstrui la Pekino-Ĝanggiakoŭ-an Fervojon per la profito gajnita el la fervojoj en kaj ekster la montpasejo Ŝanhajguan (ĉe la orienta fino de la Granda Muro). La Ĉina-Brita Kompanio, kiu reprezentis la interesojn de la brita imperiismo en Ĉinio, diris, ke la konstruado devas esti direktata ankaŭ de brita inĝeniero, alie Ĉinio ne rajtas uzi la profiton gajnititan el la fervojoj en kaj ekster montpasejo Ŝanhajguan, pretekstante ke la Pekino-Ĝanggiakoŭ-a Fervojo estas nur plilongigo de la fervojoj en kaj ekster la montpasejo Ŝanhajguan kaj pri kiuj Britio havas kun Ĉinio interrilatojn de monpruntado. Fakte Britio jam delonge deziris preni tiun fervojon en siajn manojn por efektiviĝi sian ambicion ekspansii sian agresan influon norden de la Granda Muro. Tion aŭdinte, la cara registaro de Rusio sciigis al King-registaro, ke la konstruado de la fervojo devas esti farata de rusoj, se ĝi bezonas servojn de fremdlandaj entreprenistoj, sin pravigante

per la sekreta naciperfida traktato subskribita kun ĝi de Li Hongĝang, laŭ kiu "ĉinaj fervojoj norde de la Granda Muro ne devas esti konstruitaj per aliaj landoj krom Rusio kaj Ĉinio". Ankaŭ la cara Rusio antaŭ longe havis ambicion ekspansii sian influon suden de la Granda Muro. Ambaŭ ne volis cedi unu al la alia, kaj finfine ili konsentis, ke Ĉinio konstruu la fervojon per si mem. Tiam King-registaro asignis s-ron Ĝan Tianjoŭ kiel la ĉef-inĝenieron por ĝia konstruado. Kaj tiu ĉi estas la unua grave fervojo en la ĉina historio, kies konstruado estas direktita de ĉina ĉef-inĝeniero.

Akceptinte tiun ĉi taskon, Ĝan Tianjoŭ decidis el sia arda patriotismo konstrui la fervojon nur per la propraj kapabloj de ĉinoj kaj neniam turni sin al la fremduloj por ia ajn helpo. Li klare konsciis, ke la sukceso de la konstruado signifos venkon de Ĉinio super la imperiistoj sur tereno de fervoja konstruado, kaj li tuj komencis organizi konstruan oficejon kun plena memfido.

La unua paŝo de la konstruado estis difinado de la vojlinio kaj ĝiaj esplorado kaj termezurado. Ĝan




**La 87-a serio kun 2 intajle solkoloraj pecoj emisiita (20-6-1961) de Ĉinio por memori la 90-an naskiĝan datrevenon de Ĝan Tianjoŭ.**

Portreto de Ĝan Tianjoŭ 1-285 8c.  
La Fervojo Pekino-Ĝanggiakoŭ-a 2-286 10c.



Tianjoŭ persone gvidis aron da laborantoj por la esploramezurado. Ili ekiris de Dongliu-vilaĝo de Fengtaj, preterpasis la pordegon Hiĝimen, la urbeton Ŝaho kaj atingis la urbeton Nankoŭ, post kiu ili venis al granda montaro kun altaj montkrestoj. Precipe krutaj kaj altaj estas la montoj de Gjujongguan ĝis Badaling, kie oni devis konstrui tunelojn por trapasi ilin. Post la mezurado de tiu linio, Ĝan Tianjoŭ trovis, ke en la sekcio de Guangoŭ (t. e. de Nankoŭ, tra pasejo Gjujongguan kaj montaro Badaling, ĝis Ĉadaŭceng) pro ĝia tro danĝera kruteco en topografio la kapacito de paso estos malgranda kaj la kvanto de transportado estos tre multe limigita. Li do komencis serĉi duan linion. Kiam li esplormezuris revene de Ĝanggiakoŭ al Pekino li sekvis la linion tra Huajlaj kaj Janking, kaj poste laŭlonge de la ŝoseo de Ĵehe al Pekino tra Deŝengkoŭ kaj preter la 13 Maŭzoleoj de Ming-dinastio. Kvankam tiu ĉi linio ne trapasas la krutejon de Guangoŭ, tamen ĝi estas multe pli longa, kaj krome ankaŭ ĝia deklivo ne estas malgranda, kaj ne povus esti pli facila ĝia konstruado kompare kun tiu de la unua linio. Tiam Ĝan Tianjoŭ pensis: Tiu ĉi estas la unua fervojo, kiun Ĉinio konstruas per siaj propraj laborantoj kaj rimedoj. Se oni ne elektus por ĝi bonan linion, oni ne nur plilongigus la vojlinion, pli multigus la konstruajn kostojn, kaj estus mokotaj de fremduloj, sed ankaŭ malkuraĝigus ĉinajn inĝenierojn en konstruado de fervojo. Tial li esplormezuris ankoraŭ trian linion. Tiu ĉi linio estus teknike plej kompetenta, permesante la plej grandan kvanton da trafiko, sed la tiama registaro de King-dinastio ne konsentis ĝin alpreni, ĉar malfacila estas ĝia konstruado kaj tro granda estas ĝia konstrua kosto. Finfine Ĝan Tianjoŭ devis preni la unuan linion vole-nevole.


Post la difino de la vojlinio, li mem gvidis la remezuradon de la sekcio de Guangoŭ. Kune kun aliaj laborantoj li starigis celstangojn, mezuris per teodolito, fiksas punktojn kaj faris mapojn sur kapturnaj krutegajoj. Li ofte diris al la kunlaborantoj: "Precizeco estas la unua kondiĉo por tekniko, kaj ĝi toleras neniom da necerteco aŭ malseriozeco. La vortoj "ĉirkaŭ", "proksimume" neniam devas esti dirataj de la inĝenieraj laborantoj." Kaj sub lia prizorgo, la termezura laboro de la Pekino-Ĝanggiakoŭ-a Fervojo estis farita tre detale kaj precize. Ne vanis



*Ĝan Tianjoŭ (la tria de dekstre, en la unua vico) kaj la ĉina personaro post kontrolado de la fervojo antaŭ ĝia funkciigo.*

la pena laboro de Ĝan Tianjoŭ, ĉar la de li difinita linio por la sekcio de Guangoŭ estas multe pli mal-longa ol tiu elektita de angla inĝeniero Kinder kaj cetere ŝparis konstruadon de pli ol 2,000 metroj da tuneloj. Aŭdinte, ke Ĝan Tianjoŭ direktos la konstruadon de la fervojo tra la sekcio de Guangoŭ fremdlandaj inĝenieroj diris kun malestimo ke ĉinaj inĝenieroj neniel kapablas plenumi tian konstrulaboron. Kaj iu el ili eĉ diris ke en Ĉinio ankoraŭ ne naskiĝis inĝeniero kiu kapablus konstrui fervojon tra Guangoŭ. Sed neniom malkuraĝiĝis s-ro Ĝan Tianjoŭ. Li interkonsiliĝadis kun la amaso kun humileco kaj pretigis tre precizajn blu-planojn por la konstruado. Li faris en sia koro firman decidon, ke ĉiajn malfacilojn solvu mem ni ĉinoj kaj la mokantoj estu respondataj per eminentaj atingoj en la konstruado.

La situacio de Gjujongguan estas tre alta kaj treege dika tie estas la ŝtontavolo, kaj Ĝan Tianjoŭ decidis fosi tunelon de ambaŭ finoj. La tunelo, kiun oni devis konstrui ĉe Badaling, estas trioble pli longa ol tiu ĉe Gjujongguan, kaj Ĝan Tianjoŭ decidis apliki la metodon de samtempa fosado ĉe tri punktoj, unue elfosinte laborŝakton je la mezo de la tunellinio, de kiu oni fosis en la direktoj al ambaŭ finoj. Tiam en Ĉinio estis nek teknikistoj por fosi tunelojn nek rokhakaj maŝinoj, ventolmaŝinoj kaj pumpiloj, kaj la tunelkonstruadon oni entreprenis en pluva sezono. Akvo de montpinto filtriĝis en la tunelon kaj estigis novajn kaj novajn malfacilojn al la konstruantoj. Kaj profitante tiun situacion, denove komenciĝis subfosado de la imperiistoj: la brita agento Kinder



La Kinglongkiaŭ-a "Y-forma linio" de la Pekino-Ĝanggiakoŭ-a Fervojo.

rekomendis japanan entreprenon por la konstruado (tiam Britio estis en alianca rilato kun Japanio), kaj la japana entrepreno eĉ sendis petskribon al Juan Ŝikaj, ke japanaj teknikistoj estu dungataj por tio. Sed Ĝan Tianjoŭ rigore rifuzis tiun proponon. Li elpensis diversajn rimedojn laŭ la realaj kondiĉoj por solvi la problemojn: anstataŭ pumpilojn li uzis vindasojn kaj sitelojn por drenado, kaj anstataŭ modernajn ventolilojn li instalas ventumilojn al fertuboj por enporti freŝan aeron en la ŝakton. . . .

La sekcio de Ĉadaŭĉeng ĝis Ĝanggiakoŭ ne estas tiel malfacile konstruebla kiel la Guangoŭ-a sekcio, tamen multe da pontoj devis esti konstruitaj sur la linio. Se oni ilin konstruus per ŝtalo, oni devus

(Daŭrigo de p. 177)

Kiu el la interesoj de la imperiistoj ne estas ĝuste kontraŭ tiuj de ni, escepte de iliaj lakeoj? Niaj karbunkloj estas iliaj altvaloraj, do iliaj malamikoj kompreneble estas niaj amikoj. Ili mem estas disfantalantaj kaj ne povas konservi sin plu. Por savi sin el la fatala sorto, ili malamegas la antaŭeniĝon de Sovetunio. Kalumnioj, malbenoj kaj malamo estas uzitaj ĝis la ekstremo. Kiam ĉio pruviĝas senefika, ili povas fari nenion alian ol sin prepari por atako. Ili ne povos endormiĝi antaŭ ol ĝi estos ekstermita. Sed kion ni faru? Ĉu ni estos denove trompita?

"Sovetunio estas sub la proletara diktaturo, sekve la intelektuloj nepre malsatmortos," avertis min iam

importi ŝtal-laminataĵojn el eksterlando. Sed Ĝan Tianjoŭ konstruis anstataŭ ŝtal-pontojn, arkpontojn el ŝtono kaj cemento enlande produktita laŭ la tradicia tipo kun nacia gusto kreita de niaj prapatroj. Tiamaniere, Ĝan Tianjoŭ sukcesis finkonstrui la tutan linion en malpli ol kvar jaroj per la propraj homfortoj kaj materiaj rimedoj de Ĉinio mem.

Ĝan Tianjoŭ ne nur finkonstruis la Pekino-Ĝanggiakoŭ-an Fervojon kun rimarkinda sukceso, sed ankaŭ iniciatis novaĵojn kaj kontribuis al fervojtrafiko per sia invento dum sia praktikado de fervojkonstruado. Por mildigi la deklivecon de la fervojo sur la kruta montdeklivo de Badaling ĉe Kinglongkiaŭ, li konstruigis ĉe montflanko Y-forman (retrokomutan linion) trakon por supreniri la monton unue en unu direkton kaj poste en la kontraŭan kaj tiel ankaŭ ŝparis multe da mono. Ĉar la dekliveco

de la fervojo ĉe Badaling estas tre granda, ĝi leviĝas je unu futo po tridek kaj facile dekroĉiĝas unu de alia.

Historian signifon havas la eksterordinara sukceso en la konstruado de la unua fervojo de ĉinoj mem konstruita fare de Ĝan Tianjoŭ kun la tuta laborantaro de la Pekino-Ĝanggiakoŭ-a Fervojo en la jaroj kiam la imperiistoj freneze rabis la rajton de fervoja konstruado de Ĉinio. Kaj hodiaŭ, kiam la centjara naskiĝfesto de Ĝan Tianjoŭ estas celebrata, ne nur liaj patriotaj pensoj kaj agoj, sed ankaŭ lia alta spirito de sinhelpo per propraj fortoj kaj persista klopodo por la prospero de la patrio estas kuraĝigantaj kaj inspirantaj la ĉinan popolon.

iu fame konata ĵurnalisto. Jes, tio eble ankaŭ iom maldormigos min. Sed ĉu la proletara diktaturo ne estas por la estonta proletara socio? Se vi nur ne atencos ĝin, nature ĝi efektiviĝos pli frue kaj pli frua ankaŭ fariĝos la likvido de la klasoj, kaj tiam neniu "malsatmortos". Kompreneble, atendi en longaj vicoj estas provizore neeviteble, sed pli rapidiĝos finfine.

Se la lakeoj de la imperiismo volas ataki, ili mem (!) ataku kun siaj mastroj. La interesoj de ni, la popolanoj estas tute kontraŭaj al tiuj de ili. Ni kontraŭstaras la atakon al Sovetunio. Kontraŭe, ni volas faligi la diablon kiu atakos Sovetunion, kiajn ajn dolĉajn vortojn ĝi eldiras kaj kian ajn justan mienon ili ŝajnigas.

Kaj nur tio ĉi estas nia propra vojo de saviĝo!



# Vizito al la Urbo

**M**ORGAŬ estos libertago de la komunumanoj. Kaj ĉivespere la atmosfero en la vilaĝo jam fariĝis eksterordinare vigla kaj malpeza.

Ankoraŭ dum la vespermanĝo en la komuna manĝejo, la gejunuloj jam ne plu povis sin regi, kaj prenante manĝaĵon en la buŝon, ili kriegis trans tabloj: “Kien vi iros ludi morgaŭ?” “Ĉu vi vizitos la urbon? Tre bone, ni kuniru!” . . . .

Precipe bruemaj estis la knabinoj, kies voĉoj estis plej altaj kaj ridoj plej laŭtaj. Ilia jubilado preskaŭ forlevus la tegmenton. Kaj tuj post la fino de la manĝado, ili jam forpafis sin kun seninterrompa ridado puŝante kaj tirante unu alian.

La onklinoj, kiuj estis jam aĝaj kaj malpli ludemaj, povis ankoraŭ sin regi. Nun ili kolektiĝis. Tiu ĉi diris ke ŝi iros morgaŭ al la orienta vilaĝo por viziti sian filinon, kaj tiu diris, ke ŝi iros morgaŭ al la okcidenta vilaĝo por viziti sian nevinon. . . . Rilate al la maljunuloj, ili jam de longe havis sian propran planon. Ĉimomente, kun pipo en la buŝo, ili malstreĉis iomete la zonon ekirante eksteren kaj feliĉe ŝmacante interbabilis: “Mi proponas iri en la urbon por rigardi pekinan operon. Liu Ŝengsan ludos en ‘Ribelo de Hjuĝoŭ!’” “Ha, fraĉjo, mi ne iros en vian kaptilon. Mi intencas utiligi la ferion por prilabori la legomĝardenon.”

Efektive vera estas la proverbo: “Cent personoj havas cent inklinojn kaj ĉiu sian emon.” Koncerne la porkbrediston maljuna Dongguj, ankaŭ li estis preparanta sian morgaŭan “tagordon”.

Nun li estis riparanta sub la lamplumo sian trulon, kies tenilon li rompĉis antaŭ kelkaj tagoj kiam li konstruis fornon por la Hejmo de Maljunuloj.

Antaŭ li kuŝis lia “trezorujo” en kiu troviĝis ĉiuspecaj iloj: hakilo, brikhakilo, tondilo, kanabfibroj por stuko . . . . eĉ ledrimenoj, pecetoj de kanabŝnuro, kudriloj, rompĉitaj najloj . . . . ĉio necesa.

Ĝuste tiam ekaŭdiĝis trenpaŝoj en la korto kaj tuj poste ĉe la flankenpuŝo de la pajla pordkurteno envenis alia maljunulo. Tute ne levante la kapon, maljuna Dongguj demandis: “Ĉu vi deĵoros morgaŭ anstataŭ mi, maljuna Kiu?”

Rigardante lin ripari la trulon, maljuna Kiu diris ridante kun pipo en la buŝo: “Kio? Ĉu vi pensas ke mi ne estas kompetenta por anstataŭi vin?”

Maljuna Dongguj respondis: “Se mankas rapida mulo aŭ ĉevalo, oni devas esti kontenta pri lama azeno.”

Dume iu bubalo levis la kapon ronkante. Tien rapide alkuris maljuna Kiu, kiu faris kirladon permane en la trogo kaj diris ridante: “Tiu ĉi bestaĉo estas tiel ruza eĉ en manĝado!”

“Ne atentu pri ĝi!” konsilis Dongguj. “Vidinte vin ĝi tuj fariĝas neobeema.”

Maljuna Kiu ridante alpaŝis kaj staris malantaŭ maljuna Dongguj, demandante: “Kien Via ‘Feomoŝto’ intencas vagŝvebi morgaŭ?”

“Kien alien ol iri en la urbon por viziti teatron?” respondis maljuna Dongguj.

“Mi ne kredas!” obtuze kontraŭparolis maljuna Kiu.

Maljuna Dongguj levis antaŭ sia vizaĝo la trulon kun nove alfiksita tenilo kaj atente rigardis ĝin senvorte.

“Ĉu vi iros al la infanĝardeno?” demandis maljuna Kiu.

“La ventsirma pordo de la infanĝardeno estas de longe alfiksita!”

“Al kies domo do? . . . .” ektirfumadis maljuna Kiu, enbuŝiginte sian pipon.

Forfrapinte la polvon de sur sia korpo, maljuna Dongguj ekfermis kun bruo la “trezorujon”. Post

*Dum libertago, Ĝang Fugen kaj lia edzino, komunumanoj de Ĉenŝan-produktbrigado de Ĝapu-popolkomunumo de Pinhu-gubernio, Ĝegiang-provinco, aĉetas ŝalon por sia filino. Foto de Hinhua*



tio li komencis lecioni al sia maljuna kolego. "Ve al vi! Vi laboregas de mateno ĝis vespero, sed tute ne rimarkis kiel staras la malantaŭa muro de Bingĉen."

Liaj vortoj fulme lumigis la memoron de maljuna Kiu. Efektive dum la daŭra pluvado en aŭtuno aperis sufiĉe larĝa fendo en la malantaŭa muro de Bingĉen. Feliĉe la domo ne povas fali dank' al sia fortika framstrukturo. Kaj post kiam la pluvo ĉesis, li nur ŝtopis ĝin per faskoj da pajlo kaj tio estis ĉio. "Ho jes," diris Kiu, "mi forgesis pri lia domo."

"Tio montras ke vi ne zorgas pri aliaj homoj!" laŭte diris Dongguj, ekstreĉante sian zonon. Poste li sin alturnis kaj daŭrigis ridante: "Kiel? Ĉu ni ne devas iom zorgi pri li, lasante lin tage kaj nokte cerbumadi kaj klopodadi por ĉies bono?"

"Prave, prave," diris Kiu ŝmacante. "Vi ja devus ekagi pli frue, nun la vetero jam malvarmiĝis."

"Vi parolas kun fermitaj okuloj, fraĉjo!" diris maljuna Dongguj, eksvingante sian manon. "Almenaŭ milfoje mi jam urĝis lin sole pri tio. Konjektu kio rezultigis! Ĉiun fojon li argumentis por prokrasto."

"Do vi mem ekagu!"

"Antaŭe mi pensis, ke la vetero estis ankoraŭ varma . . . sed nun, mi mem ekagos, spitante ĉu li konsentos aŭ ne."

Naive ridis maljuna Kiu kun paro da duonfermitaj okuloj. Li multe admiris la firman decidon de sia maljuna kamarado.

"Al kelkaj aferoj ja ne povas kutimiĝis miaj okuloj," plendis maljuna Dongguj al sia maljuna

*Interesa rakonto bonhumorigas ĉiujn (el Jianli-popolkomunumo de Jangĉeng-gubernio, Ŝanhi-provinco).*

*Foto de Hinhua*



kunulo kvazaŭ ekindigniĝante. "Vi scias, ke mia parolo aludas pri Bingĉen. Malgraŭ ke li aranĝas la aferojn de mil kelkcent personoj kun neniom da videbla malfacileco, li tute ne kapablas aranĝi aferojn por si mem. Rigardu, kvankam li estas nur tridekkelkjara, lia barbo estas tiel senorda kvazaŭ erinaco. La faskoj da kotontrunketoj, kiujn la produkta brigado disdonis al li, hodiaŭ ankoraŭ kuŝas sur la draŝejo."

Maljuna Kiu ekfrapis sian femuron kaj diris ridante: "Ha! Kiam mi venis antaŭ nelonge, mi aŭdis ke Bingĉen kaj aliaj kamaradoj eniros en la urbon por viziti teatron morgaŭ. Ĉu vi ne povas ekagi, utiligante la ŝancon de lia foresto?"

Post pripenso maljuna Dongguj demandis: "Ĉu vi diras ke la kadroj de la brigado eniros en la urbon por viziti teatron?"

"Jes!"

"De kiu vi aŭdis tion?"

"De la kontisto!" kriis Kiu. "Li diris ke la partia sekretario kuraĝigos per sia ekzemplo iri en la urbon por viziti teatron morgaŭ."

Maljuna Dongguj denove pripensis kaj diris skuante la kapon: "Tio estas dubinda."

Etendante la manon, maljuna Kiu diris: "Mi povas veti kun vi."

"Je kio?"

"Duonĝino da sorgobrando."

La sekvintan tagon, ĝuste kiam la homoj vestitaj en belaj vestoj elvilaĝiĝis kun siaj edzinoj kaj infanoj por eniri en la urbon, maljuna Dongguj iris al la hejmo de Bingĉen kunportante siajn brikhakilon kaj trulon. Ĵus turniĝinte preter la puto, li vidis venanta de la kontraŭa flanko Bingĉen, hodiaŭ en nova vatita supervesto, kun freŝe razita vizaĝo, kaj kun malgranda sako en la mano, verŝajne iranta al la urbo. Maljuna Dongguj ne povis ne ĝoji sekrete en la koro: "Kio? Ĉu li efektive eniros en la urbon por viziti teatron? Tion mi ja ne atendis . . . Nu, iru! Estas vere ke vi devas havi iom da ripozo."

De malproksime Bingĉen demandis: "Oĉjo Dongguj, ĉu Oĉjo Kiu iris deĵori anstataŭ vi?"

"Kia naiva knabo vi estas!" ridis maljuna Dongguj. "Kiel mi povus elveni se li ne irus?"

Rimarkinte la trulon kaj brikhakilon kiujn li kunportis kun si, Bingĉen demandis: "Kien do vi iras nun?"

"Mi faros vizitojn,," ridis maljuna Dongguj.

Bingĉen kuntiris siajn brovojn kaj diris: "Oĉjo, ĉiutage vi estas okupata. Hodiaŭ vi estas speciale liberigita de via laboro por ripozi, sed vi ankoraŭ volas labori. Kial vi ne povas bone ĝui unu tagon da libertempo?"

Maljuna Dongguj tuj rediris manskuante: "Ne parolu tiamaniere, Bingĉen! Estas dirite: 'Ĉiu





*Lignogravuraĵo de Ĝaŭ Ĝifang*

havas sian emon'. Iuj ŝatas teatraĵojn, aliaj interbabiladon. Sed mi ŝatas rondiradi por ripari, fliki aŭ alfiksi. Tia praktikado daŭris longe kaj jam fariĝis mia 'inklino'. Alie mi ne scius kien meti miajn manojn. . . ."

"Nu," ridis Bingĉen, "mi ne devigas vin forigi vian 'inklinon'. Al kies hejmo vi iras nun?"

"Vi ja scias ke mi devas fari serĉadon kaj helpon mi liveros al tiu, kiun mi trovos en bezono."

"Pri vi mi ja povas fari nenion. Faru laŭ via plaĉo!"

"Kaj kien vi iras?" maljuna Dongguj haste lin demandis. "Ĉu vi vere eniros en la urbon por rigardi operon?"

"Ĉu tio povas esti malvera? Rigardu kian veston mi portas hodiaŭ!" diris Bingĉen, montrante al sia korpo, kio multe ridigis la maljunulon.

. . . . .

Kun unu piedo interne de la pordo kaj la alia ekstere, maljuna Dongguj kriis: "Hejniu!" Respondante al lia voko elvenis la edzino de Bingĉen el la domo.

"Ha, estas vi, Oĉjo!"

Demetante la ilojn, maljuna Dongguj demandis: "Kial vi ne eliras por vin distri hodiaŭ?"

"Mi devas resti dome por fari ŝuojn," ridis Hejniu kun kunpremitaj lipoj.

"Kaj li?"

"Li iris en la urbon por rigardi operon. Ĉu vi ne renkontis lin kiam vi venis?"

"Ne," maljuna Dongguj intence ne malkaŝis la veron. Post tio li tuj donis al Hejniu ordonon: "Iru alporti ĉi tien rastilon kaj teron por prepari stukon. . . ."

"Kion vi volas, Oĉjo?"

Maljuna Dongguj sursultrigis la ŝtupetaron apogitan sur la muro kaj respondis forirante: "Vi ankoraŭ ŝajnigas nekomprenon! Ĉu vi intencas pasigi la vintron kun malfermita faŭko en la muro?" Dirinte tion, li iris kolerete el la pordo.

Je la tempo de tagmanĝo, maljuna Dongguj kun kotmakulitaj manoj kaj piedoj denove renkontiĝis kun sia maljuna kunulo en la komuna manĝejo.

"Nu?" demandis maljuna Kiu trans tablo. "Ĉu la duongino da brando liveriĝos laŭ konsento?"

"Nur diru, kiam!" respondis Dongguj kun ĝojo, eksvingante la manon.

Posttagmeze, kiam maljuna Dongguj jam ŝtopis la fendon de la muro kaj estis ĝuste ŝmiranta la muron, maljuna Kiu alvenis vektoportante du site-lojn. Starante malsupre, li kriis: "Fraĉjo, estas mi kiu devas liveri duonginon da brando!"

"Pro kio?" demandis Dongguj.

"Vi mem iru kaj rigardu! Ili estas malŝarĝantaj ĉe la manĝejo."

"Kio ja okazis?" Dongguj malpacientiĝis.

"Kio okazis? Bingĉen diris ke li eniros en la urbon por viziti teatron. Sed dumvoje li aŭdis de iu ke la rapo estas kaj bongusta kaj nutra, precipe por maljunuloj kaj infanoj. Tial li veturigis kun la kasisto po ĉaro al Giahetan kaj aĉetis du ĉarojn da rapoj."

Subite ekaŭdiĝis de malsupre sonora kaj laŭta rideksplodo, kiu kolerigis maljunan Dongguj. Frapante la ŝtupetaron per la brihakilo, li kriis: "Rido, rido, neniam finiĝos via rido, ĉu ne? . . ."

Anstataŭ respondi maljuna Kiu demandis: "Kiam vi drinkos la duonginon da brando?"

Eksvingante la brihakilon Dongguj diris: "Iru por via akvoportado! Dekomence vian vinon mi tute ne intencis drinki!" Fininte sian parolon, li glatigis la mursurfacon per laŭtaj frapoj. . . .



Ĝaŭ Fong:

## “Ni Ĵuras Defendi Nian Landon ĝis Morto kaj Ni Certe Venkos!”

**K**IAM mi aŭdis ke la dungita armeo organizita de la usona imperiismo invadis Kubon, en miaj oreloj denove eksonis la slogano: “Ni ĵuras defendi nian landon ĝis morto kaj ni certe venkos”, kiun mi aŭdis ĉie en Kubo.

Sur la placo en Havana mi aŭdis tiun ĉi sloganon, kaj ankaŭ en la provincoj Pinar del Rio kaj en Matanzas mi aŭdis tiun ĉi sloganon. Mi ne scias la hispanan lingvon, sed mi jam ellernis tiujn ĉi du hispanajn frazojn. Ili estas la unueca elkora voĉo de la tuta heroa popolo de Kubo — viroj kaj virinoj, junuloj kaj maljunuloj.

Kiam tiu ĉi slogano eksonis en miaj oreloj, tuj naskiĝis en mi la firma kredo ke la kuba popolo certe enterigos la kriman invadplanon de Kennedy, kaj sub la gvidado de ĉefministro Fidel Castro la kuba popolo certe venkos.

Kial? Mi rememoris la rakonton, kiun mi aŭdis dum mia vizito al Pinar del Rio: Hispanaj koloniistoj kaptis la lastan tribestron de la indiĝenaj loĝantoj en Kubo. Kiam tiu ĉi heroo estis brulmortigota de la koloniistoj, katolika pastro postulis lin konfesi, kaj diris ke li povos eniri la paradizon post la konfeso. Sed la heroo kontraŭdemandis: “Diru, ĉu en la paradizo estas hispano.” La pastro diris: “Jes!” Tiam la heroo diris kun malestimo: “Se en la paradizo estas hispanoj, mi preferas iri en la inferon!”

Tiu ĉi rakonto estis pentrita de artisto en grandan pentraĵon. Kiam mi estis en la granda halo de la Prezidanta Oficejo de Kubo, mi estis speciale kondukita al tiu ĉi pentraĵo. Iu kuba amiko, en milica uniformo, verŝajne gardisto de la Prezidanta Oficejo, fiere ĝin montris al mi kaj diris: “Tiu ĉi estas prapatro de la kubanoj. Ni bataladis kontraŭ la hispanaj koloniistoj por preskaŭ unu jarcento. ‘Ate’ estas lia nomo, kiu jam fariĝis la standardo de nia batalo kontraŭ koloniismo.” Estas sendube, ke la kuba popolo, kiu havas tian gloran bataltradicion, certe venkos en la justa batalo kontraŭ agreso.

Kaj nun, sub la gvidado de F. Castro la kuba popolo unuiĝas kiel giganto. Alivorte laŭ la slogano de la kubanoj: “Castro staras kune kun ni, ni do nepre povas venki!” Ĉe la festeno je

la fino de la lasta jaro celebranta la “Edukan jaron” por likvido de analfabeteco tra tuta Kubo, kelkaj kubaj gejunuloj, sidantaj ĉe la sama tablo kun mi, instruis min krei, ne, pliĝustadire, kanti tiun ĉi sloganon:

“Castro staras kune kun ni,  
Ni do nepre povas venki!”

Kun ili mi kriis ĉinlingve. Post la fino de tiu ĉi slogano, novaj sloganoj estis tuj komponitaj. Ili kantadis, kriadis, kvazaŭ ili tute ne konus lacon. Mi ne sciis kiam finiĝos la “poemo-konkurso”, se tiam ne aŭdiĝus la manklakado el la prezidantaro por bonvenigi ĉefministron Castro por paroli.


Tia popolo, ni povas firme kredi, fine gajnos la venkon en la batalado por sendependeco kaj libereco de sia patrujo, kiel ajn zigzaga estas la vojo.

.....

Kiam mi aŭdis la novaĵon ke la dungita armeo de la usona imperiismo estis tute ekstermita 72 horojn post la ekinvado, en miaj oreloj denove sonis la slogano: “Ni ĵuras defendi nian landon ĝis morto kaj ni certe venkos!”

*Estas Ne Permesite Invadi Kubon!*

*Lignogravuraĵo de Ĝaŭ Ĝifang*





# Ni Ne Plu Estos Trompitaĵoj

*Lusin (1881-1936 p.K.) estis la plej granda ĉina realisma verkisto, la fondinto de nova literaturo de Ĉinio. La jena artikolo skribita de li en 1932 malkovris kiel la imperiistoj kaj iliaj lakeoj faris, post la Oktobra Revolucio de Sovetunio, senhontaĵoj kaj stultajn kalumniojn sub la belaj vortoj de "justeco" k. a. por trompi la popolon. Kvankam jam forpasis preskaŭ tridek jaroj ekde tiam, tamen tia fenomeno kvazaŭ ankoraŭ estas antaŭ la okuloj. Tio efektive indas remaĉadon de ĉiuj legantoj.*

—La Red.



Lusin

Lignogravuraĵo de Gu Juan

**L**A imperiistoj nepre atakos Sovetunion. Ju pli prosperiĝas Sovetunio, des pli urĝe ili volas ataki ĝin, ĉar des pli rapide ili kuras al pereco.

Efektive jam tre longe ni estis trompitaĵoj de la imperiistoj kaj iliaj lakeoj. Post la Oktobra Revolucio ili ĉiam diris kiel malriĉiĝas Sovetunio, kiel kruela ĝi estas kaj kiel ĝi detruas kulturon. Sed kiel montriĝis la nunaj faktoj? Ĉu ĝia eksporto de tritiko kaj petrolo ne mirigis la mondon? Ĉu la vidalvidaj malamikoj, la estroj de la Industria Partio, ne estis kondamnitaj nur al dekjara enkarcerigo? Ja ĉiuj bibliotekoj kaj muzeoj en Leningrado kaj Moskvo ne estas eksplodigitaj, ĉu ne? Ĉu la verkoj de tiuj verkistoj kiel A. S. Serafimoviĉ, A. A. Fadeev, F. V. Gladkov, L. N. Ŝiflina, M. A. Ŝoloĥov, k. a. ne estas multe laŭdataj kaj en Okcidenta Eŭropo kaj en Orienta Azio? Pri la arto mi ne bone konas, sed laŭ la raporto de K. Umanski, sole en la 1919, okazis dudek ekspozicioj en Moskvo kaj du en Leningrado ("Neue Kunst in Russland"). Do facile ni povas imagi kiel prospera ĝi estas nuntempe.

Tamen kalumniisto estas ĉiam ekstreme senhonta kaj lerta. Kiam la faktoj pruvas ke liaj vortoj estas mensogoj, li tuj kaŝiĝas kaj venas alia aro.

Lastatempe mi legis pamfleton, kiu asertas ke la revigliĝo de usona ekonomio estas esperebla. La verkinto skribis en la antaŭparolo, ke se oni volis ion aĉeti aŭ ricevi en Sovetunio, oni devis atendi en longaj vicoj, ke la nuna stato neniom aliĝis ol antaŭe. Li parolis kvazaŭ kun justamo kaj kompatato por la personoj atendantaj en longaj vicoj.

Ke tia estas la stato mi ja kredas, ĉar interne Sovetunio estas sur la vojo de konstruado kaj ekstere ĝi estas subpremata de la imperiistoj. Nature multaj objektoj ne povas esti sufiĉaj. Sed mi ankaŭ aŭdis ke la senlaboruloj en aliaj landoj marŝas en longaj vicoj al frostiĝo kaj malsato; la ĉina popolo, sub la granda reto de internaj militoj, fremdlandaj agresoj, inundegoj kaj ekspluatado, marŝas en longaj vicoj al la morto.

Tamen imperiismo kun siaj lakeoj ankoraŭ diras al ni, kiel malbona Sovetunio estas, kvazaŭ ĝi dezirus ke Sovetunio fariĝu paradizo en palpebrumo kaj ĉiu ĝuu feliĉan vivon. Nun Sovetunio ja estas tia, tial ĝi malesperiĝas kaj maltrankviliĝas.—Tio estas vere la larmoj de diablo.

Ĉe la malfermo de siaj okuloj, ĝi tuj malkaŝis sian originalan aspekton de diablo, kaj ĝi estas ironia por puni.

Unuflanke ĝi iros por punado, aliflanke ĝi venas nin trompi. Kaj tiaj vortoj kiaj justeco, humaneco, praveco, k. a. denove flugos kaj dancos ĉie en la ĉielo. Sed ni memoras ke tiaj vortoj iam flugis kaj dancis dum la Eŭropa Milito, trompante multe da ĉinaj kulioj por iri al la fronto kaj morti anstataŭ ili kaj poste estis starigita en la Centra Parko en Pekino senhonta kaj senkompare stulta arkajo "PRAVECO VENKAS" (kiu estas aliĝita poste). Kiel estas nun? Kie estas "praveco"? Tio okazis antaŭ nur dek ses jaroj kaj ni bone memoras ĝin.

(Daŭrigo sur p. 172)

# Sur Lago Biŭa

*Dum la 28-30a de apr. de la kuranta jaro la Konstanta Komitato de la Konferenco de Azi-Afrikaj Verkistoj okazigis, laŭ propono de la Japana Kontakta Komitato de la Azi-Afrikaj Verkistoj, la Urĝan Kunvenon en Tokio, Japanio, diskutante la problemojn pri tasko de azi-afrikaj verkistoj en bataloj por nacia sendependeco, mondpaco, kaj kontraŭ imperiismo, koloniismo, pri disvolvo kaj interfluo de la nacia kulturo de azi-afrikaj landoj, kaj pri la demokratia rajto pri liberecoj de la verkistoj. La kunvenon ĉeestis verkistaj reprezentantoj el 30 landoj de Azio kaj Afriko, entute pli ol 100 personoj. Ili entuziasme kaj libere parolis laŭ siaj propraj spertoj en la batalado, kaj tio kondukis ĉiujn al unueco de la vidpunktoj. Jen estas raporto pri la agado postkunvena.*

— La Red.

## “Kanto de Marto”

**L**A 1-an de aprilo, aziaj kaj afrikaj verkistoj estis invititaj ĉeesti la memorigan paroladan kunvenon de kansai-aj verkistoj kaj aliaj rondoj de pli ol mil personoj. La fama japana poeto s-ro Ono Toojaburo faris tie la inaŭguran paroladon. Li diris: “Kiam ni kolektiĝas ĉi tie kaj mia rigardo kontaktas kun la viaj, ni klare eksciĝas kiu faras baron inter ni kaj kiu klopodas fermi nin en izolitan insulon. Tiam mi sentas en mia koro tian profundan emociion kvazaŭ mi revidus miajn gefratojn, kun kiuj mi intime pasigis la infanajn jarojn en la hejmloko. Se nur ni batalas sen ĉeso kontraŭ la malamiko, firme tenante nin brako en brako, jam de hodiaŭ unuiĝas la montoj kaj riveroj de Azio kaj Afriko. Nun mi staras sur japana monto, kie komencas degeli la neĝomasoj, kaj sentas ke la glacimonto estas en ekskuo por disfalo, mi rigardas la japanan kamparon

*La Delegitaro de Ĉinaj Verkistoj alvenis Tokion je la 24-a de marto.*

*Foto de Hinhua*



en vualo de la printempa matenruĝo kiel la dezerton de Mongolio. Se nur niaj paŝoj de batalo ritmas en akordo, ĉio estos tute natura, eĉ se ni farus la arbaron ĉe la piedo de Fuĝi-monto la densejo de Laoso, kaj la ardantan sunon sur la sudana ĉielo pribrili la ĝermojn sur salikobranĉoj apud la monto kaj rivero en la printempa Japanio.”

Ankaŭ la reprezentantoj de Laoso, Kongo, Alĝerio, Koreio k. a. prikantis per poeziaj vortoj la solidarecon kaj intersubtenon de la azi-afrikaj verkistoj kaj popoloj en la batalo kontraŭ imperiismo. La korea reprezentanto Ha Namki deklamis sian “Kanton de Marto” kiun li verkis por la Urĝa kunveno en Tokio: “Venas vi el Laoso, mi el Koreio, kaj vi de la okcidenta marbordo de Afriko, mi de la duoninsulo en orienta Azio, mi ne konas la marton en Kongo, nek la printempon en Alĝerio. Sed mi scias ke en via lando estas pli varme ol en la tropika zono, ĉar tie dum la tuta jaro forte brulas la flamoj de sango, en la varma vento ŝvebas ekscititaj krioj de la popolo soifanta sian liberiĝon. Mi ne vidis florojn de Vjetnamio, nek tiujn de Kameruno, sed mi scias sur la tero kie la popolo stariĝis jam rompinte la imperiismajn katenojn, ĉie pompas freŝruĝaj floroj, tiel ĉarmaj kiel tiuj de nia norda Koreio; marton sekvas aprilo, kaj tuj poste en la mondon venas majoj. Amikoj el Laoso! Amikoj el Kongo! Ni vidos en nia varma manpremado ke la majoj de Kongo, la majoj de Laoso estas la majoj de Koreio baldaŭ unuiĝonta, estas la tago venonta kiam via patrio akiros liberecon.”

Oni atente aŭskultis ĉiun verson kaj emociis kun ĉiu aŭdita vorto. En la tuta ejo sonas foje kaj refoje aplaŭdoj. Multaj homoj versis ĝojajn larmojn korduŝite de la atmosfero. Ĝi tute ne estas ordinara



kunveno de memorigaj paroladoj sed kristaliĝo de poemoj de la verkistoj kaj sentoj de la amaso. Oni ankaŭ povas diri ke la tuta kunvenejo mem estas emocia "kanto de marto".

## Drinki kun Intimaj Amikoj

En la vespero de la 1-a de apr., tendo el kolora tolo estis starigita en osaka restoracio Taiko-en tre antikveca en sia speco, kie la gastamaj japanaj mastroj aranĝis por la intimuloj el foraj landoj grandan drink-kunvenon. La longbarba japana poeto Hamada Tomaŭaki surpodiĝis en tondro de ĝojaj krioj, li proponis al ĉiuj drinki kaj babili el la tuta koro. De kiu tempo la poeto kreskigis sian barbon? Tio ĉi ne estas demando ordinara. Laŭ informo de japana amiko, li komencis kreskigi sian barbon kiam li partoprenis en la batalo kontraŭ la japan-usona militalianca traktato, deklarante siatempe inter siaj amikoj ke li ne forrozos ĝin ĝis la traktato kiu estas plago de Azio estos nuligita.

Ĉie en la bankedo estis kortuŝaj scenoj. Oni vidis ke tre intime babilas verkisto el Kongo kun tiu el Koreio, kun bona humoro interparolas amikoj el Kameruno kaj Vjetnamio, firme manpremas la verkistoj el Alĝerio kaj Birmo por esti fotografataj je memoro de tiu ĉi renkontiĝo. Kvankam ili esprimis sin diversmaniere, tamen la centra temo de ilia parolo estis sama, pri la signifo de intersubteno kaj la rolo de verkistoj en la batalo kontraŭ imperiismo. Ili jam ne estas ordinaraj interkonatuloj, sed intimaj amikoj en la Urĝa Kunveno en Tokio, kaj kunbatalantoj en lukto kontraŭ imperiismo. La estro de la ĉina delegacio Bakin kaj la vicestro Liu Bajju, iris kun plenaj glasoj al s-ino Khamtheng Boupha, la laosa reprezentantino, kaj sincere certigis ke la batalo de laosa popolo estas justa, kiun la 650 miliona ĉina popolo ĉiam subtenas ĝis ĝia fina venko. S-ino Khamtheng Boupha diris kun emocio: "ni estas dankaj al la ĉina popolo pro ĝia subteno al batalo de la laosa popolo. Tio plifortigis nian fidon je venko de la batalo." La parolo inter ili estas simpla kaj mallonga, sed plena de sincera amikeco.



*Ĉinaj verkistoj Liu Bajju, Jang Ŝuo kaj japana verkistino Macuoka Joko interparolas en ripoz-kambro de la kunvenejo.*



*Ĉina verkisto Bagin kaj japanaj verkistoj Oe Kenzaburo kaj Nakajima Kenzo estas ĉe la bankedo, aranĝita de la gastigantoj ĉe Restoracio Ĉinzanso je la 27-a de marto.*

Finiĝis nun la bankedo! Ĉiuj sentis ke la tempo pasis tro rapide, ili adiaŭis la gastigantojn kun malvolonto de disiĝo. Niaj japanaj amikoj kaj elmi-grintaj ĉinoj tiam ekkantis ĉirkaŭ niaj aŭtoj, kaj ne volis disiĝi dum longa tempo. Ili arde kantis la kantojn "Per girlando ligu la mondon", "Unueco estas forto" k. a. Infektite de tia entuziasmo la verkistoj ankaŭ kantadis senĉese sur la vojo. Unue la japanajn kantojn, poste la kamerunajn, la ĉinajn. . . . La kanto "La Ronda Luno" kantita en ĥoro de konga, kameruna amikoj kaj japanaj knabinoj, estas

speciale agrabla por la oreloj. La sonoj de kanto kaj rido en la aŭtoj ne ĉesis dum la tuta veturado de Osako ĝis la reveno al la Lago Biŭa.

## Lago de Amikeco kaj Solidareco

En la mateno de la 2-a de apr., Lago Biŭa demetis sian lakteblankan vualgazon kaj montris sian belan jadan vizaĝon, la montoj vekiĝis el profunda dormo, ĉerizfloroj estis elvolvantaj sin el burĝonoj. La verkistoj en siaj naciaj kostumoj iris al la lago kaj ŝipveturis al la fama Ŝtonmonta Templo.

Plenlago da printempa akvo, sukplenigis la amikecon inter la verkistoj. Ili babilis de la temo pri la pitoreskaj montoj kaj akvo kaj la sukceso de la kunveno ĝis la estonto de Azio kaj Afriko.

Li Gi, ĉina poeto speciale verkis, imitante la japanan ŭaka\*-on, "Kanton sur Lago Biŭa" por elverŝi sian senton:

*"Blue verdas l' akvo de la lago.  
Sur ĝi ni kantas brakon en brako.  
Niaj ombroj en ondetoj speguliĝas treme:  
Sendistinge de koloroj — nigra, flava, blanka,  
Ĝiu samas kante, dance kaj miene."*

Sur la supra ferdeko de la ŝipo, Liu Bajju, Hie Binghin kaj Mijake Cujako, japana verkistino, komencis sian interparolon ankaŭ ekde la lagakvo.

\* Speco de japana kanto.



*Post la malfermo de la kunveno, la gastigantoj invitis diverslandajn gastojn aprezi prezenton de la japana teatr-grupo Zenŝin-za. Sur la foto Ĉina Delegitaro kaj Sinjorino Félix Moumié el Kameruno aplaŭdas la prezentadon.*

Liu diris: "La amikeco inter la ĉina kaj japana popoloj similas je klareco de la akvo en Lago Biŭa. Ĉifoje kiam ni venis al Japanio, kvankam furiozis la neĝopluvo en la unuaj tagoj, tamen ekaperis jam printempo tuj post la ĉeso de la neĝopluvo. Ni parolis pri la printempo dum la Tokia Kunveno, hodiaŭ ni ĝuas la serenon printempon ankaŭ sur la lago." "Jes, printempo jam venis, sed la hodiaŭa vento iom forte blovas," diris Mijake Cujako. "Kvankam iom forta, tamen printempa vento ĝi estas. Hodiaŭ ni antaŭeniĝas renkonte al la vento printempa!" aldonis Liu Bajju.

La akvoj de la lago ondetas ĉirkaŭ la ŝipo, rakontante la antikvan legendon pri la Lago Biŭa: Iam la Diino de Kompato venis al la Orienta Maro, kie ŝi vidis ke demono turmentas la popolon, ŝi kompateme ellasis guton da larmo sur kordon de pibao (ĉina gitaro, kies nomo en la japana lingvo prononciĝas biŭa) kaj tuj el ĝi fariĝis la Lago Biŭa. Tamen hodiaŭ la lagakvo ŝanĝiĝis en sia naturo, ĝi ne plu estas larmo, sed lago de amikeco kaj solidareco en la okuloj de la verkistoj kiuj reprezentas la volon de la 2,000,000,000 azi-afrikaj popolanoj, kiuj batalas por sia nacia sendependeco. Dum la interbabilado de la verkistoj pri Lago Biŭa, la akvo frapetas la ŝippruon, kvazaŭ batas takton por la granda ĥoro de la kontraŭimperiisma batalo de la azi-afrikaj verkistoj kaj popoloj.



# Rememoro pri R. Tagore

**E**N la tagoj kiam la ĉinaj literaturaj kaj artaj rondoj kaj la hinda popolo varme solenas la 100-jaran jubileon de la naskiĝo de la hinda poeto R. Tagore, mi ne povas ne ekmemori pri la scenoj de mia persona interrilatiĝo kun li antaŭ 37 jaroj, kiam li vizitis Ĉinion.

En la antaŭvespero de sia alveno al Pekino, li faris paroladon al pedagogaj rondoj en Ĝinan. Ĉina verkisto Vang Tongĝaŭ interpretis por li kaj faris enkondukon: "La parolado de s-ro Tagore diferencas de tiuj de politikistoj, pedagogoj kaj oratoroj, ĝi estas kvazaŭ bela kanto aŭ rava muzikaĵo, kies belecon vi povos ĝui plene, se vi bonvolos ĝin aŭskulti atente."

Kaj ekparolis Tagore per klara kaj sonora voĉo saturita per korvarmece:


"Por mi estas tre kara via varma akcepto. La kaŭzo ke vi tiel min bonvenigas estas ŝajne tio ke mi povas reprezenti la hindan popolon. . . ."

La lingvo kiun mi hodiaŭ uzas estas nek la hinda nek la ĉina sed la angla. La lingva baro estas plej kordoloriga. Sed spite la sabloblovon vi fervore alvenis min aŭskulti. Tio atestas ke inter ni estas interkompreno nekonsciata, kvazaŭ ĉe la luno kiu verŝas lumon sur la akvon, teron kaj arbojn, kvankam silente, tamen la akvo, tero kaj la arboj havas naturan interkomprenon kun la luno kaj reciprokas simpation.

En Hangĝoŭ mi ricevis de iu amiko stampilon kiel donacon, sur kiu estas gravurita mia nomo en tri ĉinaj ideografiaĵoj. Tio tre emociis min. Por hinda infano estas du gravaj aferoj farendaj post la naskiĝo: unue doni al ĝi nomon, due doni al ĝi iom da manĝaĵo, tiel ke la infano ekhavas neforigeblan rilaton kun la socio. Sur mia stampilo estas gravurita mia ĉine tradukita nomo, kies unua ideografiaĵo estas la nomo de Taj-monto.\* Mi sentas, ke mi ŝajne havas post tio la rajton rekte kompreni la vivon de la ĉino en lia koro, ĉar mia vivo jam ne povas esti ne kunigita kun tiu de la ĉino. . . ."

La sincera kaj intimema parolo de s-ro Tagore emociis la tutan aŭskultantaron.

Inter la multaj kunvenoj en Pekino, la plej neforgesebla por mi estis tiu en la 8-a de majo, 1924. La maljuna poeto jam antaŭe elektis Pekinon kiel lokon por pasigi la 64-an datrevenon de sia naskiĝtago kaj ankaŭ ni jam antaŭe preparis la prezentadon de lia fama teatraĵo *Chitra*, por festi lian naskiĝtagon.



*Ilustrita de Sju Bejhong.*

En tiu tago la grandan kunvenejon plenigis gratulantoj. Kiam komenciĝis la soleno, la maljuna poeto enpaŝis gracie kaj eksidis en la mezo de la tria sidvico. Sidante apud li, mi havis okazon lin pririgardi detale. Li portis skarlatan lanŝtofan ĉapon kaj bluan silkan robon; profundaj estis liaj okuloj kaj alta lia nazo; liaj barbo kaj hararo brilis arĝente. Intimeman afablecon li spiris.

S-ro Liang Kiĉaŭ suriris unua la podion por fari gratulparolon, li diris:

". . . Sinjoro Tagore petis min elekti por li ĉinan nomon. Antikve la hindoj nomis Ĉinion *Ĝendan*, kiu estas, origine, nur sontraduko de ĉina, tamen la du ideografiaĵoj elektitaj por redoni la sonon havas profundan simbolan signifon. Imagu, kia aspekto ĝi estas, ke el malhela, malserena, nebuleca krepusko kun subita traskuo eklevas sin super la horizonto la brilanta suno ĵus sinlavinta en la oriento maro, vekante ĉion sub la ĉielo (la ideografiaĵo *dan* konsistas el bildo de suno super horizonto)! La nomo Tagore havas ĝuste tiujn du sencejn, estas plej bone traduki ĝin sence per la du ideografiaĵoj *ĝen* kaj *dan*. Antaŭe,

\* Unu el la famaj montoj de Ĉinio. Ĝi troviĝas en Ŝandong-provinco.

de Han-dinastio ĝis Gindinastio, la famaj saĝuloj el la okcidentaj landoj, ĉiuj havis ĉinan nomon kaj plejparte el ili prenas la landnomon kiel la familian. . . . Hodiaŭ, kiam nia respektata kaj ŝatata *tiangŭ-a* (la malnova traduko de hind-a en la ĉina lingvo) poeto pasigas sian 64-an naskiĝan datrevenon en sia amata *Ĝendan*, mi prezentas al li kun plej granda sincereco kaj ĝojo novan nomon kiu estas formita el la du landnomoj, nome: Ĝu Ĝendan (Aplaŭdego en la tuta halo). Mi esperas ke nia varma amo enkoriĝos al li por ĉiam kune kun la nomo kaj ke la malnova amo inter la hindoj kaj ĉinoj reviviĝos dank' al la persono Ĝu Ĝendan."

Tiam Tagore suriris la podion, dense ĉirkaŭ-akompanate, por responde paroli al ĉinaj amikoj. Li diris proksimume ke tiutage estas por li la plej ĝojiga tago, ĉar li ekhavas nomon simbolantan la amikecon kaj unuiĝon de la hinda kaj ĉina nacioj, ke li senlace laboros por la interkomunikigo de la kulturoj de la du nacioj, kaj ke li sincere invitas amikojn el ĉinaj akademias rondoj iri al Hindio kaj lekci en la Internacia Universitato (Visva-Bharti), kiun li fondis.

Post tio estis ludita lia fama teatraĵo *Chitra* en la angla lingvo de ĉinaj amikoj el literaturaj kaj artaj rondoj. La maljuna poeto rigardis, ridetante kaj karesante sian barbon, kaj diris al mi: "Mi esperas ke mi povos spekti vian ludadon antaŭ ol mi forlasos Pekinon." Mi tuj invitis lin rigardi je 19-a de majo mian nove surscenejigitan mitologian operon *La Diino de Luo-rivero*.

En sekvintaj tagoj la maljuna poeto kaj liaj akompanantoj Nandalal Bose, fama pentristo kaj estro de la arta kolegio de la Internacia Universitato, kaj aliaj famaj hindaj instruituloj faris unu post alia diversfakajn prelegojn en Pekino kaj trovis bonan akcepton inter la sciencistaj kaj artistaj rondoj.

Foje, mi aŭskultis la paroladon de s-ro Tagore titolitan *La Regado de Titanoj — Ekstermi la Titanojn*. Kiam li diris ke ne mallonge la aziaj popoloj estas subpremataj kaj prirabataj de okcidentanoj, jenaj liaj vortoj estis tre kuraĝigaj: ". . . Ni estis antaŭe kvazaŭ kokidoj en ovoŝelo, en kiu troviĝis ankaŭ nebuleca lumo, sed lumo treege malforta, kaj oni dubas, ĉu ni povus fine eliri el la ŝelo, sed ni mem kredas ke ni nepre eliros, krevigante la ŝelon, por atingi la kernon de la vero."

Nokte la 19-an de majo mi ludis *La Diinon de Luo-rivero* en Kajming-Teatro regale al la poeto. Mi vidis de la scenejo, ke li rekte sidas meze de logio, kun skarлата ĉapo kaj en ruĝa robo (tio estas la ceremonia kostumo de la Internacia Universitato) kaj aspektis kun sia arĝenta barbo kaj blankaj haroj kvazaŭ estulo el fe-lando. Kune sidis ankaŭ aliaj hindaj instruituloj, ĉiuj rigardis plenanime ĝis la fino de la ludado, post kio la poeto venis al la post-

scenejo por min danki, dirante: "La operon mi rigardis kun ĝojo, kaj mi impresita ekhavis kelkajn ideojn, kiujn mi diros al vi morgaŭ je renkontiĝo."

Sinjoro Tagore decidis veturi al Tajjuan per la nokta ekspreso de la 20-a. En la tagmezo de la tago, mi, Liang Kiĉaŭ, Jaŭ Mangfu k. a. aranĝis por li adiaŭan festenon. Sinjoro Tagore venis surportanta nigrajn velurajn ĉinajn ŝuojn. Mi demandis, ĉu li ne ĝeniĝis de ili kaj li respondis: "La ĉinaj ŝuoj estas molaj kaj malpezaj, donantaj nenian premon al la piedoj, do la plej komfortaj en la mondo."

Parolante pri *La Diino de Luo-rivero* dum la festeno li multe kuraĝigis min pri mia arto, sed pri la dekoracio de sceno de feinsulo li rimarkis: "La bela mitologia opero devas de ĉiuj flankoj enkorpiĝi la riĉan fantazion de la granda poeto, sed la nuna dekoracio estas kutima kaj ordinara." Li proponis: "Estu uzataj la pezaj koloroj, ruĝo, verdo, flavo, nigro, purpuro k. a. Oni por eksterordinarajn montpintojn, kuriozajn rokojn, felandajn herbojn kaj florojn, konturitajn per oraj kaj arĝentaj linioj por

#### Klpodas:

### *Homo Ekflugis al Kosmo*

*Probable hodiaŭ la tago  
Ne estas samkiel ceteraj  
Matene soveta ruĝflago  
Ekflugis al astroj ĉielaj.*

*La kosma soveta grandŝipo  
Forportis la homon ĉielen  
Kaj post la sukcesa navigo  
Denove venigis lin teren.*

*Anoncis vi pacan militon  
Al astroj kaj kosma vasteco  
Kontraŭe al imperiistoj  
Laboras vi por amikeco.*

*La nova triumfo de l' paco  
Ekblovis per spir' ordinara  
De hom' laboranta sen laco  
Por granda feliĉo homara.*

*Kaj koroj de l' homoj honestaj  
Pleniĝas je fort-emocio  
Salute aplaŭdas ni ĉiuj  
Al krea soveta genio.*



krei mitologian etoson.” Poste mi reprojktigis la dekoracion de la opero laŭ la sugesto de la poeto. Tio multe helpis en plibonigo de la dekoracio dum senĉesa retuŝado.

La maljuna poeto opiniis, ke belarto estas grava ĉenero de kulturo kaj arto, ekzemple la kostumoj, desegnaĵoj, koloroj, alivestigo, vizaĝpentrado kaj dekoracio, ĉiuj ligiĝas kun belarto. La artisto ne nur devas havi intereson kaj kapablon apreci kaj kritiki la pentrarton, skulptarton kaj arkitekturon, sed plej bone ankaŭ posedi la kapablon mem pentri kaj skulpti. Li rakontis al mi, cetere, pri sia interesiĝo pri lernado de pentrarto: “Mi ĉiam amas pentraĵojn, sed mem ne kapablis pentri. Kelkfoje, kiam mi desegnis kaj korektis sur miaj poeziaj manuskriptoj, mi trovis senatende ian pentrartan spiriton, kaj ekintencis de tio komenci lerni la pentrarton.”

Iu petis lian opinion pri la muziko de *La Diino de Luo-rivero*, ĉar, kiel sciante, la poeto estas kompetenta pri pentrarto, skulptarto, muziko kaj kantado. Sed li diris ridetante: “Kiel fremdulo alveninte Hindion unuafoje gustumanta la mangon, mi ne kuraĝas pretendi esti gusto-scianto.”

S-ro Liang Kiĉaŭ demandis, ĉu la poeto havas novajn poemojn, okaze de sia vizito al Ĉinio. La poeto respondis: “Por *La Diino de Luo-rivero* mi estas preparanta poemeton por dediĉi al s-ro Mej.” La ĉestantoj, trovante lin koncentrinta sian atenton en verkado, ĉiuj evitis lin ĝeni. Li unue faris malneton en sia notlibro, kaj poste per ĉinaj peniko kaj inko skribis ĝin sur silka ventumilo en malgrandaj literoj. La originalo estis en la bengala lingvo, kaj la poeto aldonis mem anglan tradukon kaj subskribis sian nomon kun dediĉo al mi. Krome li deklamis la bengalan originalon kun vigla humoro. Kvankam mi ne komprenis la lingvon, tamen lia dolĉe milda voĉo kaj klara ritmo elspiris la belecon de la kvieta budhisma kantikado sub la luno kaj murmurado de fonto sub floroj. Mi transprenis respekte la ventumilon el la manoj de la maljuna poeto kaj profunde lin dankis.

En la nokto ni adiaŭis lin en la stacidomo, ĉiuj estis kaptitaj de disiĝ-bedaŭro. Mi esprimis la esperon pri lia denova vizito al Pekino kaj demandis lin pri lia impresoj pri ĝi.

Li respondis: “Mi revenos post du-tri jaroj. Mi amas la simplan moron de Pekino, mi amas ĝiajn arkitekturajn objektojn, kaj la pekinajn amikojn. La speciale allogaj por mi estas la arboj en Pekino. Mi vizitis Londonon, Parizon kaj Vaŝingtonon, sed nenie mi trovis tiom da juniperoj, cipresoj, pinoj kaj salikoj kiel en Pekino. La ĉinoj rajtas fieri pri sia bela kaj longhistoria ĉefurbo, kia Pekino estas.”



*Kunveno por celebri la 100-an naskiĝtagan datrevenon de Tagore en Pekino.*

*Foto de Hinhua*

Kiam fajfis la sireno kaj la pelradoj de la trajno estis baldaŭ moviĝontaj, la poeto diris premante mian manon: “Mi esperas ke vi venos al Hindio kun via teatra trupo por ke la hinda spektantaro havu okazon aprezi vian belan arton.” Kaj mi respondis: “Mi nepre venos al Hindio por unue viziti vin, due prezenti mian modestan arton al la hinda publiko kaj trie admiri la landon.”

En printempo, 1929 la maljuna poeto reatingis Ĉinion vizitante Ŝanhajon. S-rino Song Kingling prezidis la adiaŭan solenon, en kiu estis prezentita al li aro da memorajoj el ĉinaj produktajoj, inter kiuj la serio de manfaritaj argilaj koloraj vizaĝmodeloj gajnis la plej altan ŝaton de la poeto. Sed kiam en 1935 mi haltis duontagon en Bombajo revenvoje post mia vizito al Sovetunio kaj studvojaĝo pri la teatro tra Eŭropo, mi ne povis plenumi mian promeson viziti al la maljuna poeto. Nur post la liberigo de Ĉinio la interfluo kultura de Ĉinio kaj Hindio estas vaste disvolvita. Ne unufoje vizitis nian landon hindaj kulturaj kaj artaj organizoj, kaj en vintro de 1954 la Ĉina Kultura Delegacio vizitis Hindion. Pekinaj operoj estis prezentitaj al la kvar hindaj urbegoj, Nov-Delhio, Kalkuto, Bombajo kaj Madraso, kaj rikoltis ĉe la vastaj hindaj popolamasoj varman aplaŭdon. Post sia hejmvreveno kamarado Li Ŝaŭĉun informis min ke li vizitis la malnovan loĝejon de s-ro Tagore en Santiniketan, Bengalo. Tio multe min ekstazigis je rememoro pri la poeto.

En frua printempo ĉijare, antaŭ kiam komenciĝis la jubilea aktivado honore al la 100-jaro de la poeto, mi elprenis la longe konservitan ventumilon por peti de gekamaradoj Vu Hiaŭling kaj Ŝi Ĝen eksplikadon



## La Popolkomunumo — Grandega Familio

—Popolkanto de ĥazakoj—

*La tero kaj l' ĉielo kuniĝas malproksime.  
La stepo de l' ĥazakoj vastegas tutsenlime.  
Antaŭe niaj triboj aparte ĉiuj vivis,  
paŝtadis unuope, neniam kolektivis.*

*Intime ligas sin ja l' radik', foli' kaj floro.  
La triboj parenciĝas kiel sango kun la koro.  
Jen divers-tribaj brutoj paŝtiĝas en unio,  
la popolkomunumo—grandega familio.*

**Esperantigis Laŭlum**

pri la poemo. Ambaŭ la geedzoj estas de la Belet-ristika Instituto de la Ĉina Akademio de Sciencoj, kaj la lasta laboris en la Tagore-Instituto de la Internacia Universitato por kvin jaroj, bone posedas la bengalan lingvon kaj estas fakulino pri la verkoj de Tagore.

Transpreninte la ventumilon k-dino Ŝi Ĝen atente aprezis la manskribon de la poeto. Unue ŝi laŭdis la belecon de la manskribado, kaj poste ŝi ekdeklamis la bengalan originalon, kies traduko estas jene:

*Vi, per lingva vualo,  
ho, mia kara,  
la vizaĝon kaŝadas,  
Same kiel montaro  
en for' vidbara  
nebul-gaze ŝaradas.*

Ŝi diris al mi, ke ĝi estas bengala improvizita poemeto kun tre rigora metriko majstre verkita. La bildo donita de la poemo estas kun sufiĉe da ĉina gusto. Li figure priskribis la impreson faritan de la fremdlingve kantanta aktoro kun flirtantaj manikoj en simfonio de koloroj kaj briloj. Li ĝuis la belecon, sed ne povis plene kompreni la kompleksan senton kaj psikon entenitan en la teatraĵo. Ŝi opiniis ke la poeto intence elektis tiun poezian formon kaj

klopodis kiel eble plej proksimigi sian poemon al la ĉina stilo.

Min kortuŝis plie la rakonto de la geedzoj, ke antaŭ la orienta fenestro de la halo de Tagore-Muzeo —la malnova loĝejo de la poeto— estas granda ŝranko speciale farita por konservi gramofondiskojn, el kiuj la plejparto estas de miaj operpecoj kaj tiuj de la veteranaĵ operludistoj s-ro. Tan Hinpej k. a. S-ro Rotindranath Tagore sukcesis havigi diamantan nadlon post granda klopodado por ludigi kelkajn pecojn sur gramofono kun granda trumpetforma sonlaŭtigilo. Tiuj estas malnovaj Viktoriaj diskaj kiujn mi zorge elektis siatempe kiel modestan memorajon donacitan al la poeto. La geedzoj ankaŭ vidis serion da modeloj de vizaĝ-desegnoj de la pekina opero, laŭ kiu la nevo de la poeto d-ro Abanindranath Tagore faris koloran kopion. Ĝi devas esti la donacajo de s-rino Song Kingling okaze de la dua vizito de la poeto al Ĉinio en printempo, 1929.

Kvankam la poeto forpasis jam dudek jaroj, tamen liaj sinceraj, intimemaj kaj justamaj parolo kaj agado ĉiam restas profunde gravuritaj en mia koro. Ne estas finciteblaj la ekzemploj. Se vivus ankoraŭ nun la poeto, li certe kontribuos ankoraŭ pli multe en interfluigo de la kulturoj de Ĉinio kaj Hindio.

# La Ĉasisto en Arba Oceano

**K**IAM mi estis en la Malgranda Hing'an-montaro, mi aŭdis multe da onidiroj pri la arbarpolicano Vang Giufeng. Oni diris, ke li povas ĉasakiri pli multe da bestoj dum liaj postlaboraj horoj en vintro ol ordinaraj ĉasistoj dum tuta jaro. Oni diris ankaŭ, ke ĉiu lia pafo estas celtrafa, ke nigra urso iam demetis lian ŝuon, ke aproj obeas lian ordonon. . . . Unuvorte, la rakontoj estis tiel mirindaj, ke mi ne povis ne dubi ilian kredeblecon. Sed la Jiĉun-a Ĉasista Ligo efektive iam invitis lin por prezenti sian sperton al la ĉasistoj. Ĉu la fortaj, kuraĝaj kaj rimedoplenaj ĉasistoj, kiuj jam de longe loĝas en la arbarego, povas nenial alttaksi junulon tridekkelk-jaran?

Por plenumi iun taskon, mi devis piediri pli ol 40 liojn tra primitiva arbaro. La estro de la arbarpolico sendis Vang por min gvidadi. Kaj iumatene je la fino de julio, komenciĝis mia neniam forgesbla trapaso de la arbaro.

Forlasinte la urbeton kaj transpasinte fervojeton, ni ambaŭ penetris en la verdverdan virgan arbaron. Ĵus pluvis. La aero estis humida kaj freŝa. La murmurado de fontoj, la jubila kantado de birdoj, la fajfado de fora lignon transportanta vagonareto. . . ĉio ĉi tio interplektiĝis en belegan vivecan simfonion de la arbaro. Ni interparolis dum la marŝado. Vang konigis al mi fervore la riĉajn trezoraĵojn de la arbaro: ruĝa pino (pinus koraiensis) estas materialo de traboj por konstrui domegojn, flava ananasarbo estas bona materialo por fabriki vagonojn de la trajnoj. . . . Li diris: "Enirinte la vastan arbarmaron, oni devas studi ĝiajn leĝojn: Ekzemple se vi iras supren dum la irvojo, vi devas ĉiupaŝe iri malsupren dum la revenvojo. Se vi perdis vian orientiĝon, palpu per mano la trunkojn kaj sciu ke la alsuna flanko frontanta la sudon estas pli glata, dum la pli raspa kaj muskokovrita flanko kontraŭ-suna frontas la nordon. Se vi volas trovi homojn, iru malsupren laŭlonge de rivero, ĉar la ĉasistoj kaj anoj de la arbar-esploraĵ brigadoj ĉiam starigas siajn barakojn aŭ tendojn apud akvo. . . ." Vang Giufeng konas la arbaron tiel bone kvazaŭ li kalkulus per siaj fingroj.

Subite li ekhaltis viglatente, sciigante al mi mal-laŭte ke sin trovas senkorna cervo en la distanco de cent paŝoj. Mi streĉis miajn okulojn por rigardi antaŭen, sed ĉar tiu tempo estas ĝuste la sezono

kiam "la folioj fermas la pordon", kiel diras la ĉasistoj, mi povis trovi nenion escepte la verdaj foliojn. "Mi ĵus aŭdis la spiradon de la cervo," diris Vang ridante. "Sed nun ĝi rimarkis nin kaj estas forkuranta. Kia ruza estaĵo!" Sekve nia paroltemo turniĝis al ĉasado.

Vang Giufeng estas el Vuĉang-gubernio, Gilin-provinco. Ekde sia dekkelkjara aĝo li jam komencis vivteni sin kaj sian patrinon per ĉasado. Sed, tiam li pafis maltrafe. Foje li vane forpafis ĉiom da pulvo ĝis la lasta pafo kiam li fine trafis leporon kaj nur per la mono akirita de la forvendo de leporo li povis aĉeti novajn pulvon kaj kuglojn por daŭrigi sian vivtenadon por ĉasado.





Por akiri ŝlosilon de ĉasado, li petis instruon de iu maljuna ĉasisto en la sama vilaĝo, kiu diris al li: "Sin trovas ja neniam mistera metodo de ĉasado. Bone pripensu la jenajn du aferojn: La pasero povas flugi dum la kato ne, sed la kato povas kapti la paseron. Pro kio? Sagaco! Malgraŭ oni rigardas aliloken, oni ĉiam povas dum manĝado senerare preni la manĝaĵojn en sian buŝon per la manĝobastonetoj. Pro kio? Longa praktikado!" Tiuj vortoj multe inspiris al Vang. Ekde tiam li penegis lerni kaj praktiki. De tempo al tempo li celis per neŝargita pafilo por sin trejni iam ajn, ie ajn kaj iel ajn celi senerare. Tial pli kaj pli perfektigis lia pafarto. Post la liberiĝo, li aliĝis al la arbarprotektita brigado kun sia pafilo. Depost 1950 li estas transigita al Jiĉun por protekti la arbaregon. Ekde tiam li longtempe pasigas tiun subĉielan vivon "kun la tero kiel litkuseno kaj la ĉielo kiel litkovrilo, ke li manĝas viandon kiam li malsatas, trinkas fontakvon kiam li soifas kaj apogas la kapon sur la monto kiam li laciĝas."

En senhoma arbarego oni devas esti kuraĝa kaj sagaca en agado. Dank' al praktikado Van Giufeng ellernis kiel subtila distingi la piedsignojn de diversaj homoj kaj la postsignojn de diversaj bestoj. Li kapablas rapide spioni diversajn delikatajn movetojn kaj spiradojn en arbaro. Dum la patrolado, li ĉiam salutas la unua en renkontiĝo kun ĉasistoj. La ĉasistoj diris kun miro kaj admiro: "Ha, refoje estas vi kiu la unua ekrimarkis la renkontiĝon!" Ĉar kiam renkontiĝas homo kun homo aŭ homo kun besto en la arbaro, kiu la unua tion rimarkas povas aktive alpreni taŭgan kontraŭrimedon: ĉu havi aŭ eviti intervidiĝon. Tial la ĉasistoj ĉiam konsideras kiel signon de sagaco kaj lerteco la kapablon bone sin kaŝi kaj trovi la alian flankon.

Iutage, kiam Vang estis patrolanta unuope, li trovis nigran ursegon, bruspiregante sin movantan sur dika tavolo de defalintaj folioj per pezaj malrapidaj paŝoj. Vang levis la pafilon kaj ekpafis, sed pro la balancado de la branĉoj li ne povis klare vidi kaj la pafado nur trafis kruron de la urso. La furioziĝinta urso sin ĵetis sur lin. Li denove tiris la ĉanon, sed domaĝe, la kartoĉo estis premkaptita en la kartoĉujo. Li tuj demetis la pafilon kaj grimpis sur apudan arbegon, sed la urso jam ĉirkaŭprenis lian kruron. Tuforte li baraktis por eltiri sian piedon dum la urso penis ĝin tiri malsupren, kaj la urso sukcesis nur demeti la ŝuon. Kvankam la urso kun vundita kruro ne povis grimpi sur la arbon,



tamen ĝi muĝadis kolere kaj ne volis foriri. Sidante sur la arbo, Vang ektrovis ruzon en la kriza momento. Li derompis multajn branĉojn kaj kunligis ilin en grandan bulon, kiun li ĵetis malsupren laŭ la deklivo. La nigra urso tuj ĝin postkuris en kolero. Senbrue malsupreniĝinte de la arbo, Vang prenis la pafilon, iris al la supra parto de deklivo, bruligis kampfajron, elprenis la kartoĉon kaj ŝargis la pafilon per nova kuglo. Post tio li postkuris la urson kaj aldonis alian pafon, kiu finis ĝian vivon.

Vintro estas ora sezono por ĉasado, dum kiu Vang Giufeng ofte gvidas aliajn arbarpolicanojn vigle ĉasadi por provizi al la ŝtato viandon kaj felon. Kiel ĉiuj spertaj ĉasistoj trafocertaj, li neniam kunportas multe da kugloj ĉe la eliro por la ĉasado. La kaŭzo kial li ne mispafas estas ĉefe pro tio ke li atente pristudis la kutimojn, "lingvon" kaj leĝojn de agado de la bestoj. Ekzemple, la aproj kutimas agadi kolektive. Se gardanta apro krias: "Fi!" tio signifas ke ĝi volas ke la aliaj aproj estu atentaj. Se ĝi krias "Ulu!" tio signifas ke ĝi urĝas la aliajn aprojn rapide forkuri. Vang trovis ke la aproj estas

tiel suspektemaj ke ili neniam kuraĝas transpasi la piedsignojn de homo. Utiligante tiun ĉi malfortajon, li faras tre grandan rondon da piedsignoj sur la neĝo tre malproksime ĉirkaŭ la kuŝejo de aproj kaj ie sin kaŝas. Tiam li jetas ŝtonon por eksciti la aprojn, kaj ili elkuras el sia kuŝejo por sin savi. Sed rimarkinte la homajn piedsignojn, ili tuj kuras returnen. Ĉien ili kuradas, sed ne kuraĝas elkuri el la rondo. Kaj fine ili alkuras en konfuzo antaŭ la pafilon de Vang Giufeng. . . . Foje Vang vidis apron kelkcent metrojn malproksime, kiu, kiam rigardate tra la celilo, estis tiel malgranda kiel la celgrajno. Li kalkulis ke li ne estas certa pri trafo. Do li ekpafis al la direkto kien la apro antaŭeniĝas. La kuglo levis polvan nubon antaŭ la apro kaj ĝi haste kuregis returnen. Tiamaniere Vang povis en pli mallonga distanco ĝin pafmortigi. Per tiu ĉi unika metodo li sukcesis paftrafi sinsekve kvar aprojn. Ekde tiu tempo disfamiĝis la onidiro ke aproj obeas lian ordonon kaj alkuras antaŭ lian pafilon.

Mia dubo tuj solviĝis post lia rakontado. Nun staras antaŭ mi ne plu mistera figuro legendeca, sed reala arbarĉasisto saĝa kaj kuraĝa.



## *Lagenari' Trezora*

—Popolkanto el Gansu-provinco—

Ilustris Ĝoŭ Lingĝaŭ

*Ni konstruis grandan akvorezervejon,  
versimilan al lagenari' trezora\*;  
ĝi enlasis plenan lagon da likvoro pura,  
kaj elverŝas mil buŝelojn da rizgreno ora.*

\* *Magia objekto laŭ pluraj popularaj ĉinaj fabeloj, simila al la "Fajrilo" en la fabelo de Anderson.*

KURANTAJ AFEROJ \* KURANTAJ AFEROJ \* KURANTAJ AFEROJ \* KURANTAJ AFEROJ \* KURANTAJ AFEROJ \* KUR

## *Memorigo pri la 25-jara Datreveno de la Forpaso de M. Gorkij*

La 17-an de junio, pli ol 1400 personoj el la kulturaj rondoj de Pekino kunvenis por solene memorigi la 25-jaran datrevenon de la forpaso de la granda proleta verkisto M. Gorkij. La kunveno okazis sub la prezidanteco de Maŭdun, vicprezidanto de la Ĉini-Sovetia Amikeca Asocio kaj prezidanto de la Unuiĝo de Ĉinaj Verkistoj, kiu elmontris en sia enkonduka parolado, ke M. Gorkij bataladis dum sia tuta vivo por ke la laboranta popolo, kiu suferis de subpremado, ekspluatado, kaj vivis en humiliĝo kaj mizeroj, akiru belan, feliĉan kaj vere liberan homan vivon. Kaj Liu Bajju, vicprezidanto de la Unuiĝo de Ĉinaj Verkistoj faris prelegon "M. Gorkij — la Granda Fondinto de la Proletara Literatura". Li elmontris je la fino de

sia prelego, ke M. Gorkij estas unu el la plej ŝatataj verkistoj de la ĉina popolo kaj li ludis gravan rolon en la disvolvo de la revolucia literatura movado de Ĉinio.

## *Ĝenerala Vigliĝo de Sciencaj Studoj en Ĉinio*

Senprecedence disvolviĝas sciencaj studoj en Ĉinio sub la gvidado de la principo "Samtempa disvolviĝo de cent floroj kaj konkura sin esprimo de cent skoloj", precipe lastatempe. Preskaŭ en ĉiuj universitatoj, kolegioj kaj sciencaj institucioj rezultplene viglas studaj agadoj en siaj respektivaj sferoj. Krom publikigo de siaj atingoj en sciencaj studoj sur gazetoj kaj ĵurnaloj por publika diskutato, la sciencaj studentoj ankaŭ organizis diversajn kunsidojn grandajn kaj malgrandajn por interŝanĝi opiniojn. La pristudataj temoj koncernas

diversajn branĉojn soci- kaj natur-sciencajn kaj diversaj demandoj estas starigitaj laŭ diversaj vidpunktoj rilate al tiuj branĉoj por diskutado. Ekzemple, pri historia scienco oni studis kaj diskutis pri la jenaj demandoj: La tipo kaj karakterizaĵoj de la sklava socio de Ĉinio, la transiro de la sklava socisistemo al la feŭda socisistemo de Ĉinio, kial ŝtato de centralizita aŭtoritato jam formiĝis en la frua periodo de la ĉina feŭda socio? ĉu la feŭdsinjora socio estas neevitebla etapo en la komenca periodo de la feŭda socio? kiel subdividi la periodojn de la ĉina feŭda socio? kio estas la karakterizaĵoj de la ĉinaj kamparanaj militoj? pri la naturo kaj rolo de la kamparanaj militoj de Ĉinio ktp. Kaj krome oni ankaŭ varme diskutis kaj pristudis la perioddividon de la moderna monda historio, la parizan komunumon, la kritikendecan de la *teorio de eŭropo-centralismo* ktp.



# Sur la Step' Leviĝas Nun la Eterne Brila Sun'

Poemo kaj melodio de Mejliĉig  
 Akompanaĵo de Ma Sicong  
 Esperantigita de Laŭlum

Allegretto ♩ = 96

The first system of the piano accompaniment consists of two staves. The right hand plays a melody of eighth and quarter notes, while the left hand provides a harmonic accompaniment with chords and single notes. The key signature has two flats (B-flat and E-flat), and the time signature is 2/4.

The first system of the vocal line is a single staff with a treble clef. It begins with a repeat sign and contains a melody of eighth and quarter notes. The lyrics are written below the staff.

Blan- kas nu- boj en la blu- a fir- ma- ment', su- be ku- ras ĉe- va- lar- to-  
 Se al mi tur- ni- ĝas je- na de- mand': "Ki- u es- tas ĉi- ti- u  
 La ĉi- ti- e- a- noj ar- das je am' al pa- co kaj al ka- ra la pa-  
 Pre- zi- dan- to Maŭ kaj l' Kom- par- ti', gu- ver- nan- toj por ĉi- uj

The second system of the piano accompaniment continues the melody from the first system. It features similar rhythmic patterns and harmonic support for the vocal line.

The second system of the vocal line continues the melody. The lyrics are written below the staff.

rent'. Vi- po- svin- gad' — dis- so- nas klak- krak',  
 land'?" Ĝin mi res- pon- dos kun fi- er':  
 tri' Ĝo- je ni psal- mas pri l' no- va viv',  
 ni; sur la step' le- vi- ĝas nun

The third system of the piano accompaniment concludes the piece. It features a final cadence with sustained chords in the right hand and a melodic line in the left hand.

bun-taj bir- doj flir- tas en vent'.  
 "Ĝi ja es- tas mi- a hej- ma ter'."  
 pri la ka- ra Kom- par- ti'.  
 la e- ter- ne bri- la

sun'. Sur la step' le- vi- ĝas

nuo la e- ter- ne bri- la sun'.



# Duonvazo da Salo

**I**UN tagon en oktobro de la jaro 1936, nia trupo transiris laŭ ordono de Anfu al la urbo Jiĉun. Kiam la trupo atingis la montvilaĝon Mupaj, jam estis profunda nokto kaj la vilaĝanoj jam estis en dolĉa dormo. Ne kuraĝante ĝeni la vilaĝanojn, sub la lunlumo ni mallaŭte petis iun malfermi al ni sian pordon, kaj diris al li ke ni estas la ruĝa armeo, kiu venis al ili antaŭ nelonge, kaj ke ili ne timu. Sed informiĝinte ke ni estas la foje veninta Ruĝa Armeo, tiu ĉi familio tuj invitis nin kiel parencojn en sian domon.

Malgraŭ ke ni ne volis maltrankviligi la vilaĝanojn, sed la novaĵo ke "La Ruĝa Armeo alvenis" rapide disflugis tra la tuta vilaĝo. La silenta montvilaĝo tuj vigliĝis. Multaj vilaĝanoj kuris al ni por nin saluti kaj manpremi kun ni. Iuj demandis nin, ĉu ni jam manĝis, aliaj invitis nin loĝi ĉe ili. Ĝuste kiam la homoj estis en ĝoja bruado, el la homamaso eliris maljunulo kun longa barbo pendanta antaŭ la brusto, laŭaspekte kun aĝo almenaŭ de pli ol 60 jaroj. Li sin ŝovis el la homamaso, kaptis la manon de iu batalanto kaj demandis en ne tute bona humoro: "Kiu estas via rotestro?" La batalanto ne kuraĝis tuj respondi al la maljunulo rimarkinte lian koleran mienon, kaj pensis: "Kio okazis? Pro kio li volas vidi la rotestron?" Dum hezitis la batalanto, la maljunulo demandis ankoraŭ pli malpacience: "Kiu ja estas via rotestro?"

Tiam nia rotestro sin antaŭenpuŝis tra la homamaso. Ankaŭ li ne sciis kio okazis, sed li afable diris al la maljunulo: "Avo, mi estas la rotestro, kion vi volas?" La rotestro ankoraŭ ne finis sian parolon, sed la maljunulo jam lin interrompis: "Bone, bone! Rotestro, kiu preparis manĝaĵojn lastfoje en mia domo? Tiun kuiriston mi volas vidi."

"La kuiriston?" La rotestro pensis en si: Tiu devas esti maljuna Fan? Sed li estas homo tre honesta, ĉu li. . . . Tiel pensante, la rotestro sin turnis kaj ordonis iun batalanton: "Iru rapide venigi maljunan Fan!"



Post momento la kuiristo maljuna Fan alkuris ĝojhumore tretante la helan lunlumon sur la tero, kaj demandis jam de malproksime: "Rotestro, ĉu vi vokigis min?" Sed li tuj konfuziĝis ekvidinte la rotestron, sur kies vizaĝo montriĝis nenia, eĉ plej malgranda ombro de rido, kaj apud la rotestro starantan maljunulon, kiu mienis same malkontente.

"Kion bonan vi faris, kiam vi lastfoje preparis manĝaĵojn ĉe tiu ĉi avo?" Serioze demandis la rotestro.

"Nenion ja!"

"Vi volas ankoraŭ nei?" la kolera maljunulo subite elprenis el sia poŝo nigran porcelanan vazon, metis ĝin antaŭ la publiko, kaj ripetis ĝin montrante per la mano: "Ĉu vi volas ankoraŭ nei?"

Tiam la ĉirkaŭ starantaj kamaradoj ĉiuj ekmiris kaj ekkoleris. Kiu supozis, ke tia bonkora kaj honesta kamarado malobeis la amas-disciplinon. Evidente maljuna Fan foruzis la salon en la vazo de la avo kaj tiel kolerigis lin.

"Jes, mi foruzis la duonvazon da salo en ĝi, sed avo. . . ." Kiam maljuna Fan, kun surprizita mieno, ankoraŭ volis daŭrigi, la maljunulo lin interrompis: "Avo, avo, bele vi esprimas vin buŝe, kvazaŭ samfamiliano, sed en agado. . ." Li dume ŝovis la manon en la vazon, elprenis la enhavojn kaj ĝin sternis sur la manplato: "Jen, jen. . . Ĉu tio iel konvenas al samfamiliano?" Dirante, li ŝovis la objekton al la mano de maljuna Fan.

Ni vidis klare, ke tio estas du brilantaj arĝentaj moneroj, kaj unu slipo.

Nur tiam maljuna Fan ekkomprenis la intencon de la maljunulo, li kaŝis la manojn post la dorson, retroiris kelkajn paŝojn, kaj diris ripete: "Avo, ĉu mi ne jam diris al vi, ke la Ruĝa Armeo neniam permesas al si senpage preni ion de la popolo!"

"Ej, tio ne povas esti, kial nur la Ruĝa Armeo povas fari bonojn al la popolo, kaj la popolo eĉ ne povas donaci al la Ruĝa Armeo duonvazon da salo? Mi ĉiel ajn ne povas akcepti la monon!" Vidante ke maljuna Fan retiris la manon, la maljunulo iom malkontentiĝis denove, kaj li nur ŝovis la monon al la mano de la rotestro, kaj tiu ankaŭ retiris sin paŝon post paŝo kvazaŭ evitante brulantan karbon. Sekvante la ekzemplon de la rotestro ankaŭ ĉiuj rigardantaj batalantoj retiris sin malantaŭen, formante cirklon, ĉirkaŭ la maljunulo en la centro, kaj unuvoĉe diris spontane: "Avo, akceptu vi la monon!"

# Korbopilka Teamo de Popola Komunumo



*Membroj de la teamo iras ĝojplene al la sportejo.*

**L**A vira korbopilka teamo de la urba Ruĝflaga Popola Komunumo en Ĝengĝoŭ, la ĉefurbo de Henan-provinco en centra Ĉinio, nun estas forta konkuranto por la unua loko en la urbo. En 1959, ĝi atingis la lokon en A-grupo de la urbo kaj jam de tiam konservis kaj firmigis sian pozicion.

La rapida kresko de tiu ĉi teamo de junaj korbopilka ludantoj montras la stimulon de la popola komunumo al sporto same kiel al plibonigo de produkto kaj la viv-nivelo de la popolo.

En tiu ĉi parto de la urbo estis korbopilka teamo antaŭ la stariĝo de la popola komunumo. La teamo konsistas el kelke da lokaj loĝantoj, komizoj kaj studentoj. Ili ĉiuj estis fervoraj pri la ludo, sed ili havis sian propran laboron kaj loĝis malproksime unu de la alia. Estis malfacile aranĝi tempon konvenan por praktikado. Tial ili ofte devis praktiki la sporton en grupetoj de tri aŭ kvar homoj. Nek ili

havis regulan gvidanton kaj tial ilia progreso estis malrapida. Fakte, ili sopiris al la ŝanco por esti bone trejnataj.

Ilia revo realiĝis, kiam la Ruĝflaga Popola Komunumo stariĝis dum la tutlanda antaŭensaltego de 1958. Ses membroj de la teamo eklaboris en la komunuma riparejo de elektraĵoj. Alia fariĝis transport-laboranto kaj tri aliaj aliĝis al la produkta brigado de la komunumo.

Pro la kuraĝigo de la Komunuma Komitato de la Komunista Partio, entuziasma por plibonigi la sanstaton de la komunumanoj, ĉiuj formoj de sportaj aktivadoj antaŭeniris. La malnova korbopilka teamo estis reorganizita, spertuloj estis elektitaj por gvidi ĝin kaj ĝi estis renomita la Vira Korbopilka Teamo de la Ruĝflaga Popola Komunumo.

La ludantoj havis grandan entuziasmon kaj multe da forto, sed sciis malmulte da ludtekniko aŭ taktiko. Vidinte tion, la Komitato de la Komunista Partio sendis sport-instruiston el iu mezlernejo por servi kiel ilia gvidanto.

*Sekretario de la Komunuma Komitato de la Komunista Partio (en la mezo kun ĉapo) ofte studas taktikojn kun membroj de la teamo.*





La junuloj estis ege ĝojaj. Nun ili povis kune praktiki antaŭ laboro ĉiumatene, partopreni en maĉoj je dimanĉoj kaj havas regulan trejnadon.

La unua sekretario de la Komunuma Komitato de la Komunista Partio Su Pingjen mem multe interesiĝis pri la teamo. De tempo al tempo li diskutis kun la membroj de la teamo la valoron de fizika kulturo kaj sportoj kaj helpis ilin kulturi bonan atingon al sportuleco. Li kelkfoje sin preparis eĉ aliĝi al la ĉefa stabo antaŭ konkuro kaj poste en resumado por helpi plibonigi la taktikon de la teamo.


En malpli ol unu jaro la teamo montris rimarkindan progreson. Ĝi havis plibonan kunlaboron kaj komencis lernakiri la arton de rapidaj rompoj, malhelpa ludo, zona defendo kaj aliaj taktikoj.

Tiuj ĉi junaj korbopilkludantoj estis vaste akklamataj dum la korbopilka konkurso inter teamoj de B-grupo en la urbo de Ĝengĝou en 1960. Ili montris bonan integrecon en sia ludo kaj fortan deziron je kunlaboro. Ilia venko en tiu ĉi konkurso metis ilin supren en la A-grupon. De tiam la junaj korbopilkludantoj ne nur por si mem faris rapidan progreson, sed ankaŭ helpis popularigi la ludon tra la tuta komunumo, kiu havas nuntempe ne malpli ol 15 korbopilkludantojn de viroj kaj virinoj. La tutkomunuma virina teamo faris ankaŭ grandan progreson; 13 el ĝiaj 15 membroj jam atingis la ĉionspertan nivelon de triaklasaj sportulinoj.

Tiuj ĉi junaj atletoj estas fieraj ne nur pri siaj teamoj, sed ankaŭ pri la popola komunumo, kiu prezentis novan perspektivon por la popolo en ĉiuj sferoj de aktivado.



*Ding Ŝihju estos ludanta en dimanĉa konkurso, kaj ĉiuj familianoj ĉu junaj ĉu maljunaj, pretas iri kaj rigardi la ludon.*



*Hu Ĉenling, teamestro, estas lertulo sur la pilkludejo kaj avangarda laboristo en produktado. Li ĉeestis la Konferencon de la Avangardaj Laboristoj de Henan-provinco.*

## *Analizemo*

Instruisto (al lernanto A): *Kial oni diras ke la kanibaloj estas barbaraj?*

Lernanto A: *Ĉar ili estas riĉaj je barboj.*

Instruisto (al lernanto B): *Ĉu li pravas?*

Lernanto B: *Ne. Sed ĉar ili estas baremaj.*

Instruisto (al lernanto C): *Kiu el ili pravas?*


Lernanto C: *La kanibaloj vivas en B-barbaro!*

## La Grand-urskato

**L**A grand-urskato (*Ailuropoda Melanoleucus*) estas rara animalo produktata en Ĉinio. Ĝi ankaŭ nomiĝas indiĝene blanka urso aŭ bunta urso. En la klasifiko de mamuloj, ĝi apartenas al la karnomanĝularo (*carnivora*). Ĉar ĝia aspekto kaj interna strukturo diferencas de tiuj el familioj de procio (*procyonidae*) kaj de urso (*ursidae*), ĝi estas difinita al speciala familio (*ailuropododidae*) kun sola genro kaj sola speco. La kultura invadanto, franca misiisto, pastro Davido unue trovis ĝin en 1869, en Pingvu-gubernio, Ŝiĉuan-provinco, akirinte ĝian unuan specimenon (nun konservatan en la Pariza Muzeo), kaj la mondfame rara animalo estis unuafoje science registrita.

Post tiam, laŭ haveblaj registroj, grand-urskatoj estis kaptitaj en la gubernioj Bejĉuan, Venĉuan, Songpan, Guan, Tiankjuan, Baŭhing en Ŝiĉuan-provinco, kaj en la montregiono de Ven-gubernio en Gansu-provinco. Do ilia vivregiono ampleksas de la nordo de Liang-montaro en Ŝiĉuan-provinco, de la okcidento de Dadu-rivero, de la sudo de Bajŝuj-rivero, ĝis la valo de Min-rivero, kun Kjunglaj-montaro kiel la centro. En la plifruaj geologiaj epokoj, grand-urskatoj troviĝis vaste en la sudaj provincoj en nia lando, sed nun vivas nur en limigita mallarĝa regiono. Tio estas unu el la kaŭzoj de ĝia valoro en scienco.

La grand-urskato forme similas al la urso. La matura pezas pli ol cent kilogramojn, kaj longas proksime 1.5 ĝis 1.8 metrojn, kun vosto longa nur je 0.2 metro. Ĝia korpo estas dika kaj forta, la kapo ronda, vosto mallonga, kolo dika, okuloj malgrandaj, oreloj runde obtuzaj, kaj la haregoj sur la vizaĝo ne estas tiel longa kiel tiu de aliaj karnomanĝaj animaloj. Ĝia buŝo estas mallonga, la nazpinto nuda, kaj sub la naztruoj estas transversa sulko. La antaŭaj kaj postaj membroj estas preskaŭ same longaj, havas po kvin fingrojn, kun ungoj sur la fingrofinoj, kaj la plandoj estas kovrataj de haroj. La harkoloro estas tre kurioza: la plejparto de la korpo estas laktblanka, kaj la oreloj, ĉirkaŭaĵoj de okuloj, kaj la kvar membroj, nigraj. La nigraj haroj de la antaŭaj membroj etendiĝas supren kaj kuniĝas ĉe la ŝultroj kaj dorso, formante nigran ringon.




Multaj jam vidis la grand-urskatojn sub bredado en zoologia ĝardeno. Sed kia estas ilia natura vivmaniero? Laŭ la kampa esplorado, ilia vivejo ĉiam estas en montaro, kie dense kreskas virgaj arbaroj el altaj betuloj, aliaj arboj, diversspecaj bambuoj. Havante densajn harojn sur la plandoj, la grand-urskatoj povas libere iri tra la arbaro.

La amplekso de vivsfere de la grand-urskato varias laŭ la sezonoj. Generale, ĝi vivas en lokoj 2,000 ĝis 3,500 metrojn super la marnivelo, kaj en la vintro kaj printempo, plejofte en monta regiono de malpli ol 3,000 metrojn super la marnivelo kie tute ne aŭ malpli multe akumuligis neĝo, eĉ se neĝegas iutempe, la densa bambuaro fariĝas por ĝi natura tendo. Ĝi ne havas la kutimon de vintra dormo. En la sezonoj de somero kaj aŭtuno, ĝi plej ofte vivas en lokoj de pli ol 3,000 metrojn super la marnivelo. Kiam estas varmege en somero, ĝi ofte



# Ŝtona Skulptaĵo “Inter-sopirantaj Kokoj”



EN la Fugian-provinca Salono de la Popola Halo en Pekino, estas videbla delikata kaj eleganta skulptaĵo el jade diafana Ŝoŭŝan-ŝtono “Inter-sopirantaj Kokoj”. Ĝi estas verko eminenta, pripensinda kaj ĉiam ĝuinda por la rerigardanto.

La “Inter-sopirantaj Kokoj” skulptita el Ŝoŭŝan-ŝtono, pezantaj je pli ol 20 kg. konsistas el jena bildo: Sur la supro de kloŝforma kaĝo impone staras koko kun ŝvelinta kolplumaro kaj alte levita vosto, kiu rigardas kun klinita kapo, al la kokino, enfermita en la kaĝo. Kaj al li la kokino jetas sian melankolian rigardon, kun kapo premita al la kaĝo. Ili kvazaŭ

iras al montfluejoj por trinki aŭ naĝi en ili. Krom en la periodo de generado, ordinare ĝi ne havas fiksan restadejon. Ĝi plejofte agas sola aŭ en paro, kaj ankaŭ ofte viglas dum la nokto, sed neniam atakas aliajn animalojn mem iniciate. Ĝiaj aŭd-, vid- kaj flar-kapabloj estas malpli grandaj ol tiuj de aliaj karnomanĝaj animaloj. Kiam alproksimiĝas la ĉasisto, ĝi ofte iras tute trankvile kvazaŭ nenio okazus, kaj nur kiam ĉashundo persekutas ĝin proksime, aŭ eksonas pafado aŭ krio, ĝi rapide eskapas surprizite, aŭ grimpas sur arbegon, sufiĉe lerte kaj rapidmove.

Fakte, la grand-urskato manĝas ne viandon, sed ĉefe bambuon, kio rezultas el ĝia longtempa adaptiĝado al la vivkondiĉoj. Ĝia manĝkvanto estas granda: la matura grand-urskato manĝas ĉiutagnokte almenaŭ 15 ĝis 20 kilogramojn da juna bambuo. Dum manĝado, ĝi unue demordas la supran parton de la bambuo, kaj ĝin tenante per la antaŭaj piedoj, manĝas sidanta sur la tero, aŭ ĝin manĝas irante. La junaj idoj generale prenas por si la delikatajn bambufoliojn kiel nutraĵojn. Tial, en la bambuaro

kie ili frekventis, la supraj partoj de la plejmulto de la bambuoj estas formorditaj.

Ne estas fiksa sezono de generado por la grand-urskatoj. Ĝenerale ili pariĝas en printempo, kaj naskas idojn ĉe la fino de aŭtuno, sed kelkfoje nasko ankaŭ okazas en somero aŭ aŭtuno. La periodo de gravedado estas sep monatoj kaj nur unu ido naskiĝas de ĉiu gravedo. La plej alta rekordo de la vivdaŭro de la grand-urskato sub la kondiĉoj de bredado estas 14.5 jaroj. Oni taksas ke en la montaro ĝi povas vivi ĝis 20-25 jaroj.

Ĉar la grand-urskato produktiĝas nur en Ĉinio, ĝiaj produkt-kvanto kaj -regiono estas malgrandaj, kaj ĝi okupas specialan kategorilokon en zoologia klasifiko, ĝi havas tre grandan signifon en scienco, kaj estas ankaŭ ŝatata animalo por elmontro. Tial, ĝi estas rekonata kiel rara animalo, eĉ pli valora ol tiuj aliaj famaj animaloj produktitaj en kaj ekster Ĉinio, kiaj ekzemple, la monokorna rinocero de Hindio, la sovaĝa ĉevalo, la purpura ĉamo, k.t.p. Nun, en nia lando, ĝia ĉasado estas malpermesita, por ke ĝi protektate pli bone vivu kaj generadu.



## Afrikaj Proverboj

1. Kokidon renkontante en malsato,  
Ĝentilon havi ja ne povas kato.
2. Ja neniu ŝatas danci je la sono  
de terura muĝo de Sinjor' Leono.
3. Por melki al leon' sovaĝa,  
Vi devas esti ja kuraĝa.
- 4: Ne blankas karbo kiel jado,  
Eĉ post per-akva prilavado.

estas komunikantantaj unu al la alia sian ĉagreniĝon kaj malkontenton pri la malica mastrino kiu disigis ilin kaj malhelpis ilian amvivon per la kaĝo. Apud la kaĝo staras ankaŭ kelkaj aliaj plumabundaj kokoj, kun levita kapo kaj ŝvelinta kolplumaro, kiuj atente rigardadas al la inter-sopirantaj geamantoj. Ĉirkaŭ la kaĝo viglas kelkaj kokidoj, insektojn serĉantaj. Ĉiu el la kokoj kaj kokidoj en la skulptaĵo estas plenplena tiel de emocio kiel de viveco.

Estas interesa historieto pri la kreo de la skulptaĵo. Ĝia aŭtoro Ĉen Ginghiang estas juna metiartisto en urbo Fuĝoŭ. Antaŭ la Liberiĝo de la lando li estis lernanto en iu razejo kaj li komencis lerni la skulptarton nur post la Liberiĝo. Dank' al la prizorgo kaj kulturado de la Komunista Partio, li progresis tre rapide en sia arto. Li ŝatas skulpti kokojn kaj li ofte observadis ilian vivon kun granda atento kaj intereso.

Foje, Ĉen Ginghiang preterpasis antaŭ pordo de iu senhoma korto, kie kelkaj kokoj, kun ruĝa kresto kaj pompaj plumoj sin trovis en intensa interbatalo kun etenditaj flugiloj. Li haltis kaj atente observis ilin. Tamen momenton poste, la kokoj iris en la domon kaj malaperis. "Kluk—kluk—kluk!" li ekvokis ilin imitante la geston de grenŝutado, kaj tiel denove ilin ellogis. Tamen tiam elvenis ankaŭ iu avino, kiu trovis la junulon iom stranga kaj singardeme enkovris la kokojn per kloŝforma kaĝo. Tiu okazintaĵo inspiris al Ĉen Ginghiang: la kokoj volas liberecon, sed la mastrino ilin enkaĝigis. . . . Ĉu tio ne estas bona kaj vere interesa temo por artkreo? Kaj li tuj komencis la komponadon kaj skulptadon de la verko. Unue li skulptis el ŝtonpeco plektitan kaĝon kaj poste muntis en ĝi kokinon el alia ŝtonpeco. Neniu povas rimarki ke la skulptaĵo konsistas el pluraj pecoj se li ne renversas la soklon de la skulptaĵo.

Tiu skulptaĵo gajnis laŭdon ĉe ĉiuj rigardantoj por detala esploro. Sed la kreinto ne kontentis pri ĝi. Li pensis ke estus pli bone se ĝi estos elskulptita el unu ŝtonbloko. Do li komencis refojan skulpton, preparinte al si kompletan da specialajn skulptilojn por

ajurgravurado kaj sukcesinte trovi belan diafanan ŝtonblokon. Dekkelkajn fojojn li malsukcesis, tamen li neniom deprimiĝis. Humile li lernis de malnovaj metiartaj majstroj, kaj daŭrigis sian skulptadon, aplikante la metodon de spirado per ventro por konservi plej grandan kvieton. Unue li elskulptis la ĝeneralan konturon. Poste, per speciala hokĉizileto li elgravuris la ajuraĵon, parton post parto, de maldekstre al dekstre, kaj de supre al malsupre kaj per la ĉizileto enŝovita tra la ajuraĵoj de la kaĝo li elskulpti malnetan figuron de la kokino en la kaĝo.


Skulptante tiamaniere, oni ĉiam devas esti ege singardema je ĉiu tuŝo, ĉar la Ŝoŭŝan-ŝtono ne estas tiom firma kiom la eburo kaj facile rompebla kaj difektebla ĉe ĉiu eta mistuŝo. Tial Ĉen Ginghiang devis streĉe laboradi kvindek aŭ sesdek tagojn gravurante tavolon post tavolo kaj li povis spiri malpeze nur kiam el la ŝtono, pezanta je kelkdek ĝinoj, jam formiĝis la malnetaĵoj de la diverspozaj kokoj, ĉiuj kun sia aparta aspekto. Dum la lasta polurado de la skulptaĵo, Ĉen Ginghiang sternis sur siaj genuoj vatitan litkusenon kaj metis la skulptaĵon sur ĝi por eviti eventualan difekton. Krome, por ke la skulptaĵo ne estu frotita de la manikoj, laborante li ĉiam vestis sin nur per subŝtofito vesto kun malvastaj manikoj eĉ dum frostaj tagoj. Li skulptas singarde uzante la forton de la pojno kaj dum prilaboro de la plej delikataj partoj de la verko tute retenigita estis lia spiro. Dank' al lia granda persisteco fine pretiĝis tiu majstra skulptaĵo. La verko de la juna metiisto estis ekspoziciata ĉe la Tutlanda Konferenco de la Rezentantoj de Maljunaj Metiartistoj okazigita en Pekino, 1957. La veteranaj metiartistoj tre alte taksis ĝin kaj donis al ĝi la titolon kiel supre nomita.



(Daŭrigo de p. 169)

Tra la enpartia batalo, unue kontraŭ la dekstra likvidismo de Ĉen Duhju, kaj poste kontraŭ la vojlinio de la "maldekstraj" aventuristoj, sinizola de la amasoj, la Partio atingis maturecon en politiko. La Partio disvolvis interkampanan laboron, fondis revoluciajn bazojn kaj gvidis la kampanojn fari agraran revolucion, por poste sieĝi kaj okupi la urbojn per la revolucia kampano. La Partio starigis ĝustajn politikan kaj militan vojliniojn por gvidi la popolon fari revolucion militon.

Jam havante la fortan marksism-leninisman gvidon estratan de Maŭ Zedong kaj la milfoje harditan Ruĝan Armeon, la Partio estis sukcese plenumanta por la popolo novan taskon, t. e. gvidi la Ruĝan Armeon kaj la laboristojn, kampanojn, studentojn, etburĝojn kaj naciajn burĝojn tra la tuta lando unuiĝi en nacia revolucia fronto por rezisti la japanan invadon—mobilizi la tutan popolon leviĝi por sindefendo.




## Ĉinstilaj Pentraĵoj sur Ekranano

**O**KAZE de la Juni-unua Festo de la Infanoj prezentigis en Ĉinio pluraj novaj ĉinaj pentraĵfilmoj. La plej multe ŝatataj el ili estas la filmoj "Ranidoj Serĉas Panjon", "Hontema Oriolo" kaj "Hirundeto".

Belega estas la filmo "Ranidoj Serĉas Panjon", por kiu oni aplikis ĉinstilan pentromanieron kaj tiel vivigis sur la ekrano majstrajn inkopentraĵojn de la fama ĉina pentristo Ki Bajŝi. Ĉiu sceno el la filmo prezentas ĉarman bildon kaj ilia serio impresas al la rigardantoj kvazaŭ ili vizitus belartan galerion. La karakteroj en la filmo estas pli palpeblaj ol tiuj perlinie desegnitaj: la ranidoj montriĝas molaj kaj glataj, la kokidoj lanugecaj kaj iliaj moviĝoj naturaj kaj facilaj. La ranidoj ja ne havas organon por esprimi siajn sentojn, sed la filmo-artistoj lerte esprimis iliajn

delikatajn sentojn sin helpante per ŝanĝo de iliaj vicformoj kaj la ritmo de ilia naĝado. Vidinte la kokidojn promenantaj sekvante sian patrinon, la ranidoj alnaĝis kaj kolektiĝis ĉe la bordo en transversa vico, kvazaŭ ili rigardadus ilin tre envie kaj aspire. La ranidoj forlasas la bordon nur post kiam la kokidoj iris malproksimen, kaj ilia malrapidema naĝado tiam reliefe prezentas ilian ĉagreniĝon je la penso, ke ili ne havas kun si la patrinon, kaj ili devas serĉi la patrinon. Ili do tiel faris. La unua, kiun ili renkontas survoje, estas la granda salikoko, kiu diras al ili: "Via patrino havas paron da grandaj okuloj." Ili trovas la orfiŝon, kaj tiu ĉi diras, ke ilia patrino havas blankan ventron. Kaj ili trovas la kankron. La kankro diras, ke ilia patrino havas kvar piedojn. . . . Tiel do







# Viviĝas

la malgrandaj ranidoj tranaĝas la lotuslagon de Ki Bajŝi, gvidante la spektatorojn pririgardi la boskojn de akvoherboj kaj sagitarioj, la petolantajn kokidojn apud glicinia laŭbo sur la bordo, la vigran, facilmovan fiŝaron kiu ĉesas post peco da falinta petalo, la maltrankvile baraktantan ranon kies piedo implikiĝis en akvoherbo... ĉiuj ĉi tiuj scenoj el famaj pentraĵoj ricevis vivon kaj ekmoviĝis.

“Hontema Oriolo” estas filmo dolĉega. Ĝi rakontas pri malgranda oriolo, kiu scipovas bele kanti, tamen ne kuraĝas ektrili antaŭ la publiko pro hontemo. Ŝia patrino kaj avo Blankkapa Maljunulo (populara nomo de sturno) elpensis ruzon, per kiu ili devigis ŝin hardiĝi tra diversaj provoj. Fine la malgranda oriolo kuraĝiĝis iom post iom. Ĝi regalis la spektatorojn dum sia

foj-refoja kantado per agrablaj melodioj ebriigaj. Kaj same dolĉa estas la figuro de la malgranda oriolo kun helflava korpo, grandaj nigraj okuloj kaj korala beketo. Dum la ĝuado de ĝiaj freŝaj kaj delikataj koloroj kaj melodioj, vi sentas kvazaŭ ĝi per la lanugaj flavaj plumoj tuŝetadas vin ĉe la nuko kaj vi ekridetas elkore.

La historio de la “Hirundeto” legiĝas jene: Dorlotita hirundeto ne plenvolorigas alies laborfruktojn kaj senzorge forĵetas insektojn kaptitajn kaj alportitajn de la patrino. Por ĝin eduki, panjo-hirundo sendas ĝin mem kapti insektojn. Post luktado kontraŭ malfaciloj, finfine ĝi ekkomprenas kial oni devas valorigi laborfruktojn. Tiu ĉi estas filmo same edukiva kiel la “Hontema Oriolo”. Tradicie ĉinstilaĵo estas ĝia pentraĵaro kaj tre freŝiga kaj plaĉa por la okuloj.



## Nova Filmo “La Vivo de Lusin” en Vigla Preparo

Lusin estis granda moderna literaturisto, pensulo kaj revolu-

ciisto de Ĉinio. Li havis profundan influon al la ĉina moderna literaturo. Por honori la 25-an datrevenon de la morto de tiu standardoportisto de revolucia kulturo, la prepara laboro por la produkto de la kolora filmo *La Vivo de Lusin* estas nun vigle farata.

La scenaro de la dirita filmo estas pretigita de la grupo formita de fama dramverkisto Ĉen Bajĉen kaj aliaj 5 verkistoj. Por bone plenumi sian taskon, la reĝisoro, la ĉefaj aktoroj kaj scenaristoj vizitis antaŭ nelonge k-don Ĝoŭ Gianjen, la plijunan fraton de Lusin, la hejmlokon de Lusin en Ŝaŭhing, Ĝegiang-provinco, kaj ili vizitis en Pekino kaj Ŝanhajo ankaŭ lian vidvinon Hju Guangping kaj tiujn kiuj bone konas la siatempajn ĉirkaŭulojn de Lusin. Ili pristudis respektive ankaŭ la lokojn, regionojn menciitajn en liaj verkoj kaj liajn ŝatatajn teatraĵojn ktp. Por bone koni la pensojn de Lusin kaj krei pli verproksiman figuron de li, la aktoroj krom klopodi bone informiĝi pri lia vivo en diversaj periodoj faris ankaŭ profundan studon pri liaj verkoj.





# Esperanto Marŝas

## SOVETUNIO

**Dimanĉa kunveno en Moskvo regule okazas** — Esperanto-sekcio ĉe la Centra Kulturdomo de medicinistoj en Moskvo regule aranĝas sian dimanĉajn kunvenojn en la dua kvaronjaro de 1961. En la programo troviĝas: prelegoj de *Sanprotektado en socialismaj landoj*, *Sano de l' mondo kaj Esperanto je servo de medicino kaj sanprotektado*. Krom la kutimaj programeroj kiel ni informis en lasta numero funkcias ankaŭ perfektiga grupo sub gvidado de Prof. E. Bokarev kaj aktoro N. Rytjkov. K-do Nguyen Van King, vjetnamia ambasadoro en Sovetunio, raportis en aprilo *Renkontiĝoj en Rumanio kaj Albanio, vojaĝo al Jemeno*. K-do I. Voleviĉ prelegis en majo *Esperanto — la lingvo de paco kaj progreso* kaj D-ro K. Lavrentjev, vicprezidanto de la sekcio, raportis *Kiel ni laboras? Rezultoj kaj perspektivoj de agado en Esperanto-sekcio ĉe la Centra Kulturdomo de medicinistoj*.

**Esperantista Asocio fondita en Kaliningrado** — Je la unua de aprilo ĉijare fondiĝis en Kaliningrado, port-urbo ĉe la bordo de Balta Maro, Kaliningrada Esperantista Asocio. Samtempe en la Domo de Instruistoj ekfunkciis esperanto-kurso. Ĝin partoprenas 80 lernantoj.

Smitti Ark

## POLLANDO

**Esperanto, deviga lernobjekto, en 50 lernejoj** — Laŭ informo de Varsovio dum la sekvonta lerneja jaro 1961-1962 Esperanto estos instruata en kvindeko da lernejoj en Pollando kiel deviga lernobjekto en la 5-aj kaj 8-aj klasoj, kaj en lernejoj por instruistoj.

IGS/471

**Esperanta programo de Pola Radio ĉiutage** — Radio Varsovio disaŭdigas ĉiutage de la horo 16.30 ĝis la 17.00 laŭ mezeŭropa tempo duonhoran programon en Esperanto sur jenaj ondoj:

mallongaj:	25.06 m (11970 kc/s)
	25.28 m (11865 kc/s)
	25.42 m (11800 kc/s)
	31.01 m (9675 kc/s)
	31.45 m (9540 kc/s)
	31.50 m (9525 kc/s)
	42.11 m (7125 kc/s)

kaj sur la meza 249 m (1205 kc/s). Krom ĉiutagaj novaĵoj ĝi fiksas por si konstantajn elsendojn en ĉiu tago de la semajno kiel jene:

**Lunde:** Felietono pri politika, socia, ekonomia, kultura, ofte ankaŭ priesperanta temo; ĉiun duan semajnon: Scienca Tribuno.

**Marde:** Vortmuzika elsendo prezentanta polan muzikon kaj muzikistojn; ĉiun unuan mardon de monato: Anguleto por blindaj esperantistoj.

**Merkrede:** Kultura kroniko kaj koncerto kun bondeziroj.

**Ĵaŭde:** Komentario de Observanto pri aktualaj temoj kaj Leterkesto, en kiu la Redakcio respondas al leteroj de aŭskultantoj.

**Vendrede:** Literatura rubriko. Vi trovos en ĝi felietonojn pri polaj kaj esperantaj verkistoj, fragmentojn el la esperanta literaturo originala kaj tradukita kaj ankaŭ eseojn pri literaturaj temoj.

**Sabate:** Sonrevuo — La semajno en Pollando, kiu entenas sonigitajn raportojn pri tutpollandaj okazintaĵoj en la koncerna semajno.

**Dimanĉe:** Panoramo de internaciaj eventoj en la koncerna semajno kaj esperantista maga-

zino. Sub la verda stelo, intervjuaĵojn, recenzojn, esperantajn kanzonojn kaj rubriketon por infanoj titolitan Koboldo.

## HUNGARIO

**Kunveno de veteran-esperantistoj en Budapeŝto** — Laŭ informo en n-ro 3-a de *Hungara Esperantisto*, je la 22-a de januaro Hungara Esperanto-Asocio aranĝis kunvenon de veteran-esperantistoj el diversaj partoj de la lando en la kulturdomo de Pesterzsebet. Ĉeestis proksimume 150 veteran-esperantistoj, kvankam multajn el ili la asocio ne povis inviti pro manko de aktuala adresaro.

En la kunveno, k-do Frigyes Nemes, ĝenerala sekretario de la asocio, raportis, ke la Partio metis la novan asocion sub patronado de la Sindikata Konsilantaro, kaj informis pri parto de la nuna laboroplano, ekzemple eldono de monata informilo kaj kvaronjara ilustrita revuo kaj fondo de ses kursoj en la lando por pedagogoj, fondo de centra biblioteko ktp. Post la kunveno oni ĝuis belajn muzikon, deklamojn de Baghy kaj Kalocsay, tagmanĝon kaj viglajn babiladojn. Ĉiuj partoprenintoj estis treege ĝojaj kaj kortuŝitaj pro la sukcesa renkontiĝo.


**Prelego de k-do J. Kiraly** — Nia malnova hungara amiko k-do J. Kiraly skribis al ni, ke lasttempe li faris prelegon en la Hungara-ĉina Esperanto Amikeca Rondo, kies prezidanto li estas. La temo estis lia vojaĝo en la mondo, precipe en Ĉinio. Ĉeestis 60 membroj de la rondo.

**Fervojista Terminara Komitato Hungara fervojista mondo** informis en sia unua numero, 1961, ke fondiĝis Fervojista Terminara Komitato en Hungario. Ĝi konsistas el 10 membroj. Ĝi jam komencis laboron prepari esperanta-hungaran fevojistan terminaron laŭ la kvinlingva vortaro eldonita de la Internacia Unio de la Fervojoj.

## ĈEĤOSLOVAKIO

**Kunsido de Ĉeĥoslovaka Esperanto-Komitato** — La 4-an kaj la 5-an de februaro okazis plena kunsido de ĈEK. Ĝin partoprenis reprezentantoj de Ministerio por Instruado kaj Kulturo, de Kleriga Instituto de Praha kaj Bratislava kaj de Parko de kulturo kaj ripozo en Brno. Oni pritraktis i.a. proponojn pri la konsisto de la nova komitato SEK kaj SET, la kvinjaran eldonplanon, la vojaĝojn eksterlanden, ktp.

**Esperanto utiligota de Internacia Foiro en Brno** — De la 10-a ĝis la 24-a de septembro ĉijare okazos la III-a Internacia Foiro en Brno, Ĉeĥoslovakio. Ĝi montras ĉefe teknikan progreson ne por milito sed por feliĉa vivo de la homaro. La Foira Oficejo uzos ankaŭ Esperanton en la laboro. Eksterlandaj esperantistoj povas ricevi specialan invitilon en Esperanto, kaj oni povas peti pluajn informojn pri vizito de la Foiro.



*Internacia Foiro en Brno.*

**Koncerto honore al D-ro L. L. Zamenhof** — Esperantista Rondeto ĉe Parko de Kulturo kaj Ripozo en Brno okazigis sabate la 15-an de aprilo, 1961 je la 19.30 horo en la salono de Konservatorio en Brno rememoran koncerton honore al D-ro L. L. Zamenhof. En ĝi oni prezentis kantojn, harmonosolojn kaj organsolojn.

## JAPANIO

**Amikoj de Nova Azio** — En novembro lastjara en Japanio organizigis nova esperantista organizo "Amikoj de Nova Azio" por amikiĝo, kulturinterfluo kaj internaciismo inter aziaj landoj nove akirintaj sian sendependecon. Ĉirkaŭ 30 pioniraj samideanoj

aktive iniciatas la aferon, kaj ili estas vaste subtenataj de la japanaj esperantistoj. La unua numero de ĝia organo *Amikoj de Nova Azio* jam aperis en februaro. Samideanoj Eguĉi, Tagasuki, Tamaki, kaj Micujsi estas elektitaj kiel ĉefa estraro de la organizo. Nun la movado estas energie antaŭenpuŝata inter japanaj esperantistoj.

## ITALIO

**Nova organizo por praktiko de Esperanto** — En aprilo la esperantistaj grupestroj en Italio kunvenis en Milano por fondi Centron por enkonduko de Esperanto en Komerco, Industrio kaj Turismo (C.E.K.I.T.) Ĝia tasko estas

duobla: profiti la ĝisnunan disvastigon de Esperanto en la internaciaj medioj kaj uzi ĝin en la internaciaj rilatoj, kaj helpi ĉiam pli ĝian enpenetrigon en ĉiujn branĉojn de la moderna vivo.

La unua servo de C.E.K.I.T. estas la eldono de *Adresaro de Firmoj Kiu uzas Esperanton*. Ĝi entenas kelkajn centojn da adresoj, racie dividitaj laŭ firmoj, fakoj kaj varoj, nacioj. Nun oni pretigas la duan eldonon de la *Adresaro*, kiu, krom reklamoj kaj anoncoj, enhavas ankaŭ teknikan terminaron. Eldono de dokumentoj kaj broŝuroj estas ankaŭ planata. Estas petataj ĉiuj samideanoj subteni la iniciaton kolektante pliajn nomojn de entreprenoj scipovantaj Esperanton por la dua aperonta *Adresaro de Firmoj Uzantaj Esperanton*. Ĝia adreso: Centro por enkonduko de Esperanto en Komerco, Industrio kaj Turismo, Piazza Oberdan 1, Milano, Italio.

## Enigma

1. *La plej ordonema sono.* (Geografia nomo)
2. *Besto kiu ĉiam preĝas.* (Ia homo)
3. *Ve en paco.* (Ia sinteno)
4. *Remi malbone.* (Kutimo de bovoj kaj ŝafoj)
5. *Daŭra maĉo* (Ia skribilo)

(Solvaj sur p. 205)

## Venas la Floranta Epoko de la Naciaj Lingvoj

*Jen artikolo pri internacia kaj nacia lingvoj, sendita de k-do Bérci Darázs el Rumanio. La temo estas interesa kaj aktuala speciale nun, kiam la imperiisma, koloniisma regado kolapsas mondscale, kaj liberigo de malgrandaj nacioj fariĝas jam torento rompanta ĉion kiu ignoras la rajton de la malgrandaj nacioj. Ĉu Esperanto, kiel internacia lingvo, koincidas kun fluo de tiu torento? Kia estas ĝia tasko kaj estonto en tiu ĉi epoko? Tio estas pripensinda kaj diskutinda por ĉiuj esperantistoj. Tial tiun ĉi artikolon ni publikas ĉi sube kun iom mallongigo, kvankam en apartaj punktoj ni ne tute samopinias kun la verkinto.*

—La Red.

I. Ĉe la fino de la pasinta jarcento estis preta la internacia lingvo. Sur interpopola tereno per Esperanto la gestanta simi-homo iĝis: kulturhomo, sin facile esprimanta.

Do estis kreita la reala bazo por la interkompreniĝo. Sed ne estis preta la tekniko por ebligi amasan renkontiĝon el malproksimaj landoj. La unua porpersona aertrafiko nur komenciĝis de 1919.

II. Hodiaŭ la saltanta evoluo de la tekniko najbarigas la popolojn kiuj ĝis nun vivis tre malproksime unu de la alia.

La distancon inter Kopenhago kaj Tokio hodiaŭ oni povas fari tra la norda poluso flugmaŝine dum 20 horoj. Sed ĉi dudekhoran daŭron reduktos la tekniko de jaro al jaro.

Do kreiĝis la reala bazo ankaŭ por la renkontiĝo inter la popoloj foraj.

III. Kvankam multe evoluos ankoraŭ la tekniko kaj ankaŭ Esperanto, tamen la interkompreniĝo kaj la eblecon de amasa renkontiĝo oni povas konsideri solvitaj.

Sed okaze de la renkontiĝo levas sin alia problemo:

Kion diros la popoloj unu al alia?

Kion diros ili pri si mem?

Kion respondos je la demando: kiu vi estas?

Per kio vi kontribuis aŭ povas kontribui originale al la valoroj de la universala kulturo?

Je la supraj demandoj apenaŭ povas respondi multaj, precipe la popoloj de Afriko kaj Azio.

Ili ne konas sin, ne konas sian nacian kulturon, ĉar ĝi estas kovrita, premita de tavolo plurjarcenta de fremda influo kolonia.

Ĉi tiun lingvan kaj ekonomian tavolon skuas de sur si antaŭniaj okuloj multaj popoloj en Afriko. Ili reakiras sian liberecon per forta amas-movado, kiu estas arde nacia kaj pasie internacia.

La nacia karaktero de la movado signifas, ke ĝi ĉesigas la koloniismon ekonomian kaj lingvan. La popoloj volas paroli sian propran lingvon kaj vivi sian nacian kulturon, samtempe ili volas krei rektan interrilaton inter si. Ili volas ekkoni alian popolon kaj konigi sian nacian kulturon al la tuta mondo.

Ili povas fari hodiaŭ jam rektan interrilaton, ĉar la tekniko ebligas la renkontiĝon, Esperanto la interkompreniĝon, sed por povi konigi sian nacian kulturon ili devas ĝin pli profunde studi, ol ĝis nun. Ili devas antaŭe ekkoni sin.

Ĝis nun tio estis neebbla pro la lingva koloniismo, kiu manifestiĝis precipe en la malnova lingva instruplano. Ĝis la dua mondmilito la plimulto de la studentoj ĉe la filologia fakultato eĉ en Eŭropo lernis tre ofte tri fremdajn lingvojn (unu kiel ĉefobjekto plus du kiel flankaj objektoj) kun la koncerna literaturo. Ili ne

havis tempon por la kvara: la patrina lingvo. Sed estis pli peziga situacio, kie la ŝtata kaj patrina lingvoj malsamis. En tiaj ŝtatoj la patrina lingvo estis la kvina lingvo. Imagu, kia tempeto restis por la nacia kulturo.

La nova epoko, kiun estigas kaj certigas la movado de la popolamasoj, rifuzos la ĝisnunan lacigan kaj humiligan programon. Ĉiu homo devas profunde ekkoni sian nacian kulturon kaj por ĉiu studento de la filologia fakultato la ĉefa objekto devas esti la patrina lingvo, la dua Esperanto kaj la tria laŭ libera elekto unu el la orientaj aŭ hindoeŭropaj aŭ afrikaj lingvoj.

Por realigi la supre diritajn ni bezonas novan instruplanon por la filologia fakultato de la universitatoj.

La skemo de la nova instruplano por la filolog-studentoj devas esti la jena:

20% de la tempo por unu orienta aŭ hindoeŭropa aŭ afrika lingvo.

20% de la tempo por Esperanto kaj

60% de la tempo por la baza lingvo: la nacia.

*Novaj elementoj:* Neniu lingvisto ekzistu en la mondo, kiu ne lernis sian patrinan lingvon kiel ĉefan objekton. Tio ĉi estas la garantio por ekfloro de nacia kulturo, kiu forigas la danĝeron de kosmopolitismo.





# Sur Nia Librobreto

(Ni recenzas nur el libroj poduekz-e ricevitaj)

**Hungara Vivo** — Finfine aperis tiu ĉi revuo eldonita de Hungara Esperanto Asocio, longe sopirata de ĉiuj esperantistoj. Kun granda ĝojo kaj ĝuo mi ĝin finlegis unuspire tuj post la ricevo. Ĝi ja ne trompas la sopiron de la esperantistoj. La formato (20.5 × 28.5 cm.) estas plaĉa, papero bonega, ilustraĵoj riĉaj kaj plejnotinde la enhavo diverskolora kaj la lingvo altnivela. Ĝi konigas al la legantoj ĉiuflanke la socialisman Hungarion: la kulturon, la artan kaj literaturan agadon, la konstruadon, kaj ankaŭ la naturan ĉarmon de tiu ĉi mezeŭropa lando, por ke oni rekte komprenu la hungaran popolon kaj ĝiajn klopodojn. Literaturaĵojn, ĉu originalajn, ĉu tradukitajn, la revuo ne neglektas. Jam en la unua numero oni povas legi la talentajn tradukojn de nia esperanta poeto K. Kalocsay kaj novan kanton de J. Baghy, la du ĉefaj kunlaborantoj de la revuo.

La valoran kontribuon de niaj hungaraj kamaradoj al esperanta literaturo oni ĉiam memoras. Kredeble ili nun en la nova kampo kaj kun nova energio faros pli grandan kontribuon.

Kiel celo alta kaj nobla, fiksita de la revuo kaj ankaŭ esprimita en la artikolo *Antaŭen* de la kamarado Ministro Stefano Kossa estas “la ideo de paca kunekzistado de la popoloj”, “la ĝenerala malarmado” kaj fine “la daŭra paco”. Tian entreprenon aprobas kaj partoprenas certe ĉiuj bonintencaj esperantistoj.

Nun la revuo estas kvaronjara, sed ĝi promesas, ke ĝi fariĝu baldaŭ dumonata aŭ eĉ monata. La abonkotizo estas 24 Forintoj. Ne perdu la ŝancon legi la unuarangan esperantan revuon kaj sendu tuj la abonon al **Hungara Esperanto Asocio, Budapeŝt. V. Petofi S. utca 17, Hungario** aŭ peti de ĝi informon pri la abono.

H. F.

## **Kantoj por la Paco** —

kolekto de 36 originalaj kaj 11 tradukitaj poemoj de Canko Murgin. 40 p., formato 8 × 12.5 cm. Eldonita de Sveda MEM-sekcio, Box 109a, Deje, Svedio. Prezo 1.60 sv. kr.

Jen estas poŝformata poemareto dediĉita al PACO kaj ESPERANTO. Canko Murgin, nia porpaca kunbatalanto, ne estas fanatikulo por Esperanto; li ĝin amas, ĉar li trovas ĝin bona ilo por paco. Li estas optimisma rilate al la venko de paco kaj progreso. Li estas certa, ke la militinstigantoj fiaskos. Tamen li atentigas nin, ke novan militon preparas usonaj agresistoj, ke la mondon minacas atomaj kaj hidrogenaj bomboj. Per malamo-saturitaj epitaĵoj li kondamnas la ekspluatistojn, monopolistojn kaj koloniistojn kies ekzisto kaj fiagado ja estas la vera kaŭzo de la militoj. La poeto vokas, ke ĉiuj pacdefendantoj unuiĝu kaj agadu, por ke paco

Neniu lingvisto ekzistu en la mondo, kiu ne konas perfekte Esperanton. Ĝi estas la garantio de facila internacia rilato, kiu forigas la danĝeron de troa naciismo.

Jen por kultur-homo la perfekta ekvilibro!

La tasko estus la plena ellerno de la patrino kaj Esperanto kun la koncerna literaturo. Ĉe la tria lingvo la tasko estus la akiro de la ĝenerala kono por lingvokompara scienco aŭ por povi ellerni la respektivan lingvon pli rapide,

se ĝi fariĝas posta vivcelo. La hindoeŭropanoj kiuj volas perfektigi en lingvokompara scienco elektos por tria lingvo orientan lingvon, se ili deziras trarompi la ringon de unuflanka lingvokono, ĉar Esperanto same estas laŭ karaktero hindoeŭropa.

Tri fremdaj lingvoj, krom la patrino, estas tro multaj por ordinara homo. Anstataŭ tri fremdaj lingvoj restu nur du, el kiuj Esperanto estas facila kaj la alian oni ne devas finlerni en universitato. *Sed krom belarta literaturo* ĉiu studento devas

okupiĝi pro la revolucia progreso de la tekniko *kun unu branĉo de industrio* el lingvistika vidpunkto.

La kono de teknika terminologio larĝigas la ĝisnunan skalon de instruplano pri lingvistiko.

Per ĉi tio la nova instruplano iĝos pli larĝa, sed samtempe pli malpeza, pli nacia kaj pli internacia.

Bela estas la flora kampo. . . ., sed pli bela estas: la universala kulturo de la homaro, konsistanta el la kolora mozaiko de la naciaj kulturoj.

prosperu sur nia tero. Kvankam C. Murgin ne klare montris al ni kiel oni devas agi por forigi la monopolistojn, koloniistojn, forigi la veran kaŭzon de milito, kaj tiel efektivi longdaŭran pacon sur nia tero; tamen lia malbeno al la militinstigantoj jam bone esprimis lian fortan deziron, ke ni batalu kontraŭ imperiistoj kun la usonaj ĉe la kapo. La 11 esperantigitaj poemoj de N. Hikmet, A. Surkov, Ĥ. Smirnenski, N. J. Vapcarov k. a. estas veraj majstroj kaj multe plivalorigis la poemaron donante al la legantoj veran ĝuon beletristikan. Kvankam la versaĵoj de C. Murgin iom abundas je adasismo, tamen ili atestas ĝenerale pri granda lerteco en versfarado. Ankaŭ mi opinias, ke senprudentigaj laŭdoj fare de recenzantoj povas nur malhelpi la progreson de la verkintoj, sed mi ne povas min deteni de konfeso kaj konfirmo, ke k-do C. Murgin jam sukcesis aldoni al la literatura ĝardeno de Esperanto novajn florojn de paco, kvankam ne pompegajn kaj forte bonodorantajn, tamen ili ja atestas pri diligenta laboro kaj sincera amo al paco kaj la lingvo internacia. Mi kredas, ke certe multaj amikoj ilin aprezos kun ĝuo kaj danko kaj sincere deziras plifruktodonan kaj pli sukcesan verkadon al la aŭtoro.

V. K.

### **La Geedzoj A Fu** —

tri rakontoj de To Hoai pri la Taj-nacimalplimulto en la aŭtonomia regiono TAJ-MEO. Broŝuro 200-paĝa, formato 13 × 19 cm., eldonita de la Fremdlingva Eldonejo, Hanojo, Vjetnamio, prezo ne montrita.

La tri rakontoj min gvidas en la montaron de nordorienta Vjetnamio. Altaj montoj, profundaj valoj, vaporantaj fontoj, arĝentaj torentoj, bonodorantaj arbaroj, buntaj floroj, viglaj simioj, mildaj cervoj kaj diversaj birdoj. . . la pitoreska hejmloko de vjetnamaj nacimalplimultoj rememorigas al mi la ĉarmajn scenojn el la ĉina kolora filmo "Kvin Orfloroj" (legu pri ĝi en E. P. Ĉ.

1960 n-ro 4) pri la nova vivo de la laboremaj ĉinaj baj-nacianoj. La rakontoj vive prezentas al ni, ke ankaŭ la nacimalplimultoj de Vjetnamio estas tre laboremaj. Ili strebas plenenergie por servigi al si la riĉfontojn de la naturo. El iliaj senlacaj manoj kreĝis la "raj"-oj (rizkampoj sur montdeklivoj), dometoj el ŝtono kaj ligno, bundaj naciaj kostumoj kaj diversaj muzikiloj, kiujn scipovas kaj ŝategas ludi kaj viroj kaj virinoj. Kaj el iliaj sentemaj koroj naskiĝis la sennombraj polkantoj kaj popularaj dancoj. Kiel ardaĵ felico-serĉantoj ili sin prezentas en sia "Tet"-festo, pri kiu la aŭtoro donis al ni sufiĉe detalajn bildojn. Ili penlaboregis kiel la abeloj, sed ne povis ĝui la labor-mielon memproduktitan. Ilia ĉiutaga trinkaĵo estis la absintaĵo de mizero kaj sufero, ĉar sur ili pezegis la subpremo de la servut-mastroj, la "Tej"-oj (t. e. la francaj koloniistoj) kaj iliaj lakeoj. Sub la ungegoj de procentegisto-vilaĝestro Ĉong Laŭ, junulino Mij devis penlaboradi kiel bubalo kaj ĉevalo, ploradi tra nigraj noktoj dum monatoj kaj por ne kaŭzi plian malfeliĉon al sia aĝa patro, ŝi eĉ ne povis sinliberigi de la inferaj suferoj per memmortigo! Kaj la forta kaj kapabla junulo A Fu estis torturita de Ĉong Laŭ preskaŭ ĝis morto. La koloniistoj prirabadis la montvilaĝanojn ĝis vera nudeco kaj forbruligis iliajn domojn kaj grenplantaĵojn por ilin koncentrigi al siaj garnizonejoj, ke la "kan-bo"-oj (t. e. gerilanoj) ne estu de ili gastigataj kaj sekvataj. Sed malgraŭ la minacoj per karcero, torturado kaj eĉ morto, la popolanoj frate interrilatiĝis kun la popolliberigaj gerilanoj sub la gvido de Onklo Ho, kaj bataladis kun ili ŝultron ĉe ŝultro kontraŭ la koloniistoj kaj puparmeanoj. Veran heroismon la popolanoj montris en siaj luktoj. La popolo havis en sia mano nur tranĉilojn, arbalestojn, ŝtonpafilojn, ŝtonojn kaj aliajn similajn primitivajn armilojn, dum la koloniistoj havis maŝin-

pafilojn, kanonojn kaj aeroplanojn. Sed ĉi lastaj same kiel ĉiuj semantoj de malamo kaj morto, povis rikolti nur malamon kaj morton. Venkbatite de la geriltrupoj, ili forkuraĉis preskaŭ nur en kalsono, forjetinte la "tropezajn" ferkaskojn, duonbotojn kaj eĉ pantalonojn, kaj ili lamentis kvazaŭ ĵus perdintaj sian patrinon. "Muong Ĵon", la plej longa el la tri rakontoj, bone ilustras la tezon, ke imperiismo kaj ĉiaj reakciuloj estas paper-tigroj.

La esperanta traduko de k-do Ngujen Minh Kinh estas facile legebla, kvankam plia poluro kaj rafinado en lingvouzo kaj stilo povus fari la formon pli taŭga al la enhavo. Mi trovas la libron rekomendinda al ĉiuj esperantistoj, kiuj deziras akiri scion pri la vivo de unu el la plej malmulte konataj popoloj sur nia tero kaj vere deziras liberon, demokration kaj progreson al ĉiuj popoloj tra la tuta mondo.

(Li Ŝizun)

### **Topaze kaj La Ŝipego "Tenacity"**

— du dramoj de francaj verkistoj Marcel Pagnol kaj Charles Vildrac respektive. Ilin esperantigis el la franca lingvo Roger Bernard kaj eldonis STAFETO. 22.5 × 15 cm., 292 paĝoj, prezo 2 US\$.

Tute hazarde mi tralegis tiun ĉi libron el la bel-literatura eldonserio de STAFETO. Kiel menciite ĝi konsistis el du dramoj *Topaze* kaj *La Ŝipego "Tenacity"*. Laŭtipe la unua estas komedia kaj la lasta psikologia. Do ili iel reprezentas du el tri tradiciaj formoj de francaj dramoj kaj ambaŭ estas ĉefaj verkoj de ties aŭtoroj. Tamen pri la lasta mi volas nenion diri. Ĉar dramo en tia formo ofte pretendas enpenetron de la homa spirito, sed fakte diras nenion. Unuvorte ĝi faris harfendadon ĉe iaj bagatelajoj kaj oni apenaŭ povas trovi el ĝi ian socian signifon. Tial nun mi volas min limigi nur pri la unua, t. e. *Topaze*, la debuta ankaŭ majstra verko de Marcel Pagnol.

La historio de la dramo ŝajne estas simpla. Iu licea instruisto Topaze honeste plenumis sian laboron en la Pension-lernejo Muche, li instruis moralon al la lernantoj kaj ankaŭ li mem tion severe observis, sed li ricevis la edukadan ordenon nur "spirite". Kaj fine eĉ pro honesteco li estas forĵetita el la lernejo. Tuj poste li falis en la manon de iu politika fripono Castel-Bénac, kiu utiligis sian politikan agadon por sia propra profito. Topaze fariĝis, nur pro sincera amo al iu belulino, pajlohomino de Castel-Bénac servante la politikan friponon per sia propra nomo imagante, ke li agas kvazaŭ iu kavaliro sindonante por savi la belulinon. Sed ho ve kiel li disreviĝis, kiam li trovis, ke la belulino estas nur konkubino de la politika fripono kaj neniam povos lin ami! Li estis des pli afliktita pripensante, ke tiel grandajn malhonestajojn li faris pro tio. Li ege ĉagreniĝis kaj preskaŭ freneziga.

Tamen fine li trovis, ke en la kapitalisma socio la malhonoraĵoj

estas tute normalaj, kaj per tio oni ricevis honoron kaj riĉon, kiujn la honestuloj neniam ricevis. Ekzemple li mem post dekjara humila sindono en la lernejo ne ricevis la edukadan ordenon, sed post kiam li fariĝis malhonestulo, Castel-Bénac sukcesis ĝin propeti por li! Antaŭe li kredis, ke "riĉo feliĉon ne donas", sed nun li vidis, ke "mono povas ĉion fari, ebligas ĉion, donas ĉion", kaj plie, neniu povas puni la malhonestulon, kiu havas monon. Li do "lernis grandan instruon" kaj plene konvertiĝis al sia nova metio — la friponado. Kaj fine li sukcesis eĉ superi Castel-Bénac-on forĵetinte lin el la entrepreno kaj primokante lian nanecon en friponado. Oni povas vidi, ke la dramo estas ne nur komedio sed fakte tragedio. Kiel ni ofte diris: la malnova socio faris homojn diabloj.

Ja nenion novan el la kapitalisma socio malkaŝis la dramo, kaj eĉ tro pesimisma, ke en la dramo eĉ la lasta persono, kiu post Topaze ankoraŭ kredas je

honesteco kaj konscienco, estas enkondukota en la marĉon. Tamen kun granda lerteco la aŭtoro artisme kaj figure prezentis la socion antaŭ la publiko ke oni ĝin primoku. Ĉiuj personoj en la dramo estas reliefe karakterizitaj. Ĝi povas de tempo al tempo rikolti rideksplodojn de la spektantaro, kaj kun pensiga efekto. El la simpla historio la aŭtoro sukcesis formi streĉajn intrigojn, ke la legantojn atendas ĉiam nova neatendita evoluo. Do la enhavo kaj la dramaturgia arto ambaŭ destinas ĝian sukceson.

La traduko estas farita de Roger Bernard, lerta kaj sperta franca esperantisto. Ĝi estas bela kaj flua, oni apenaŭ sentas tradukecon en la tralegado. En kelkaj lokoj ĝi eĉ sukcesis plene montri vulgarecon de la paroloj. Freŝajn kaj relieffajn esprimojn oni ofte trovas. Komprenoble kelkloke trudiĝis ankaŭ trofrancis-maj vortoj. Entute la libro estas rekomendinda kaj enhance kaj lingve.

Honfan

Canko Murgin:

## *La Lasta Aspiro de la Partizano*

*Postmorte mi revenos  
por ĝui sub la sun',  
simile al la greno  
semita en aŭtun'.*

*Samkiel ĝi fieras  
dum kresko en printemp',  
mi ankaŭ reaperos  
en la estonta temp'.*

*Mi kreskos en la arboj  
plantitaj kun plezur',  
mi vivos en la farboj  
de bildoj el natur'.*

*Mi kreskos kaj aŭskultos  
la kanton de l' arbar'  
pri la bataloj multaj  
de l' monda proletar'.*

*Fortondros la ribelo,  
disfloros la liber' —  
triumfos nia celo:  
Justeco kaj la Ver'!*

*Gefiloj — tre felitaj. . . .  
Ja en aŭtun-maten'  
de manoj fortoriĉaj  
rompiĝis la katen'.*

*Kaj hom' libera fortas,  
Li estas nur venkant' —  
en kor' li sunon portas,  
en lipoj sonas kant'.*

*Li bridos eĉ vulkanon,  
ventegon jungos li —*

*per sia forta mano  
fulmeĝojn kaptos li.*

*Li plugos dum la tago  
sur Mars' aŭ Jupiter',  
vespere kiel sago  
li flugos al Vener' . . .*

*Li tie nur promenos  
kaj en malfru-vesper'  
denove li revenos  
al la patrino — Ter'.*

*Sen havi dian benon  
la vivo estos vers' . . .  
Konstruos li edenon  
tra tuta Univers'.*

*Ho, certe mia nepo  
kaj ĉiu homa frat'  
kunkantos al birdpepo  
kaj rajdos sur la Fat'.*





# Kurantaj Aferoj



## Celebro de la Centjaro de R. Tagore

La hinda poeto Robindranath Tagore estas ne nur elstara reprezentanto de la hinda kulturo, sed ankaŭ sincera amiko de la ĉina popolo. Jam de sia junaĝo li interesiĝis pri ĉinaj aferoj. Pere de tradukaĵo li konatiĝis kun ne malmultaj ĉinaj klasikaj literaturaj kaj filozofiaj verkoj. Dufoje li vizitis Ĉinion kaj pledis por studo pri la kulturo de Ĉinio. En Ĉinio li akiris multajn amikojn kaj multaj el liaj verkoj estas konigitaj al la leganta publiko de nia lando. Por memori la centjaran naskiĝdaton de tiu monda kultura eminentulo, la Ĉina Popola Literatura Eldonejo eldonis ĉijare 10-voluman Elektitan Verkaron de R. Tagore en la ĉina lingvo. La triono de la verkoj en ĝi estas nove ĉinigitaj unuafoje. Speciala komitato estis organizita de la kulturaj rondoj de Pekino por organizi la solenadon de la jubileo de s-ro R. Tagore, kaj la 15-an de majo okazis en la halo de la Politika Interkonsiliĝa Konferenco en Pekino solena memoriga kunveno, kiun ĉeestis pli ol mil laborantoj el literaturaj, artaj kaj kulturaj rondoj, kaj prezidis k-do Maŭdun, konstanta komitatano de la Komitato por Defendo de Mondpaco de la Ĉina Popolo kaj vicprezidanto de la Ĉina Federacio de Literaturaj kaj Artaj Rondoj. En tiu kunveno, speciala parolado estis farita de s-ro Gi Hianlin, fakultatestro de Orientaj Lingvoj de la Pekina Universitato, pri la verkista vivo kaj literaturaj atingoj de s-ro R. Tagore. Samtempe kun la memoriga kunveno, okazis ankaŭ ekspozicio en kiu estis ekspozitaj verkoj de kaj pri s-ro R. Tagore kaj valoraj memoraĵoj pri li. Ankaŭ la hinda ambasadoro kaj aliaj laborantoj de la ambasadorejo kaj aliaj hindaj amikoj kaj studentoj en Pekino estis invititaj al la memoriga soleno.



Juan Jang (dekstre 3), Vang Jikin (dekstre 1), Pandoh (dekstre 2) kaj Ŝejrab observas la montegon Kongurtiubie.

## Nova Mond-rekordo de Montgrimpistinoj

La 17-an de junio en la kuranta jaro, du sportistinoj de la Ĉina Montgrimpistina Trupo Ŝejrab kaj Pandoh sukcesis konkeri la duan montpinton Kongurtiubie sur la Pamira Altebeno kun alteco de 7,595 metroj super la marnivelo, kaj aliaj du montgrimpistinoj el la trupo Vang Jikin kaj Radĝor ĝisgrimpi la altecon de 7,565 metroj. Ĉiuj la kvar sportistinoj rompis la mondan montgrimpan rekordon de

virinoj de 7,546 m. kreitan de ĉinaj sportistinoj en la jaro 1959.

La montpinto Kongurtiubie situas en sudokcidenta Hingiang-a Aŭtonoma Regiono de Ujgurnacio en Ĉinio. Ĝi estas nomata de la tie loĝantaj ĥalfaza-oj en sia lingvo Kongurtiubietag, kiu signifas "Blankĉapa Montpinto". Ĝi estas tiel nomata, ĉar ĝi similas al alta blanka feltĉapo, kiun portas la paŝtistoj tie loĝantaj. Tiu ĉi montgiganto estas krutega kaj malfacile surirebla. En la pasinteco ankoraŭ neniu kuraĝis provi ĝin surgrimpi. La konkerado de tiu ĉi montego komenciĝis jam en la pasinta majo fare de la Ĉina Montgrimpistina Trupo sub gvidado de sia estrino Juan Jang. Post du fojoj de alkutimiĝa prov-grimpado, ili komencis la definitivan atakon al ĝi je la 11-a de junio. La 16-an ili atingis la altecon de 7,300 metroj, kaj 30 minutojn post la 22-a de la 17-a de junio ili finfine atingis ĝian supron.

## Koncerto en Ĉiu Tago en Ŝanhajo

Dum la pli ol 60 tagoj ekde marto ĝis la komenco de majo, la ŝanhajaj muzikaj organizoj kaj la Ŝanhaja Muzika Kolegio okazigis ĉirkaŭ 70 koncertojn. La prezentitaj verkoj en tiuj koncertoj inkluzivis krom novaj komponaĵoj de ĉinaj muzikistoj, ankaŭ klasikajn kaj romantikajn verkojn de Eŭropo kaj komponaĵojn de modernaj sovetuniaj muzikistoj. Ĉiuj ĉi tiuj prezentoj en la koncertejoj, teatroj aŭ laboristaj kultur-palacoj kaj kluboj estis varme akceptitaj de la vasta aŭskultantaro.



Radĝor transpasas glaci-fendon.

## *Kulturaj kaj Historiaj Objektoj kaj Lokoj de Tibeto sub Bona Prizorgado*

La objektoj kaj lokoj kun historia kaj kultura valoro kaj intereso en Tibeto bone prezentas al ni historion de amika interrilato inter la han-a kaj tibeta nacio. Ribeloj de la superatavola reakciularo de la antaŭa Tibeta Loka Registaro multe ŝtelis kaj detruis tiujn valorojn. Post la likvido de la ribelo, la popola registaro faris aktivajn paŝojn por ilin protekti kaj komencis ilin ordigi aŭ ripari. Laŭ statistiko, la ordigitaj kulturaj kaj historiaj valoroj jam nombras pli ol dek unu mil pecojn, inter kiuj sin trovas la sankta statuo de Ŝakamunio kaj la 12 grandaj lampoj el oro, kiujn princino Venĉeng de Tang-dinastio portis al Lhasa en 640 p.K. de la tiama ĉina ĉefurbo Ĉang'an, la oraj kaj jadaĵaj sigeliloj, la per oro kaj jado ornamitaj dokumentoj, per kiuj la ĉinaj imperiestroj ekde Juandinastio (1279-1368 p.K.) titolis la Dalai-lamaojn kaj Banĉan-lamaojn, kaj la akompanataj imperiestraj ordonoj. Kaj la historiaj lokoj, al kiuj estas faritaj unuaj riparoj, jam nombras pli ol dek, inter kiuj sin trovas la Potala-palaco konstruita antaŭ pli ol mil tricent jaroj, Ĉulakang-templo kaj jamoĉe-templo konstruitaj post la alveno de princino Venĉeng al Tibeto kaj la tombo de la tibeta reĝo Sunzankampo k.a.

## *Sezono de Sportokonkursoj en Ĉinio*

Ekde majo, diversaj sportokonkursoj estas aranĝitaj po-regione en tuta Ĉinio. La konkursoj ampleksas sportojn de piedpilko, korbopilko, volejbalo, naĝado, gimnastiko, pezlevado kaj kam-

pajn kaj dromajn sportojn. Por la piedpilka konkurso, la tuta lando estas dividita en 4 konkurso-regionojn, kaj por tiu de naĝado, en 3 konkurso-regionojn. Krom tiuj ĉi du sportokonkursoj, kiuj jam finiĝis en majo, aliaj 5 jam estas aŭ tuj estos komencitaj en siaj respektivaj konkurso-regionoj.

La atingitaj rekordoj de la diversaj konkurso-regionoj montras, ke rimarkinde plialtiĝis la sportoniveletoj. Ekzemple, 4 tutlandaj rekordoj en naĝado estis novigitaj en la ŝanhaj-regiona konkurso okazinta je la 6-a de majo; kaj tri sportistoj renovigis 5 tutlandajn rekordojn en pezlevado dum la regionaj konkursoj en Tajjuan, la provinca ĉefurbo de Ŝanhi-provinco, kaj Hefej, la provinca ĉefurbo de Anhuj-provinco, respektive je la 8-a kaj 9-a de majo. Dum la konkurso en Tajjuan, pezlevisto Ĉen Gingkaj la sesan fojon renovigis sian mondan rekordon de svinglevo de la malpeza klaso sukcesinte levi 148.5 kg.

## *Kolekto de Faksimiloj de Ĉina Gravura Presarto*

Lasttempe la Eldonejo de Historiaj Kulturaj Objektoj eldonis *Kolekton de faksimiloj de ĉina gravura presarto*, kiu respegulas la historian disvolviĝon de la presarto de Ĉinio. La tuta kolekto konsistas el ok grandaj volumoj. En ĝi troviĝas pli ol 660 faksimiloj el 500 libroj de elitaj gravuraj eldonoj de Tang-ĝis King-dinastioj (t. e. 618-1911 p.K.). Ili povas esti dividitaj en jenajn tri kategoriojn: ksilografiaĵoj, tipografiaĵoj kaj lignogravuraj bildoj. El ili troviĝas la plej valoraj libroj ksilografie presitaj en dinastioj de Tang ĝis Song, t. e. en la jaroj 618-1279 p.K. Tiu ĉi kolekto estas sufiĉe kompleta bilda kroniko de la gravura presarto

de Ĉinio. Ĝi ne nur respegulas la grandan atingon de la ĉina kulturo, sed ankaŭ multe helpas al studado kaj disvolvado de la tradicia, formriĉa gravura arto.

## *Kolekto de Manuskriptoj de Lusin*

Por kontentigi diversflankajn bezonojn por studi pri kaj lerni de Lusin, lasttempe en Ŝanhajo eldoniĝis faksimila *Kolekto de Manuskriptoj de Lusin*. En la libro estas kolektitaj 16 manuskriptoj. Inter ili troviĝas verkoj spegulantaj lian bataladon kontraŭ diversaj malamikoj, lian amon al la junuloj, la amikecon inter Ĉinio kaj Sovetunio ktp. Laŭ verkospeco ĝi konsistas el eseoj, noveloj kaj prozoj.

## *Stereofilmo Elburgoniĝas*

Daguanloŭ-kinejo en Pekino estis iam malgranda kinoteatro kun mallarĝa ejo, simple kaj malbone ekipita, kaj nun ĝi fariĝis la unua kinejo en Ĉinio montranta stereofilmojn sur larĝa ekrano. La unua projekciita estis *Vojaĝo sur Li-rivero*, dokumentita filmo pri la fama pejzaĝa regiono de Ĉinio. Plurajn stereofilmojn por larĝa ekrano jam produktis nia propra filmfarejo, kaj ankaŭ en pluraj urboj oni povas ĝui tiajn filmojn, kvankam la historio de kino-industrio en Ĉinio estas ankoraŭ tre mallonga.

### *Solvoj*

1. USONO
2. PIRATO
3. PAVECO
4. REMAĈO
5. PLUMAĈO

## Verkoj de Maŭ Zedong

**Pri Praktiko**

**Pri Popoldemokratia Diktaturo**

**Interparolo kun Usona Ĵurnalistino Anna Louise Strong**


**Komentarioj pri la Blanka Libro**

(aperos sinsekve aliaj)

### Rakontoj pri Fantom-spitantoj

Libro de zorge elektitaj ĉinaj antikvaj rakontoj pri homoj, kiuj ne nur ne timas fantomojn sed ankaŭ mokas, superruzas, fortimigas aŭ batalvenkas fantomojn. La rakontoj estas interesaj spiritaj kaj plie inspirdonaj al tiuj, kiuj ankoraŭ timas la nur ŝajne timindajn.

### *Tuj renovigu vian abonon de* **"EL POPOLA ĈINIO" por 1962!**



gazetojn kun Ĉinio, Koreio, Japanio, Vietnamio kaj Indonezio.

\* **A. S. Nikitin**, Sovetia Komitato de Militveteranoj, ul. Kropotkina 10, Moskvo, USSR.

\* **V. Kolda**, Ŝumavska 14, Praha 12, Ĉeĥoslovakio, dez. interŝ. pm. k pk. kun ĉl.

\* **Enna Paavo**, dk. kun ĉl. pri ĉt. str. Katani 4-1, Rakvere, Estonio, USSR.

\* **Dimitar Papazov**, ul. "Car Osvooboditel" 33, Nova Zagora, Bulgario.

\* **Igor Cpin**, str. Ĉervenej armady 15, Poprad, Ĉeĥoslovakio, dez. interŝ. pm., bk. kun Azio.

\* **Nikola Stranĝanski**, "Rodopski Minjor"-Redakcio, Madan, Bulgario interŝ. pri literaturo, historio, geografio, vojaĝo, popolaj kutimoj, kantoj k. a.

\* **Kosta Conev**, str. "Slobelev" 19, urbo Ruse, Bulgario, dk. kun instruistoj k. a. k-doj.

\* **Kuzman Popov**, selo Ĉoba, Plovdivsko, Bulgario, pri muziko kaj medicino.

\* **Georgi Budakov**, str. G. Dimitrov 74, Sofio, Bulgario, kun ĉl. pri ĉt., interŝ. bk. k. a.

\* **Stojĉko Tetikov**, str. "Geĉkenli", Sofio, Bulgario, kun ĉl. pri ĉt. k interŝ. pm., revuojn k librojn.

\* **Kajoko Ŝibutani**, kako 3352-a-1 Inami-ĉo Kako-cun, Hjogoken, Japanio.

\* **Hermann Wojan**, Choriner str. 82, Berlin N54, DDR. d. interŝ. bk. kun Ĉinio.

\* **"Ezermester"** Lerneja Politeknika, E. Studrondo por pioniroj, Ĉefurba Lernejo Magyarorszag, Baranyai 18, Budapeŝt XI, Hungario, dk. kun lernejo, pionirodomoj, junuloj, instruistoj, pri politeknikaj laboroj; interŝ. porstudaj specimenoj, fotoj, filmkliŝoj, voĉrubandoj, fakscioj, tekniko por "ombro-ludo" ktp.

\* Fakdelegito UEA por naftoborado serĉas en ĉl kontakton kun specialistoj aŭ perantoj por tiu fako. Skribu al Herbert Wohlfahrt, Gotha/Thür., Thälmann-str. 43, DDR.

\* **E-literaturon interŝ.** kontraŭ germana. Willi Giese, Rupprechtstr. 19, Berlin-Lichtenberg 4, DDR.

### Alvoko

Bonvolu sendi al ni dudekminutan prelegon al la temo "Kultiva Vivo en Nia (Mia) Lando".

Nia rondeto volas fari el tiaj prelegoj vesperon por neesperantista publiko kaj pruvi tiel la utilecon de nia internacia lingvo. Ni intencas aranĝi tiun vesperon antaŭ la varbado en la kurso por komencantoj. Tial ni petas vin sendi al ni tiujn prelegojn ĝis la 15-a de septembro de 1961. Ni rekompencos per bela libro el nia lando. Sendu al la adreso: Josef Chvosta, Gottwaldova 221, Podebrady, Ĉeĥoslovakio.

\* **Klubo de Internacia Amikeco** (USSR. Ĥmelnickij, str. Lenin 5, Lernejo 5) dk. kun ĉl. pri ĉt., interŝ. revuon, pk., pm., semojn de floroj, kolektojn de papilioj, infanajn desegnaĵojn, dieversajn insignojn ktp.

\* **Junulara Klubo de Internacia Amikeco** (ĉe prez. Aleksandro Kurnosov, P. K. 25, Alma-Ata, USSR.) okaze de famaj datrevenoj de ĉl., aranĝas interesajn vesperojn k ekspoziciojn. Bv. sendi revuojn, pk., prospektojn ktp. Ni dankos per belaj pk.

**200 geesperantistoj** dk. pri ĉt. kun ĉl. La adreso sama.

\* **Aleksandro Kajti**, str. Terez 9, Pecs, Hungario, interŝ. pk., E-

*Reformo de Dezerto*  
*Foto de Hinhua*



